

Programma Esperanto 3000 vzw

Alle activiteiten vinden plaats in het cultureel centrum 'Romaanse Poort',
Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, tenzij anders vermeld.

Het programma van de Vespero 3000 begint om 20 uur, welkom vanaf 19.30 uur

Wo. 9/2	Vespero 3000: Bert Boon. "Esperanto - cxu sukcesa au fiaska projekto" Prelega enkonduko sekvata de aktiva debato.	19.30 - 22.00
Wo. 23/2	Vervolgcurcus Esperanto, conversatiecurcus met grammaticagedeelte door Marc Vanden Bempt	20.00 - 22.00
Za. 26/2	Week van de Internationale Vriendschap - Viering Semajno de Internacia Amikeco - Festado Iedereen welkom! Details op pagina 5	12.00 - 17.00 poste laŭpláce
Wo. 9/3	Vespero 3000: Angelos Tsirimokos. "La kalendaro: horo, tago, semajno, monato, jaro" Met de nodige visuele middelen en discussie achteraf	19.30 - 22.00
Wo 23/3	Vervolgcurcus Esperanto (cf. 23.2) Kun surprizo - nepre venu ĉiuj kiuj volas ion lerni!	20.00 - 22.00
Wo 13/4	Vespero 3000: Algemene ledenvergadering	19.30 - 22.00
Wo 27/4	Vervolgcurcus Esperanto (cf. 23.2)	20.00 - 22.00

ESPERANTO 3000

revuo de Esperanto 3000 vzw Leuven,
asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo
aperas 6-foje en la jaro

**Kontaktadreso /
Contactadressen**

esperanto3000@esperanto.be
Baron Descamps laan 77, 3018 Wijgmaal
Roger Goris (sekr.), Rue Ménada 44, 1320
Hamme-Mille ☎ 010 860 112;
r.goris@versateladsl.be
Frans Croon (voorz.), Bukenstraat 16,
1910 Kampenhout-Buken ☎ 016 655 944;
frans.croon@kampenhout.be

**Membreco / Lidmaatschap
E.3000**

membro/lid Eo3000 + FEL = € 20,00 =
Eo3000, Horizon-taal, JEN (ĝis 29-jara)
nieuwsbrief = gratis: zie onze webstek
<http://www.esperanto.be/esperanto3000/>

**Membreco / Lidmaatschap
UEA**

membro/lid UEA = € 9,00
same/idem + jarlibro = € 22,00
same/idem + Esperanto € 55,00

**Abonoj / Abonnementen
(2005)**

Esperanto 3000 = € 10,00 (nl/eo)
(alleen voor FEL-leden via andere clubs)
Horizon-taal = € 20,00 (nl/eo)
Monato = € 44,00, por ĉiuj (eo)
Ret-Monato = € 26,40, por ĉiuj (eo)
Agenda "La Jaro" € 5,00 (eo)
Enigma € 4,50 por 2 numeroj (eo)
Vertikale = € 5,00, por aktivuloj (eo)
Esperanto (UEA) = € 35,00 (eo)
Juna Amiko = € 14,00, por infanoj (eo)
Ret-info = € 21,00 (eo)
La gazeto (OSIEK) = € 27,00 (eo)
La Kancerkliniko = € 22,00 (eo)
Kontakto = € 21,00, komencantoj (eo)
Komencanto = € 15,00, komencantoj (eo)

Reklamo / Reclame

1 p. € 9, 1/2 p. € 5, 1/4 p. € 3, 1/8 p. € 2
5x la prezo: tuta jaro / 5x de prijs: heel jaar

Generale / Allerlei

Pagante bonvolu klare indiki la deziratajn
kategoriojn / Gelieve bij betaling duidelijk

De la (provizora) redakcio

De feesten zijn weer eens voorbij...

Je hebt natuurlijk het beste gewenst
aan je vrienden en familie, voor
jenzelf had je waarschijnlijk weer
enkele goede voornemens voor het
nieuwe jaar!

We hopen dat Esperanto 3000-
avonden bijwonen (prelego's en
cursussen) deel uitmaakten van die
goede voornemens en dat deze dan
uitzonderlijk eens niet aan de kant
worden geschoven na enkele dagen
of weken. ☺

Hopelijk zien we je dus snel weer!
Afspraak zoals gewoonlijk in het
Cultureel Centrum!!!

De redactie.

Kunlaboris, alfabete:

Helena Van der Steen & Marc
Vanden Bempt (provizoraj
redaktoroj), Nele Hiers (nalezen), la
aŭtoroj (vidu ĉe la artikoloj).

de gewenste categorieën aan te geven.
 Konto/rekening : 734-3331944-03 de/ van
 Esperanto 3000 vzw, 3000 Leuven
 Pri tekstoj nur la sendintoj respondecas / Voor
 teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk

Het woord is aan de voorzitter: **Kerstcadeau**

Is het ook in uw familie de gewoonte om met het oog op kerstavond vooraf briefjes te trekken en dan af te wachten van wie je wat als cadeautje krijgt?

Ik kreeg een cadeau van mijn schoondochter. Het boek “Een wereldtaal. De geschiedenis van het Esperanto” van Marc van Oostendorp. Het is een boek dat ik inmiddels heb uitgelezen; met het oog op dit voorwoord het laatste deel zelfs in ‘geforceerd marstempo’. En het is een interessant, maar soms ook erg choquerend, boek in vier hoofdstukken. Eén dat ik nog eens rustig zal moeten herlezen.

Je leert er een en ander over Zamenhof en de eerste pioniers; en o.m. de Ido-crisis. Je merkt hier al dat “Esperanto sen mitoj” niet voor niets in de bibliografische verantwoording prijkt.

Na lezing weet je (beter) wat Edmond Privat, Hector Hodler, Andràs Cseh, Lidia Zamenhof;... voor de groei van het Esperanto deden en betekenden. En dat Gaston Waringhien en Kálmán Kalosçay eerst als nieuwlichters werden verketterd om later als grote vernieuwers geëerd te worden.

De schrijver zet een aantal zaken in (zijn?) perspectief; wat een beeld oplevert dat op zijn zachtst gezegd niet steeds overeenkomt met de gebruikelijke visie in ‘Esperantujo’. Zo bv. over William Auld: “In een middelgrote literatuur als de Nederlandstalige zou hij hiermee niet meer dan een voetnoot in de literatuurgeschiedenis zijn geworden, maar in de Esperantoliteratuur maakt hem dit tot een gigant.” (p.161)

Het laatste hoofdstuk: “Als het Esperanto gedood kon worden” behandelt de huidige gang van zaken. Daarin komen ook kritische opmerkingenvoor. Maar ook getuigenissen van voortrekkers en esperantisten die daarom niet in ‘la finvenko’ geloven maar wel illustreren hoe Esperanto toch ergens zijn waarde heeft.

Merkwaardig is de eindzin van dit hoofdstuk; “Als het Esperanto gedood kon worden, hadden de esperantisten dat al lang gedaan”. Deze eindzin

herinnert mij aan mijn schooltijd.

De priester-directeur had het in zijn wekelijkse preek over “het wonder van de Kerk die na 2000 jaar nog bestaat”. Later in de les werd dit door de kritisch denkende leraar wetenschappen geciteerd maar deze voegde er aan toe “ondanks de pastoors”.

Na lezing van dit boek zou je ontmoedigd met Esperant(uj)o kunnen kappen. Maar je vindt er ook een aantal hints in terug om juist met succes door te gaan. Want dat is het nut van geschiedenis: leren uit fouten van het verleden om het in de toekomst beter te doen.

Kerstmis is het feest van (weder)geboorte, van nieuw leven. Of je dat nu bekijkt uit profaan of religieus oogpunt maakt niet veel uit. In dit opzicht vind ikzelf dit boek een echt “kerstgeschenk”.

Maar we mogen dan niet uit het oog verliezen dat nieuw leven groeit in een nieuwe tijd; en daardoor sterk kan verschillen van het oude leven!

Frans CROON, voorzitter

S.I.A.-cadeau, van UEA aan Esperanto **3000**

*El Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 197, 2005-01-29
divstavigite tra la reto*

La lasta plena semajno de februaro estas festata en la Esperanto-movado kiel la Semajno de Internacia Amikeco (SIA). Ĝi celas plivigli kontaktojn inter esperantistoj de diversaj landoj kaj krei kaj plifortigi iliajn ligojn kun rondoj ekster la Esperanto-movado. Jam de kelkaj jaroj s-ino Edvige Ackermann (Italio) estas komisiito de UEA pri la Semajno. La Estraro de UEA nomumis ŝin por tiu tasko ankaŭ dum la periodo ĝis 2007. Sube sekvas alvoko de s-ino Ackermann por aktivado lige kun SIA 2005.

"Ni ekbruligu la flamon de Amikeco trans limoj. Ĝia lumo signifas justecon, fratecon, pacon inter homoj kaj popoloj. Por ke tiu flamo povu lumi pli klare en la mondo, ni laboras por la divstavigo de la neŭtrala internacia lingvo, Esperanto. En la servo de la nobla tuthomara kulturo ĝi vivu, floru kaj eligu la lumon de amikeco trans limoj".

Tiel Erik Carlén, antaŭ pli ol 35 jaroj anoncis la belan ideon pri la starigo de

ĉiujara Semajno de Internacia Amikeco, kiu poste fariĝis tutmonda tradicio de la Esperanto-medio. La tiama vicprezidanto de UEA formulis sian ideon per la simpla la devizo: INTERKOMPRENIGŔO + AMIKIGŔO = ESPERANTO.

.../..

Ekde tiam Esperantaj grupoj klopodas okazigi dum la lasta semajno de februaro manifestaciojn, renkontiĝojn kaj ceremoniojn por atentigi, ke paco ekestos, kiam iu konsideros la aliulon kiel propran sinceran amikon.

.../..

Tre bone agas jam delonge la Esperanto-grupo en Leuven, Belgio, kiu organizas dum SIA aranĝon imponan en la loka Kultura Centro. En la riĉa programo (2004) estas desegnokonkurso por infanoj, vizito al muzeo, prelegoj pri diversaj temoj, Esperanto-kursetoj, prezentoj de libroj, akcepto ĉe la urbestro, vespera bufedo, ludoj, koncerto, k.t.p. En oficiala deklaro okaze de SIA 2004 la urbestro de Leuven, s-ro L. Tobback, diris i.a.: "La urbo Loveno plene konscias pri la lingva diverseco kaj pri la graveco kaj bezono de kompreno trans landlimoj. Tiu ĉi bezono forte sentiĝas hodiaŭ en la institucioj de Eŭropa Komunumo, sed ankaŭ ekster ĝi, je monda nivelo. Internacia amikeco trans la lingvaj kaj naciaj limoj estas necesa kondiĉo por ke homoj en la tuta mondo komprenu unu la aliajn kaj kunvivu pace. La urbo Loveno volonte malfermas siajn limojn por saluti siajn vizitantojn el aliaj landoj."

.../..

Edvige Ackermann, Italio, Komisiito de UEA pri SIA.

S.I.A.-cadeau, van Esperanto 3000 **aan JOU**

Wat Edvige hierboven schreef, gaat over het feest in 2004.

Om de twee jaar is het kleinschaliger, zo ook dit jaar.

We hopen dat al onze leden aanwezig zijn (tenzij overmacht)!

Ook niet-leden zijn van harte welkom.

Afspraak zaterdag 26/02/2005

om 12.00 uur

Restaurant **Veilinghof**, Leuvensesteenweg 22, Kampenhout-Sas

Wij starten met de **lunch** om 12.30 uur (voor diegenen die willen eten).

Warme schotels vanaf 11,30 euro.

Tussenkomst door de club: 5,00 euro pp. voor de leden -
enkel na reservering ten laatste op 20/02/2005 via esperanto3000@esperanto.be,
of telefonisch: 03/324 76 06 (Helena) na 18.00 uur!
Wij hebben reeds voor +/- 20 personen gereserveerd.

Ter info: op 15/02/2005 start het aspergeseizoen! Hier kan je reeds je menu
samenstellen: <http://users.pandora.be/veilinghof/index.htm>

Daarna gaan wij naar het nabijgelegen **witloofmuseum**. Start van het bezoek om
15.00 uur!! De inkom van 2 euro wordt voor de leden door de club betaald. Na het
museumbezoek is er tijd voor een borrel of een koffie (op eigen kosten).

**SIA 2005: ANONCU NUN VIAN
ÆEESTON!**

Jarfine al IF en Magdeburg 27/12/04 - 03/01/05

Claude Nourmont, Luksemburgio (el la IF enkonduko)

IF estas la tradicia novjara aranĝo por familioj kaj mezaĝaj personoj, kaj la kadra temo de la pasinta IF estis tradicioj.

Kion signifas « tradicio »? Folkloro, morala premo, ripeto de sama konduto ? En definitiva socia grupo (etno, grupo, familio) oni sekvas iujn normojn laŭ ripeta maniero : ekzemple ĉiujare je Julfesto multaj homoj en Francio, Germanio ktp starigas abion en kaj/aŭ ĉe sia domo kaj brile ornamas ĝin. Ekzemple en Luĉemburgio infanoj en la vilaĝoj je la sankta vendredo anstataŭas per knariloj la sonorilojn, kiuj foriris al Romo (aŭ kiuj ne rajtas sonori pro la funebro pri Kristo), ĉar en la vilaĝoj siatempe oni sciis la horon (por leveĝi, por preĝi, por eklabori ..) nur dank' al la sonoriloj de la vilaĝa preĝejo. Sed tio signifas ankaŭ ke virinoj en iuj socioj ne rajtas eliri solaj, ne rajtas havi relatojn kun viroj antaŭ la –de la gepatroj decidita- geedziĝo.

Interne de iu grupo oni havas tutan serion da komunaj kondutoj en difinitaj okazoj : por ĉiuj gravaj aktoj de la vivo, naskiĝo, geedziĝo, morto, por la festoj, por la maniero kultivi la teron, se temas pri agrikulturbazitaj socioj, ktp. Ciu grupo estas grupo, ĝuste pro la komunaj normoj, laŭ kiu ti konsistas, kaj laŭ kiuj la membroj de la grupo identiĝas al ĝi.

Tradicioj povas esti tre premaj. Socio kiu vivas nur el tradicioj, tra tradicioj, ne evoluas, stagnas. Aliflanke, socio sen tradicio fono, perdas siajn radikojn, kaj samtempe siajn celojn. Kie estas la ĝusta ekvilibro ? Kiel decidi ke iuj tradicioj estas bonaj, kaj la aliaj malbonaj ?

Malbonaj, ĉar ili ne apartenas al mia socio, aŭ, ĉar mi ne ŝatas ilin en mia propra socio ?

Se mi ne sekvas la tradicioj de mia grupo, estas la risko, ke mi estos traktata kiel marĝenulo aŭ avangardemulo. Gejunuloj ofte volas forigi la tradiciojn, sed tio



estas.... tradicia ĉe la gejunuloj, en la plej diversaj socioj. Konfliktoj povas okazi inter tradiciemuloj kaj maltradiciemuloj. Sendube iel la ĝusta mezo estas konscia adaptiĝo/adaptigo al la nunaj normoj, sen kompleta forbalai la malnovajn kutimojn.

Fakte progreso en socio venas per racia evoluigo de la kutimoj laŭ la novaj cirkonstancoj. Kaj ĉu ni sekvu la bufedan ordon ?

Magdeburgo en Germanio.

Unuafoje Magdeburg estas dokumentita en la “ĉapitro de Diedenhofen” en la jaro

805. En tiu tempo gravaj komercaj vojoj kondukis al la rivero Elbe.

En 965 ĝi ricevis multajn urbajn privilegiojn de la imperiestro Otto I .

La ekonomia potenco kaj politika influo de Magdeburg grave kreskis, la urbo iĝis Hanso-membro en 1298 kaj estis ŝatata transŝarĝa loko.

La “Magdeburga juro” fariĝis leĝo por multaj eŭropaj urboj.

Inter 1209 kaj 1520 konstruiĝis la unua gotika katedralo en Germanio, kaj ankoraŭ nun estas simbolo de la urbo.

En majo 1631 la Tridekjara Milito finis tiun periodon de prospero.

La urbo estis preskaŭ plene detruita, sed la siatempa urbestro (1646 ĝis 1681) Otto von Guericke elstaris kiel arkitekto de la rekonstruo.

La plej fama civitano de Magdeburg sendube estis Von Guericke, fama natursciencisto, inventinto de la aerpumpilo kaj manometro.



Lia eksperimentoj kun la t.n.
“Magdeburga duongloboj”
fariĝis mondkonataj.

Post 1666 la urbo estis
finkonstruita kiel prusa citadelo.

Dum la Dua Mondmilito, en januaro 1945, 80% de la urbo forbrulis complete dum ĉirkaŭ duonhoru, pro elacra (angla) bombado. Sed ĝi denove leviĝis kiel fenikso el la cindro kaj kreskis, sub socialismaj kondiĉoj, al la kvina plej granda urbo de iama GDR.

Kvankam la germana reŭnuigo en 1990 alportis ne nur liberecon kaj demokration, sed ankaŭ disfalon de la industrio kaj senlaborecon, la urbo nun estas multe pli bela kaj fariĝis nepre vizitinda.

En 2005 la urbo oficiale festos sian 1200-jariĝon.

Magdeburg certe valoras nun vian viziton.

Kelkaj gravaj vidindaĵoj:

Kulturhistoria muzeo

En tiu ĉi muzeo vi trovas la sabloŝtonan monumento de “Magdeburga Rajdanto”, ĝi estas la originalo el la 13-a jc kaj la unua staranta monumento en Germanio.

Krome vi povas vidi ĝi tie verkojn de famaj artistoj kiel Dürer, Picasso, Chagal, Rembrandt ktp... Inter la eksponaĵoj troviĝas reproduktaĵo de la fama “Magdeburga duonglobo” de Otto von Guericke el la



jaro 1654.

Turo de Lukas

La turo konstruiĝis en 1460, nuntempe en ĝi troviĝas la Otto-von-Guericke muzeo.

Katedralo Sankta Maŝricio


La trinava katedralo estis la unua gotika konstruaĵo en Germanio. Laŭ la horizontala projekciaĵo ĝi similas francajn gotikajn preĝejojn.

La protestanta katedralo apartena al la kulturaj heredaĵoj de UNESKO.

Avo biciklas ĉirkaŭ la mondo

Ĉiu scias ke esperantistoj vojaĝemuloj estas. Tiel estas Zef Jégard, franca emeritulo, kiu de kelkaj jaroj trabiciklas la mondon laŭ la 50a paraleleo. Lastatempe, en 2004, li eĉ starigis perbiciklan rekordon inter Brest (Francio) kaj Vladivostoko (ĉe la Japana Maro) en 65 tagoj, 22 horoj kaj 38 minutoj. Ĉefa celo lia estis varbi por Esperanto, tra tuta Eŭropo kaj Rusio, uzante nur la Internacian Lingvon dum intervjuoj far de amasinformiloj laŭvoje.

Zef Jégard



Sed ne nur vojaĝas Zef, li ankaŭ priskribas siajn vojaĝojn. En 2002, li skribis libron titolita : «*Papy fait le tour du monde*». Esperantigis tiun libron Jean-Pierre Ducloyer, laŭ la titolo «*Avo biciklas ĉirkaŭ la mondo*». Jus eliris la esperanta versio ĉe «*Eldono de la Liber-rado*». En tiu libro, Zef travivigas al ni, kun ĉiutagaj detaloj, sian 2000-an vojaĝon: li foriris el *Islamabado* en Pakistano por atingi *Vladivostokon* tra Himalaĵo, la dezertoj Taklamakan kaj Gobio, la mongola stepo, la siberia tajgo, ktp... Li ankaŭ priskribas siajn renkontojn laŭ la tuta vojo kun la surlokaj loĝantaro kaj...esperantistaro.



Jen eta eltiraĵo por montri al vi la stilon de tiu libro :

„ ... *Senkompata suno brule disradias al fantoma pejzaĝo, kie nur kelkaj dornarbustoj sukcesas transvivi. Jen kaj jen torentoj trafluas tiun mornan spacon. Sur la mapo iliaj bluaj strekoj finiĝas punktolinie en la dezerto, antaŭ ol malaperi meze de nenie. Kelkaj torentoj pli grandaj estigas iom da vivo laŭ sia*

fluado, irigacirojoj konstruitaj antaŭ pli ol du mil jaroj, naskas oazojn, kies abunda vegetaĵaro kontrastas kun la ĉirkaŭa arideco.

Varmego devigas nin rifuĝi en ombron de poploj apud senakva kanalo. La termometro indikas 40 gradojn. Ĉirkaŭ la kvara posttagmeze, malforta venteto malaltigas la temperaturon ĝis 35 gradoj. Ni profitas tiun relativan spirmomenton

por bicikli ĝis la urbo Jengisar, fama pro siaj tranĉiloj, same kiel la urbo Thiers en Francio aŭ Solingen en Germanio”.

lom pri mi, Mikaelo Bronptejn

Mi estas Moisse Bronštejn – tio estas skribita en mia pasporto.

Mia panjo nomis min kutime Mikaelo, kaj tiun nomon mi uzas por Esperantujo, krom diversaj pseŭdonomoj: Bruna Ŝtono, Brontsaŭro, Mamuto k.a.

Mi naskiĝis en 1949, en Ukrainio, sed en la aĝo de 18 jaroj mi foriris de tie por studi en Rusio, kaj jam ne plu revenis por konstanta loĝado.

La studoj havis du diversajn direktojn: elektro kaj ĵurnalista metio.

En 1972 mi finis miajn studojn kaj diplomiĝis pri la ambaŭ. Tamen mi estis aktive kunlaboranta en gazetaro nur en junaĝo, do la ĵurnalista diplomo restis preskaŭ neuzita.

Kiel inĝeniero pri elektro mi laboris en diversaj postenoj en la urbo Tihxvin, apud Sankt-Peterburgo (Leningrado), ankaŭ en la urbo Vorkuta, trans Polusa Cirklo. Ekde 1990, reveninte al Tihxvin, mi havis oficon kiel dungita direktoro de plastvara uzino, poste kaj ĝis nun - la saman postenon en la firmao, konstruanta lignajn vilaojn.

Mi havas edzinon, kun kiu mi loĝas en Tihxvin kaj plenaĝan filon, kiu loĝas kaj laboras en Sankt-Peterburgo.



Esperanto venis al mi en 1962. Mi venis al ĝi unu jaron pli frue sen absoluta certeco, ke ni ekamos unu la alian, tamen en 1962 tio okazis kaj la amo inter mi kaj la lingvo Esperanto ekzistas ĝis nun.

Ĉar mi provis verki poemojn eĉ antaŭ ol mi ekamis esperanton, nature mi komencis fari tion ankaŭ en la lingvo amata.

Post iom da tempo mi komprenis, ke poemojn la publiko akceptas pli atente, se tiujn akompanas muziko – do aperis kantoj, da kiuj mi verkis kaj tradukis kelkcenton.

Kun plia ŝarĝo da jaroj mi ekverkis kaj ektradukis ankaŭ prozon, do dum la lasta jardekduo aperis tri kodiskoj da miaj kantoj kaj dekseks libroj, inter kiuj la plej konataj iĝis rakontaro “Legendoj pri SEJM”(1992), romano “Oni ne pafas en Jamburg”(1993), porinfana legolibro “Mamutido Micxjo”(1996) kaj poemaro “Du lingvoj”.

Espereble, ankaŭ la lasta mia romano “Dek tagoj de kapitano Postnikov”, eldonita antaŭ duonjaro, trovos siajn legantojn.

En junaĝo mi aktive partoprenis la movadajn aferojn, estinte estrarano (foje eĉ prezidanto) de Sovetia Esperantista Junulara Movado (SEJM).

Nuntempe mi ne estas aktiva movadano, kvankam mi membras en Rusia Esperanto-Unio kaj en UEA. Mi nur instruas la lingvon, verkas poemojn, kantojn kaj prozaĵojn en Esperanto.

Fojfoje mi faras prelekturoneojn al diversaj lokoj en Rusio kaj ekstere, ĉar dume tiuj renkontiĝoj kun la aŭskultantaro (ne nepre esperantista) donas plezuron al la homoj kaj al mi mem.

Mikaelo Bronŝtejn



Kial fariĝi membro de FEL.

Denove venis la tempo por **renovigi kotizojn kaj abonojn**.

Kiel pasintjare mi ŝatus pledi por aliĝo al FEL (Flandra Esperanto Ligo). La argumentoj restas la samaj:

Esperanto 3000 estas parto de FEL sed ni bezonas FEL. Kiel kunordiga organizo por tuta Flandrujo, ĝi havas multe pli gravan statuson por rilati kun oficialaj instancoj kaj aliaj eksteraj organizoj.



FEL respondecas pri la grafika centro, kiu eldonas librojn, revuojn kaj inform-materialon. Tio faciligas la laboron de la lokaj kluboj, ĉar la bezonata materialo estas facile akirebla kaj ni ne plu devas investi multe da mono en libroservo. Ni facile disponas pri la plej lastaj eldonoj en formo de depono interŝanĝebla laŭ peto.

Ni, la kluboj, proponas niajn dezirojn al FEL. Pere de FEL la grupoj interkontaktas kaj celas al kunlaboro kaj sama strategio.

Do estas grave ke la grupo estu bone reprezentita ene de FEL.

Kiel vi scias, membreco de FEL aŭtomate membrigas vin ĉe la dezirata loka klubo (Esperanto 3000 kompreneble!).

Vi ricevas krom nian propran revuon ankaŭ la revuon Horizontaal kiu vere estas



rekomendinda pro la multaj interesaj artikoloj kaj rubrikoj.

BESTELFORMULIER VOOR LIDMAATSCHAPPEN, ABONNEMENTEN EN BOEKEN

2005

Betaling en inschrijvingsformulier rechtstreeks
 of via een plaatselijke groep zenden aan:
VLAAMSE ESPERANTOBOND
 Frankrijklei 140
 B-2000 Antwerpen
 Telefoon: (03) 234 34 00
 Fax: (03) 233 54 33
 E-adres: admin@fel.esperanto.be

Code: -

Familienaam: _____ Voornaam: _____

Adres: _____

Postnummer: _____ Gemeente: _____

Telefoon: _____ Beroep: _____

Geboortedatum: _____ Nationaliteit: _____

E-mail: _____

Tot welke plaatselijke Esperantogroep wens u te behoren?¹

- Aalst Antwerpen Brugge Gent Hasselt Kalmthout
 Kortrijk Leuven Londerzeel Oostende Peer Turnhout

Andere leden van het gezin:

Naam:	Voornaam:	Geboortedatum:
_____	_____	_____
_____	_____	_____
_____	_____	_____

Nationale lidmaatschapsbijdragen:

- | | | | |
|----|--|------------|-----------|
| f | - gewoon lid ^{2,4} | 20,00 EUR | 20,00 EUR |
| | + familiaal lid (alle andere leden van het gezin) ³ | +20,00 EUR | |
| s | - steunend lid ² | +30,00 EUR | |
| df | - levenslang lid | 500,00 EUR | |

Ik ben sympathisant en stort een gift aan de Vlaamse Esperantobond: EUR.

Giften van EUR 30,00 of meer komen in aanmerking voor een fiscaal attest.

Mijn vereniging heeft sympathie voor Esperanto en wil op de hoogte blijven van initiatieven van de Vlaamse Esperantobond.

Extra steun

Ik schenk de volgende som:

- | | | |
|---|--|---------------------|
| g | - voor de werking van de plaatselijke groep (zonder fiscaal attest) | EUR |
| d | - Ik word steunend lid van de Esperanto-jeugdvereniging ⁵ | 30,00 EUR EUR |

Totaal pagina 1

..... EUR

Abonnementen:

p	Horizontaal (gratis voor leden)	20,00 EUR EUR
m	Monato	44,00 EUR EUR
em	Ret.Monato	26,40 EUR EUR
a	Agenda La Jaro x	5,00 EUR
en	Enigmo (per 2 nummers)	4,50 EUR EUR
j	Jen (gratis voor FLEJA-leden) jongeren ⁴	9,00 EUR	12,50 EUR
i	Vertikale (elektronische versie voor wie E-mail heeft)	5,00 EUR EUR
lf	Literatura foiro	30,00 EUR EUR
e	Esperanto	35,00 EUR EUR
ja	Juna Amiko	14,00 EUR EUR
h	Heroldo	32,00 EUR EUR
el	RET-INFO	21,00 EUR EUR
oe	La ondo de Esperanto	27,00 EUR EUR
gz	La gazeto	27,00 EUR EUR
kk	La Kancerkliniko	22,00 EUR EUR
k	Kontakto	21,00 EUR EUR
ko	Komencanto	15,00 EUR EUR
fo	Fonto	30,00 EUR EUR
li	Litova Stelo	14,00 EUR EUR
fe	Femina	20,00 EUR EUR

Internationale lidmaatschapsbijdragen:

u	gewoon lid	9,00 EUR EUR
jl	lid met Jarlibro	22,00 EUR EUR
jl+e	lid met Jarlibro en Esperanto	55,00 EUR EUR
z	Societo Zamenhof	110,00 EUR EUR
ipr	ILEI + Internacia Pedagogia Revuo	18,00 EUR EUR
ikef	IKEF + La Merkato	15,00 EUR EUR
ek	IKUE + Espero katoliko	25,00 EUR EUR
nu	INOE + Naturista vivo	14,00 EUR EUR

Zend mij gratis de boekenlijst van de VEB

Ik betaal

Totaal EUR

- Ik betaal het totaal op één van de volgende rekeningen van de Vlaamse Esperantobond: 000-0265338-43, 001-2376527-06, 402-5510531-55 en zend dit formulier aan de Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.
- Ik betaal het totaal aan mijn Esperantogroep (zie blz. 1) en zend dit formulier ook aan hen.
- Ik heb een tegoed op mijn rekening bij FEL, gelieve mijn rekening te debiteren.

(De gegevens die u hier verstrekt, worden in de computer van de Vlaamse Esperantobond bewaard. Zij worden enkel gebruikt om u te informeren over de doelstellingen en de activiteiten van de Esperantobeweging, voor facturatie, e.d. U kan schriftelijk om een uittreksel van de gegevens die FEL over u heeft verzoeken, ze laten wijzigen of verwijderen.)

Voor meer informatie over lidmaatschappen, allerhande tijdschriften en boeken in of over Esperanto zal de Vlaamse Esperantobond u graag helpen. U kunt iedere werkdag bellen van 9 tot 12.30 en van 13.30 tot 17.30, of schrijven naar bovenstaand adres. Ook de bestuursleden van de plaatselijke groepen van de Bond zullen u graag in de mate van het mogelijke helpen.

Noten:

1. Een lid van de Vlaamse Esperantobond is automatisch ook gewoon lid van de dichtsbijzijnde plaatselijke Esperantogroep. Wenst u lid te zijn van een andere groep, plaats dan een kruisje in het vierkantje achter de naam van die groep.
2. Leden en steunende leden van de Vlaamse Esperantobond (FEL) krijgen een gratis abonnement op het tijdschrift *Horizontaal*. Leden krijgen op aanvraag de *Membromarkfolio* van UEA, dat recht geeft op het gebruik van de *Delegita Reto* in het *Jaarboek van UEA*. Deze lidmaatschapszegels kunnen worden aangevraagd via de plaatselijke groepen of rechtstreeks bij het bondssecretariaat.
3. Bij een familiaal lidmaatschap is iedere 2de en volgende persoon die op hetzelfde adres woont, lid. Er wordt slechts één tijdschrift per adres verzonden.
4. Jongeren tot en met 29 jaar worden automatisch lid van de Vlaamse Esperantojeugd (FLEJA). Zij en steunende leden van FLEJA krijgen gratis het tijdschrift *Jongeren Esperanto-Nieuws (Jen)*.
5. **Giften** van 30,00 EUR of meer aan de Vlaamse Esperantobond komen in aanmerking voor belastingvermindering. In voorkomend geval worden de attesten verstuurd in het begin van het kalenderjaar dat volgt op de schenking. *Schenkingen rechtstreeks aan een plaatselijke groep komen NIET in aanmerking voor belastingaftrek.*

Tijdschriften

- Horizontaal* (nl, 6 nrs/j) Het behandelt taalproblematiek en de Esperantobeweging en besteedt ruime aandacht aan de activiteiten van de plaatselijke Esperantogroepen.
- Monato* (esp, 11 nrs/j) Dit tijdschrift, uitgegeven door FEL, is een algemeen tijdschrift voor politiek, economie en cultuur: een aanrader als dagelijkse lectuur, ook voor beginners.
- Vertikale* (esp) Het blad voor de actieve leden van FEL. Het behandelt de beweging, de verenigingen en het Esperanto-onderricht.
- Jen* (nl/esp, 4 nrs/j) Orgaan van de Vlaamse en Nederlandse Esperanto-Jongeren. Verslagen uit de jongerenbeweging en artikels over taalproblematiek.
- Enigma* Een tijdschrift vol kruiswoordraadsels, woordzoekers, logigrammen, enz., volledig in het Esperanto. Voor beginners en gevorderden.
- Esperanto* (esp, 11 nrs/j) Het officiële ledenblad van UEA (Esperanto Wereldbond). Het behandelt voornamelijk de internationale Esperantobeweging en zijn cultuur.
- Kontakto* (esp, 6 nrs/j) Tijdschrift voor jongeren en beginners. Het behandelt de meest uiteenlopende facetten van de internationale cultuur.
- Ret-Info*: Een infoservice op het internet en daarbovenop de Internetversie van *Eventoj en Interredaktore*. De abonnee preciseerd zelf hoeveel berichten hij wenst te ontvangen.
- Juna Amiko* (esp, 4 nrs/j) Een tijdschrift voor kinderen die Esperanto kennen of het juist leerden, ook geschikt voor beginners, met eenvoudige teksten en vele illustraties.
- La ondo de Esperanto* (esp, 6 nrs/j) Informatie over gebeurtenissen en evoluties in de Esperantobeweging met speciale aandacht voor de beweging in Rusland.
- Literatura foiro* (esp, 6 nrs/j) Hoogstaand literair tijdschrift, met uittreksels, interviews en recensies uit de originele en vertaalde Esperantoliteratuur.
- La gazeto* (esp, 4 nrs/j) Tijdschrift over cultuur in de brede zin van het woord met veel aandacht voor het Esperanto in de culturele wereld.
- La Kancerkliniko* (esp, 5 nrs/j) Humoristisch en satirisch tijdschrift.
- Internacia Pedagogia Revuo* (esp, 4nrs/j) Lidmaatschap + tijdschrift van de vereniging van esperantisten-leraren met artikelen over pedagogie, methodologie en onderwijs.
- La Merkato* (esp, 4nrs/j) Tijdschrift voor de internationale ondernemer, orgaan van *Internacia Komercia kaj Ekonomia Fakgrupo* (IKEF).
- La Komencanto* (esp, 4nrs/j) Een tijdschrift met eenvoudige teksten voor beginnende Esperantogebruikers.
- Espero Katoliko* (esp, 6nrs/j) Tijdschrift van de katholieke Esperantobeweging.
- Litova Stelo* (esp, 6nrs/j) Tijdschrift van de Litova Esperanto-Asocio.
- Femina* (esp, 4nrs/j) Een tijdschrift (niet alleen voor vrouwen) dat handelt over thema's vooral interessant voor vrouwen.

BET - 41 (vidu la paĝon 15)

Informilo Nr.1

pri la BALTIAJ ESPERANTO TAGOJ (BET-41)

BET-41 okazos en Rigo (Latvio) de la 15 ĝis la 21 de julio 2005 (antaŭ la 90a UK en Vilnius).

Temo: Baltiaj landoj en Eŭropa Unio

Programo: diversnivelaĵ Esperanto-kursoj, enkonduka kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, seminario pri problemoj de Esperanto-movado, Sankta Meso en Esperanto, Interkona, Nacia kaj Internacia Vesperoj, Ekskursa Tago, kvizoj, filmoj, kantoj, dancoj...

Aligkoltizo en eŭroj (EUR) aŭ en latoj (Ls) laŭ kurenta kurzo:

a/ ĝis la 31.03.2005,	b/ ĝis la 31.05.2005,	c/ poste kaj surloke
Latvio, Litovio, Estonio	10 EUR	12 EUR
Ekssocialismaj landoj	15 EUR	20 EUR
Okcidentaj kaj ceteraj landoj	20 EUR	30 EUR
		15 EUR
		25 EUR
		40 EUR

Infanoj ĝis15-jaroj aligkoltizon ne pagas Lernantoj, studentoj, handikapuloj pagas 50% de la koltizo

Loĝado: Laŭdezire - en hoteloj aŭ en studentaj komunloĝejoj (la prezo - ekde 10 EUR diurne por unu persono).

Pli detala kaj preciza informo sekvos en la informilo Nr-o 2.

Bonvolu la aligilon sendi al: Organiza Komitato de BET-41 p.k. 150, LV 1050, Rigo, Latvio

Retadreso: etulino@one.lv
Tel: (371) 7135250
Port. tel. +3716407174

ALIGILO Nr. _____

Mi aliĝas al BET-41: _____
(Bonvolu skribi PRESITEREI):

Familia nomo..... Persona nomo.....

Viro/Virino (forstrek la nevalidan) Naskiĝdato (JJJJMM/TT):/...../.....

Adreso:.....

Urbo.....Poŝtkodo.....

Lando.....Tel.Nr.....

Retpoŝto:.....

Profesio.....Laborposteno.....

Aktivado en E-movado.....

Miaj kontribuoj al BET-41.....

Pagamaniere:
 sendos poŝte al LatEA ĝiros al konto 'lase-b' en Roterdamo
 interkonsente kun Organiza Komitato pagos surloke

Mi dezirus loĝi en (nomu la varianton!):.....
kaj planas alveni (dato).....

Dato..... Subskribo.....

Rimarkoj de Organiza Komitato:

Ricevita (dato).....

Ricevita koltizo.....

Ceteraj.....

BET - 41

Biruta Rozenfelde.


La unua BET okazis en la 1959 jaro en Latvio ĉe la lago Baltezers apud urbo Riga, ĝin organizis mi – Biruta Rozenfelde, studentino de Latva Ŝtata Universitato, ĉar antaŭ unu jaro (en 1958) gestudentoj - esperantistoj de diversaj altlernejoj el Baltaj Sovetaj respublikoj kunvenis en Riga kaj decidis ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio organizi Baltan Esperantan Studentan kaj Junularan Tendaron.

La unua tendaro, vere, okazis en tendoj kaj freŝa aero, ĝin partoprenis 50 esperantistoj, sed ne nur gejunuloj. La sekvontaj tendaroj jam estis precipe en ejoj kaj la nombro de partoprenantoj pli kaj pli grandiĝis, ankaŭ la aĝo de partoprenantoj estis diversa, partoprenantoj veturis el tuta Sovetunio. BET, de Balta Esperanta Tendaro fariĝis Baltaj Esperanto-Tagoj. BET plenumis la rolon de tutsoveta Esperanto kongreso, ĝin partoprenis 400-600 esperantistoj. Dum la soveta tempo estis malfacile organizi BET-ojn, la partiaj kaj registaraj instancoj ofte malpermesis ilin organizi, pro tio kelkfoje BET eĉ ne okazis. Kiam Estonio, Latvio kaj Litovio reakiris sendependecon, nia BET daŭris funkcii, iom ŝanĝiĝis la geografio de partoprenantoj, ĉar alveturas esperantistoj preskaŭ de la tuta mondo, kompreneble estonoj, latvoj kaj litovoj, ankaŭ el Skandinavio, Pollando, Germanio kaj aliaj lokoj, la nombro de partoprenantoj estas ĉirkaŭ 200. La programo de BET-oj estas diversa: somera universitato, diverstemaj prelegoj, primovada lernejo, esperantaj kursoj diversnivelaj, konatiĝo kun loka lingvo, interkona vespero, diservo, ekskursoj, libroservo, ekspozicioj, butikoj, demonstrado de filmoj kaj lumbildoj, arta programo, nacia, internacia kaj aliaj koncertoj, lernado de kantoj, ktp.

Ĉi-jare (2005) de la 15-a ĝis la 21-a de julio en Riga okazos jam BET-41. Bonvenon en nian BET-41 !

Ĉu vi sciis ... / Wist je dat...

- ☆ Elefantoj flaras aliajn elefantojn ĝis distanco de 5 km.
- ☆ Slechts 20% van de Sahara uit zand bestaat, de rest is rots, steenpuin en grind.
- ☆ Golfejo en seka lando kiel Kenia ĉiutage uzas ĉirkaŭ 2,3 milionojn da litroj da akvo. Tio egalas al la akvouzo de mezgranda Kenia urbo.
- ☆ Tijdens het tandenpoetsen met de kraan open je maar liefst 5 liter water verbruikt, en met een beker maar ¼ liter.
- ☆ Ĉiujare nederlandano trinkas ĉirkaŭ 142 litrojn da kafo.
- ☆ 45 cm de gemiddelde tonglengte is van een giraf. (lik lik ☺ slurp, slurp)
- ☆ Formiko enspiras nur unu fojon en 1 ĝxis 2 minutoj.



90-a Universala kongreso de Esperanto **Vilnius - 2005**

Malkovru la centron de Eŭropo !

En la komenco de la 21-a jarcento estus naiva intenco rakonti pri geografiaj konoj de la tero. Tamen kun la konkero de ambaŭ polusoj kaj malapero de lastaj blankaj makuloj sur la mapo de la mondo, historio de geografiaj malkovroj ne finiĝis.

Provu mem! Se vi strekos vertikalan linion ekde la plej norda punkto en Norvegio ĝis Grekio sude de Eŭropo kaj la horizontalan- ekde Irlando ĝis Uralo, en ilia krucpunkto vi trovos Vilnius.

Ĉu vi jam vizitis tiun loko?
Aŭ almenaŭ aŭdis pri ĝi? Ĝi ja estas centro de Eŭropo.
En 1989 Nacia Geografia Instituto de Francio malkovris, ke la geografiaj koordinatoj de Eŭropa centro estas 54 gradoj 55 minutoj da norda latitudo kaj 25 gradoj 19 minutoj da orienta longitudo kaj confirmis, ke tiu ĉi punkto situas je 24 km for de la ĉefurbo de Litova Respubliko Vilnius.



Vere tiu ĉi lando por antikvaj scienculoj P.C.Tacitus (98 jaroj post Kristo) kaj K. Ptolemaios (90-168 post Kristo) aspektis treege fora kaj mistera.
Ĝin vi trovos sur mapoj de antikvaj grekoj, ankaŭ de araba kartografisto de la 12-a jarcento el Idrisio, sur atlaso de flandra scienculo G.Mercatorem (1512-1594) eldonita en 1595, sur mapoj de svedaj, rusaj, francaj, polaj, germana militinvadoj (1500-1814). Vojaĝantoj, diplomatoj de la 19-a jarcento en siaj vojaĝmemoroj prezentis multajn informojn pri Litovio.
En la 19-a jarcento Litovio por Eŭropa komunumo daŭre restis mistera, aloga lando, riĉa je fantastaj kaj romantikaj aventuroj.

Hodiaŭ estas komenco de la 21-a jarcento. Eŭropo estas traveturita ĉiudirekten. Tamen en ĉiu vizitita loko restas malkonataj detaloj.

Malkovru centron de Eŭropo !

Donacu por vi mem kaj aliaj tion, kion vi ankoraŭ ne konas.

El Litova Turisma Informbroŝuro

Litova Lingvo

Vera Valentaite - Litovio

Statistiko.

Ĉirkaŭ 3,5 mln. homoj parolas la litovan kiel la unuan lingvon. Ĉirkaŭ 3 mln. el ili loĝas en Litovio (90% de la landa loĝantaro), dum aliaj 500 000 — eksterlande. En Usono estas ĉ. 300 000 litov-parolantoj, en Pollando 70 000, en Rusio 67 000, en Brazilio 40 000, en Argentino 35 000, en Kanado 14 000, en Britio 12 000 kaj po 10 000 en Kazahio kaj Belorusio.



Historio.

En la XV-a kaj XVI-a jarcentoj oni emis klarigi devenon de la litova, referencante al romianoj. Kaj kvankam la referencoj estis legendecaj, on eĉ provis trovi por ili taŭgajn ekzemplojn.

Nur en la XIX-a jarcento, kiam aperis la kompara lingvistiko, oni donis al la litova lingvo ĝian nunan lokon en la sistemo, en la hindeŭropa familio. En tiu ĉi familio ĝi havas lokon specialan, ĉar ĝi konservis aparte multajn ecojn de la iama hindeŭropa pralingvo kaj estas unu el la plej arkaikaj membroj de siaj familio kaj sone, kaj morfologie.

La litova estas konsiderata kiel la plej maljuna parolata hind-eŭropa lingvo.

Ĝi konservas multajn gramatikajn formojn, kiuj estas konataj nur en jam delonge mortintaj hind-eŭropaj lingvoj. La litova estas la plej proksima al la pra-hind-eŭropa lingvo.

Ĝi baziĝas sur la pra-balta lingvo, kiu estis parolata 2500 jarojn antaŭe kaj kiu ĉ. la jaro 300 a. K. disfalis je du branĉoj: la okcident-balta kaj la orient-balta. La litova apartenas al la orient-baltaj lingvoj, el kiuj la alia estas la latva.

La litova lingvo havas du ĉefaj dialektoj: Aŭkštajĉia (Aukštaičių, altlanda litova) kaj Ĵemajĉia (Samogitia, Žemaičių, malaltlanda litova).

La norma lingvo estas bazata je la okcidenta aukštajĉia dialekto. Komprenebleco inter la aukštajĉia kaj jemajĉia dialektoj estas konsiderata kiel malfacila por la plejparto de litovoj.



Malgraŭ la longega parola tradicio, ĝis la 16a jarcento ne aperis skribaj dokumentoj en la litova. La lingvoj uzataj de la litova regno (establita en 1267 per kronado de reĝo Mindaugas) estis la latina por internaj dokumentoj kaj la malnov-belarusa por la eksteraj rilatoj.

La unue konata litovlingva skribaĵo venas el himna traduko en 1545. Publikiĝintaj libroj en la litova lingvo estas konataj ekde 1547, sed la nivelo de legkapableco inter Litovoj estis malalta dum la 16-a ĝis la 18-a jarcento kaj libroj ne estis facile disponeblaj.

La unuaj tekstoj en la litova estis kristanaj tekstoj, kiujn presis katolika eklezio, kiuj devigis ekuzi la litovan anstataŭ la pola aŭ la latina por rezisti la kreskantan influon de reformismo. Je tiu tempo Litovio estis unuiĝinta kun Pollando, kaj la litova nobelaro parolis escepte en la pola lingvo, dum parolado en la litova estis fakte signo de malklereco. Nur kampanoj en vilaĝoj kaj la plej malriĉaj urbaj tavoloj uzis la litovan.

En la 17a jc. estis eldonitaj kelkaj libroj, ankaŭ gramatikoj kaj vortaroj de la litova, sed tio estis nur unuopaj provoj establi la litovan literaturon, dum ĝenerale la lingvo pli kaj pli estis subpremata de la pola.

Fine de la 18a jc. Litovio iĝis parto de Rusia Imperio. Komence de la 19a jc. la lingvo renaskiĝis dank' al la kresko de la ideo pri nacia renaskiĝo, sed la carisma politiko de rusigo kaj subpremo estis pli forta.

La legkapablo en Litovio plialtiĝegis dum la 19-a jarcento, malgraŭ viktimitigo, farata de rusaj aŭtoritatistoj (kiu estis la plej grava post la subpremo de la Januara Ribelo, en 1864 ĝis 1904, kiam rusaj oficialuloj malpermesis ian publikan paroladon de la litova lingvo kaj la uzadon de la latina alfabeto por skribaĵoj).

Pro tiu ĉi malpermeso oni presis litovajn librojn eksterlande (en Germanujo) kaj sekve kontrabandis ilin al Litovio. Ĝuste tial la vorto „knygneŝys” (libroportisto), havas en Litovio tre specifan signifon kaj koncernas „batalanton por litova lingvo kaj presita vorto”.

Ankaŭ la unua lernolibro de E por litovoj estis eldonata en Germanujo en Tilsit, verkita de A. Dambrauskas (Dombrovski) en 1899, kiu lernis la lingvon jam en 1887. Sed ankaŭ tiu ĉi verketo ne povis esti disvastigata.

La kaŝa libroportado estis danĝera. La nunaj historiistoj kalkulis ĝis nun preskaŭ tri mil homojn punitajn pro tiu ĉi aktivado. Sed tamen ĝi donis rezultojn.

„Ĉar elementa klerigo ne estis tiutempe deviga, gepatroj ne emis sendi siajn infanojn al rusaj lernejoj. Ekzemple en Kaŭna gubernio nur 6,8% da infanoj vizitis ŝtatajn lernejojn (...) Tamen en 1897 la procento da homoj scipovantaj legi kaj skribi estis en Kaŭna gubernio 54,38%”.

Jen kiel gravan laboron faris homoj, kiuj ofte mem ne havis necesan klarecon. Historiistoj notis, ke preskaŭ 80 procentoj da homoj punitaj pro disvastigado de litovaj presajoj estis simplaj kampanoj. Bonŝance tiu ĉi sombra periodo de

libropersekutoj estas jam tre fora.

Kiam la malpermeso estis forigita en la jaro 1904, komenciĝis renaskiĝo de la lingvo kaj literaturo. En la jaro 1918, kiam Litovio iĝis memstara ŝtato, la litova iĝis oficiala lingvo de la nova ŝtato, sed tiam ne ekzistis unueca ortografio. Ĉiuj publikaĵoj aperadis en la denaska dialekto de la verkinto.

Tamen la lingvistoj penis krei laŭnorman skriban litovan lingvon. Speciale multe agis ĉi-terene Jonas Jablonskis, kiu ofte estas nomata „patro de la litova lingvo”. Tiel, per gramatiklibroj kaj vortaroj, formiĝis la ĝenerala skriba litova lingvo.

La unua litova respubliko ekzistis ĝis la jaro 1940, kiam ĝi estis devigita proklami sin parto de Soveta Respublikaro. En la sama momento komenciĝis rusiga politiko, kaj severa soveta cenzurado instaligis ĉe la litova gazetararo. Dum tiuj cenzuradoj multaj litovaj libroj neniigis.

Komenciĝis senprokasta deviga instruado de la rusa en la mezlernejoj. Multaj rusaj vortoj eniris la lingvon, ĉefe nomoj de bolŝevikaj realaĵoj.

Post mallonga tempo, en 1941 la landon invadis germania armeo. Komence multaj litovoj rigardis la germanojn kiel siajn savantojn, sed tre rapide evidentiĝis, ke nur unu subpremado ŝanĝis la alian.


Dum la germana okupado preskaŭ ĉiuj litovaj judoj estis ekstermitaj.

Post la foriro de la germanoj multaj litovoj esperis, ke ilia lando finfine akiros sian sendependecon, sed Sovetunio denove okupis Litovion kaj denove rekomenciĝis la subpremado. La litovaj gerilanoj proksimume ok jarojn batalis kontraŭ la sovetoj ĝis la malvenko. Dum la militoj kaj okupadoj Litovio perdis trionon de sia loĝantaro.

Homoj el oriento ekloĝis en la lando, sed ne ĉiuj respektis la lokajn kulturajn kaj lingvajn. Multaj litovoj suferis masivan stalinisman represadon per deportado al Siberio kaj Kazahio en koncentrejojn.

La rusa lingvo prenis la lokon de la litova en la mastrumado kaj en la regado de la lando. Estis ŝanĝitaj ankaŭ kelkaj geografiaj nomoj. La uzado de la litova draste malgrandiĝis kaj litovoj iĝis dulingva nacio.

Litovio proklamis sian sendependecon en la jaro 1990, kaj nun la sola oficiala lingvo en ĉiuj sferoj estas la litova.



Nunaj problemoj.

La litova lingvo estas unika, ĉar facilas laŭ sufiksoj kompreni, ĉu iu estas viro aŭ

virino kaj ĉu virino estas fraŭlina aŭ edziniĝinta.

Ekzemple virinoj, kies familiaj nomoj finiĝas per *-aitė* aŭ *-ytė*, estas fraŭlinoj; tiuj kun finaĵo *-ienė* estas edziniĝintaj.

Tiel estas en Litovio jam de pratempoj, sed nun virinoj sentas diskriminacion pro nomoj senvualigantaj ilian familian situacion.

Pro tio feministinoj en Litovio plendis ĉe mediaciisto pri virinaj kaj viraj egalrajtoj. Finfine tiu proponis ŝanĝi regulojn rilate la litovan lingvon; komisiono nun esploras pri lingva formo, kiun ino povas elekti mem – ĉu fraŭlinan aŭ edziniĝintan aŭ neŭtralan kaj ne indikantan la familian situacion.

La kontrolistino – kun familia nomo Burnekienė – diris, ke ŝi neniam dubis pri sia nomo kaj ne intencas ĝin ŝanĝi. Tamen ŝi pretis kontraŭstari tiujn, kiuj akuzas ŝin forigi unikaĵon de la litova lingvo. Ŝi diris, ke ĉiu rajtas esti libera elekti nomformon, kion ĝis nun la litova lingvo ne permesas.

Pluraj virinoj, kiuj sentas sin diskriminaciataj pro sia nomo, emis akiri virforman nomon, t.e. kun finaĵo *-as*. Fari tion antaŭe en Litovio ege malfacilis. Solvo estis edziniĝi eksterlande kaj en Litovio registri jam okazintan fakton. Tio nun ne plu necesos: ĉiu, kiu sentas sin ĝenata pro sia nomo, povos libere ĝin ŝanĝi.

Anglalingva Ekspansio.

Pri la pureco de la lingvo zorgas Ŝtata Komisiono pri la litova lingvo. La litova lingvo ne emas adopti fremdajn vortojn.

Kompreneble en ĝi ekzistas internaciaj vortoj kiel *advokatas*, *autobusas* kaj *telefonas*”. Por multaj terminoj lingvistoj trovas aŭ kreas litovajn vortojn. Ekz., ekzistas *futbolas*, sed basketbalo nomiĝas *krepšinis* kaj handbalo estas *rankinis*. La Ŝtata Komisiono pri la litova lingvo strikte kontrolas la lingvon de parolistoj kaj ĵurnalistoj.


Tamen ekspansio de la angla lingvo estas forte sentata. Post la membriĝo en EU (Litovio aliĝis al Eŭropa Unio en la jaro 2004), la influo de la angla plifortiĝas, kvankam oficialaj instancoj deklaras pretecon defendi rajtojn de la litova lingvo.

Hodiaŭ por la litova la granda minaco fariĝas la lingvo de George Bush, Tony Blair, CNN, MTV kaj BBC. Spite al lingvaj konsiloj, lingvaj puristoj timas, ke la litova perdas la batalon kontraŭ la angla. Dum la pasinta jardeko, registaro entreprenis agojn kontraŭ la uzo de la rusa lingvo.

Hodiaŭ, politikistoj pli kaj pli konscias ke la angla, forte apogita per la televido, kinejo, muziko, scienco, interreto, kaj ankaŭ per la eniro en la Eŭropan Union, jam ĝisfunde penetras en litovan lingvon.

Do, la estonteco de la litova ne estas tre facila, sed mi kredas, ke ĝi ekzistos ankoraŭ longe.

Premiero: tutnova libro pri la litova lingvo



Ege mankis libro en Esperanto por profunde ekkoni la litovan lingvon. Tiun mankon forigis Marc Vanden Bempt, kiu en la pasinta duonjaro verkis ampleksan libron pri ĝi.

La libro detale klarigas la gramatikajn ecojn de tiu lingvo, montras la similecojn kaj diferencojn kun Esperanto, donas multajn ekzemplojn, enhavas ampleksan teman vortaron kaj ekzemplajn tekstojn. Kompletigas ĝin slango, proverboj, onomatopoej kaj similaj pli amuzaj eroj.

Litova lingvo - per Esperanto-okuloj

Unika kaj kompleta superrigardo pri la litova lingvo - ĝia prononcado, ĝia gramatiko, ĝia vortaro

Antaŭmendu tuj: **-40%** por ĉiuj mendoj kiuj alvenas **ĝis la 31.3.2005** ĉe esperanto3000@esperanto.be aŭ ĉe la aŭtoro marc@esperanto.be

Normala prezo: EUR 16,50 + realaj sendokostoj
Antaŭmendoj: EUR 9,90 + realaj sendokostoj (ĝis la 31.3.2005)

Marc Vanden Bempt
 Flandra Esperanto-Ligo & Esperanto 3000, Belgio. Grandformata A4, ± 185-paĝa

La libro nun estas ĉe la kontrollegantoj, tri gelitovoj kiuj elsarkas la lastajn erarojn. Fine de februaro ĝi iros al la eldonejo, en tiu ĉi momento ĝi estas **nia propra eldono**

Nemalhavebla libro se vi planas viziti la Universalan Kongreson en Vilnius!
 Kaj ankaŭ se vi restos hejme, nepre konatigu kun ĉi tiu interesa membro de la

hindeŭropa Balta lingvogrupo.

Esperanto 3000 proponas al vi **nun** akiri ĝin je tre favoraj kondiĉoj, kiuj validas por ĉiuj mendoj kiuj alvenas ĝis la fino de marto 2005 ĉe la indikitaj adresoj.



Oh, Rajdis, Rajdis

Oh, rajdis, rajdis longe mi.
 Oh, rajdis, rajdis longe mi.
 Al bien' veninte, al bien' veninte,
 al bien' veninte haltis mi.

Ligis mi ĉevalon al baril'
 Ligis mi ĉevalon al baril'
 Ĉe verdanta ruta, ĉe verdanta ruta,
 ĉe verdanta ruta ĝardenet'.

Skuis sian kapon la ĉeval'
 Skuis sian kapon la ĉeval'
 Ve, kaj aĉe tretis, ve, ka aĉe tretis?
 Ve, kaj aĉe tretis verdajn rutojn ĝi.

Ploras elirinta knabinet' Ploras elirinta knabinet'
 Pro la verdaj rutoj, pro la verdaj rutoj
 Pro la verdaj rutoj, kiujn tretis ĝi.

Ĉit ! Ne ploru triste, knabinet' Ĉit ! Ne ploru triste, knabinet' :
 Ĉevaleton mian, ĉevaleton mian, ĉevaleton mian donos mi al mi.

Ne bezonas la ĉevalon mi, ne bezonas ĉevalon mi,
 Tute ne bezonas, tute ne bezonas, tute ne bezonas la ĉevalon mi.

Ĉit ! Knabin', ne ploru pro ĉagren'
 Ĉit ! Knabin', ne ploru pro ĉagren'
 Mi al vi donacos, mi al vi donacos, mi al vo donacos ringon el la or'

Pripensoj

Utopia

Mi pripensis ke eble fojon mi verku peceton per versoj, kvazaŭ poemo. Sed tiam mi pripensis ke verŝajne neniuj interesiĝus pri tio. Kvankam mi samtempe pripensis ke poezio ankaŭ en Esperanto estas sufiĉe ofte verkata kaj eĉ legata, eble do tamen iuj interesiĝas? Tiam denove mi pripensis ke ne, ja ne sufiĉas transformi tekston en versojn por nomi ĝin poezio. Maksimume ĝi iĝus per-versa teksto eĉ se ne nepre perversa.

Mi pripensis ke mi tute ne kapablas verki veran poezion. Kontraŭ tio mi pripensis la bonan argumenton ke fakte mi ne povas scii tion, ja neniam mi vere provis tion verki. Ĉu eblas aserti ke ion oni ne kapablas se oni eĉ neniam provis ĝin fari?


Eĉ ĵus nun mi pripensas ke oni eĉ ne povas aserti ke ion oni jes kapablas nur ĉar oni jam faris ĝin. Mi jam de jaroj verkas ĉi tiuj pecetojn unupagajn kaj ĝin nun mi ne scias ĉu mi kapablas tion fari. Jes, mi kapablas plenigi paĝon, tion certe. Sed ĉu iu legas ĝin? Mi ne scias, la pecetoj aperas en la revuo de Esperanto

3000 kaj poste mi maloftege ankoraŭ aŭdas pri ili reagojn.

Unu fojon jes, unu peceton mi revidis poste transprenitan en alia revuo. Neniu tion petis, en la revuo ne estas indiko pri rajto transpreni, do ĉu protesti? Nu, mi pripensis ke por mi almenaŭ tio estas konsolo ke almenaŭ iu legis ĝin kaj opiniis ĝin inda aperi duan fojon. Mi ne protestis.

Mi pripensas ankaŭ nun ke estus bone se ĉiu leganto kiu atingas ĉi tiujn liniojn sendu etan mesaĝeton al la retadreso de Esperanto 3000 por simple sciigi ke li aŭ ŝi legis ĝin ĉi tie. Ĉu tro intima (ne in-tima) demando? Mi scivolas ĉu alvenos iuj. Kaj se ne? Tiam mi konsolos min per la ideo ke neniuj pripensis serĉi tiun adreson en la dua paĝo de la revuo. Aliflanke, nun mi pripensas ke estis stulte tion ĉi tie mencii, nun ĉiuj scias kie ĝin sekvi kaj tiu konsolo ne plu funkcios.

Pripensu ke jen alvenas la fino de la paĝo, restas ankoraŭ tiom da por pripensi. Feliĉe mi pripensas ke sekvos multaj antaŭlastaj paĝoj en ĉi tiu revuo. Se vi volas ilin plulegi, kara leganto, nepre pripensu tuj remembrigi! ☺ ■



België – Belgique
P.B.
3000 Leuven 1
2/2668

Esperanto 3000

Tweemaandelijks tijdschrift

Februaro 2005

V.U. Koen Vanhoof, Milsestraat 26, 3053 Haasrode

jr. 26 nr. 1

Dumonata revuo

Februari 2005

Afgifte : 3000 Leuven 1

En ĉi tiu numero :

S.I.A. 2005: SIA-cadeau

Magdeburgo en Germanio

Avo biciklas ĉirkaŭ la mondo

Iom pri

Kiel fariĝi membro

BET 41

Ĉu vi scias?

Malkovru la centron de Eŭropo

Litova lingvo & nova libro


Litova Popolkanto

Utopia



Tijd om je lidmaatschap
te vernieuwen!
Spaar ons een
herinneringsbrief 😊

't Kasteeltje, Wijgmaal



Programma Esperanto 3000 vzw

Alle activiteiten vinden plaats in het cultureel centrum 'Romaanse Poort',
Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, tenzij anders vermeld.

Het programma van de Vespero 3000 begint om 20 uur, welkom vanaf
19.30 uur

Woensdag 13/04/05	Vespero 3000: Algemene ledenvergadering. Bert Boon prezentas videofilmon "la naskiĝo de lingvo", unika dokumento nederlandlingve subtitolita (ne en Esperanto), kun komentoj	19.30 - 21.00 21.00-22.00
Woensdag 27/04/05	Vervolgcurus Esperanto, conversatiecurus met grammaticagedeelte door Marc Vanden Bempt	20.00 - 22.00
Woensdag 11/05/05	Vespero 3000: Tabloludoj en Esperanto (skrablo kaj aliaj)	19.30 - 22.00
Woensdag 25/05/05	Vervolgcurus Esperanto, conversatiecurus met grammaticagedeelte door Marc Vanden Bempt	20.00 - 22.00
Woensdag 08/06/05	Vespero 3000: programo en la sekva numero	19.30 - 22.00
	Einde van het voorjaarsprogramma	

ESPERANTO 3000

revuo de Esperanto 3000 vzw Leuven,
asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo
aperas 6-foje en la jaro

**Kontaktadreso /
Contactadressen**

esperanto3000@esperanto.be
Baron Descampslaan 77, 3018 Wijgmaal
Roger Goris (sekr.), Rue Ménada 44, 1320
Hamme-Mille ☎ 010 860 112;
r.goris@versateladsl.be
Frans Croon (voorz.), Bukenstraat 16,
1910 Kampenhout-Buken ☎ 016 655 944;
frans.croon@kampenhout.be

**Membreco / Lidmaatschap
E.3000**

membro/lid Eo3000 + FEL = € 20,00 =
Eo3000, Horizon-taal, JEN (ĝis 29-jara)
nieuwsbrief = gratis: zie onze webstek
<http://www.esperanto.be/esperanto3000/>

**Membreco / Lidmaatschap
UEA**

membro/lid UEA = € 9,00
same/idem + jarlibro = € 22,00
same/idem + Esperanto € 55,00

**Abonoj / Abonnementen
(2005)**

Esperanto 3000 = € 10,00 (nl/co)
(alleen voor FEL-leden via andere clubs)
Horizon-taal = € 20,00 (nl/co)
Monato = € 44,00, por ĉiuj (eo)
Ret-Monato = € 26,40, por ĉiuj (eo)
Agenda "La Jaro" € 5,00 (eo)
Enigmo € 4,50 por 2 numeroj (eo)
Vertikale = € 5,00, por aktivuloj (eo)
Esperanto (UEA) = € 35,00 (eo)
Juna Amiko = € 14,00, por infanoj (eo)
Ret-info = € 21,00 (eo)
La gazeto (OSIEK) = € 27,00 (eo)
La Kancerkliniko = € 22,00 (eo)
Kontakto = € 21,00, komencantoj (eo)
Komencanto = € 15,00, komencantoj (eo)

Reklamo / Reclame

1 p. € 9, 1/2 p. € 5, 1/4 p. € 3, 1/8 p. € 2
5x la prezo: tuta jaro / 5x de prijs: heel jaar

Generale / Allerlei

Pagante bonvolu klare indiki la deziratajn
kategoriojn / Gelieve bij betaling duidelijk

De la (provizora) redakcio

Vrienden, vriendschap... wat
zouden wij zonder zijn?

SIA is voor Esperanto 3000 nog
steeds **de** gelegenheid om eens
gezellig samen te komen.
Onlangs was het weer zover....

Gezellig babbelen en intussen
smullen van verschillende
witloofgerechten, daarna de
deskundige uitleg van Frans Croon
over witloof tijdens ons bezoek van
het witloofmuseum.

In het bijhorend winkeltje waren de
rekken met witloofconfituur
praktisch leeg na ons bezoek ☺

Nog een lekker potje koffie (of was
het toch die frisse pint?) en na veel
kletsen terug naar huis.

Wanneer was dat toch weer, die
volgende SIA?

De redactie.

Kunlaboris, alfabete:

Helena Van der Steen & Marc
Vanden Bempt (provizoraj
redaktoroj), Nele Hiers (nalezen), la
aŭtoroj (vidu ĉe la artikoloj).

de gewenste categorieën aan te geven.
 Konto/rekening : 734-3331944-03 de/ van
 Esperanto 3000 vzw, 3000 Leuven
 Pri tekstoj nur la sendintoj respondecas / Voor
 teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk

Het woord is aan de voorzitter: Zo vrij...

Het weer verraadt het nog niet; maar het lengen van de dagen geeft toch aan dat lente en zomer in aantocht zijn. Het laatste weekeinde van deze maand is het al Pasen, schakelen we over op het zomerruur, en vindt Bulonjo 2005 plaats. Verder komen er nog aan: het 90ste UK in Vilnius in juli, de Osiek-conferentie in Griekenland, enz.

Vergis je niet in de kracht van woorden! De drie lettertjes (enz.) staan voor een reeks andere activiteiten die het een tachtigjarige Franse dame mogelijk maakten om “na haar pensioen maar vier jaren thuis geweest te zijn”.

Een hele boterham dus; en mogelijk wat ‘des Guten zuviel’ maar men kan er overal “im guten” (=vriendschappelijk) bij zijn. FLEJA geeft er een chronologisch overzicht van op

<<http://users.telenet.be/esperanto/fleja/aktivecoj.htm>>.

Intussen heeft ook de voorjaarse Algemene Vergadering van FEL plaatsgevonden. De toestand van FEL, na het wegvallen van de subsidies van de Vlaamse Gemeenschap, heeft al aanleiding gegeven tot alarmerende geruchten. Zo erg is het echter nog niet. Met de bestaande reserves kan FEL het nog enkele jaren uitzingen, maar geen eeuwigheid. Dat geeft wel de kans om na te denken en bij te sturen en daardoor het instituut FEL een toekomstige solide basis te geven. Het is goed ervoor te zorgen dat een instituut een eigen onafhankelijk draagvlak heeft en niet té afhankelijk is van subsidies. Subsidies maken het in de praktijk soms nog ingewikkelder om saneringen door te voeren, bijvoorbeeld omdat door de sanering ook de basis van subsidiëring kan wegvallen waardoor het effect onbeduidend of zelfs negatief wordt!

Toch kan er een en ander gebeuren. Zo is er Monats. Met de publicatie gaan vaste kosten gepaard die niet verhogen als de oplage stijgt. Elk meer verkocht nummer is dan ook grotendeels zuivere winst ten voordele van FEL. Je bent toch al geabonneerd? Zoniet: doen! Het is een win-win-situatie voor jou en voor FEL! Monats richt zich ook naar mensen in de derde wereld voor wie het eigenlijk onbetaalbaar is. Met een gift aan het Fonduso Monats creëer je weer een win-win-situatie!

In de toekomst zal FEL waar mogelijk ook meer een beroep (moeten) doen op vrijwilligers (een vrijwilliger is “iemand die zo vrij is iets te willen doen”) om bepaalde taken uit te voeren. Ben je “zo vrij” dan ben je zeker welkom... en anders ook natuurlijk!

Frans CROON, voorzitter

Ĉu japana manĝaĵo estas salubra ?



En Eŭropo oni diras, ke japana manĝaĵo estas salubra, japanoj estas sveltaj, japanoj vivas pli longe k.t.p. Do nun ni vidu la faktojn.

Ĝis la 15a jarcento (Muromachi-epoko) la regantoj kaj nobeloj de Kioto havis la bufedon, tie oni metis en la mezo grandan ujon kun rizo, kaj ĉirkaŭe malgrandajn ujojn kun kuiritaj-, sekigitaj-, aŭ saligitaj-legomoj, fiŝoj aŭ aliaj.

Tio estis la origina formo de japana manĝado.

Oni pensas ke rizo okupis gravan pozicion en japana manĝado, sed ĉiuj povis manĝi rizon nur post la 2a mondmilito (oni manĝis ankaŭ tritikojn, dolĉajn terpomojn aŭ aliajn grajnoj).

Fiŝpastrojn oni inventis la 15an jarcenton. Sojasaŭco aperis ankaŭ en la 15a jarcento, disvastiĝis la 17an jarcenton. La uzadon de oleo plimultiĝis la 17an jarcenton, tiam ĉina popola manĝaĵo. Tempura k.t.p iĝis moda. Tiuj tri disvolviĝoj en la 17a jarcento evoluigis japanan manĝaĵon multflanke.

La 16-an (1543: Portugala misiono) jarcenton alvenis portugalaĵoj, alportis la kutimon manĝi viandojn, tiel oni komencis manĝi besto-viandojn (bovo, porko), sed la 17an jarcenton la registaro malpermesis manĝi besto-viandojn (oficiale), escepte de kokinoj kaj ovojn. La 19an jarcenton, post la registaro-ŝanĝo kaj pro relegia libereco viando-manĝado (Sukiyaki, Tonkatsu, Kroketto) disvastiĝis rapide en tuta lando.

Oni diras ke nuntempa japana manĝaĵo estas tre bone balanciita kaj nutriĉa de karbonhidrato, proteino, graso, diversaj vitaminoj, mineraloj kaj fibroj.

Ni uzas diversajn materialojn por manĝado, ĉefe vegetaloleon kaj malmulte da bestaj grasoj. Oni kuiras malgrandan kvanton por unu plado, sed diversajn pladojn por unu manĝado. Tiel oni povas preni multspecajn materialojn. Anstataŭ postmanĝon, ni manĝas fruktojn (pro tio: malpli da sukero-konsumo). Oni kuiras pli mallonge ol en Eŭropo por ne multe perdi mineralojn, vitaminojn aŭ fibrojn (pro tio: konsumo de pli da mineraloj, vitaminoj).

Soja-produktojn ni uzas multajn, ĝi enhavas multe da proteino. Ankaŭ ni manĝas multajn marherbojn (algojn). Ili enhavas multan jodon, kaj ĝi aktivigas la funkcion de la tiroido. Krome ĝi estas senkaloria (pro tio: konsumo de malpli da kalorioj).

Diversaj radiko-legomoj ni prenas por kuirado. Oni diras ke radikaj legomoj havas multajn fibrojn, kiuj purigas la inteston kaj plifortigas la imunsistemon (kontraŭ la konstipiĝo, maljuniĝo de la intesto).


Konsumo de diversaj fiŝaĵoj helpas malaltigi la kvanton de malbona kolesterolo (LDL) kaj plialtigi la kvanton de la bona (HDL). Ni ofte manĝas kareon, kiu efikas kontraŭ la Alzheimer-malsano.

Do la japana manĝokutimo havas multajn pozitivajn punktojn, tamen ekzistas ankaŭ negativaj punktoj. Ekzemple tutblanka rizo aŭ pano ne enhavas multe da mineraloj kaj vitaminoj, manĝado de malmulte da lakto-produktoj kaŭzas mankon de kalcio. Peklitaj legomoj konsumigas tro da salo, kaj oni haviĝas altan sangopremon.

Ĉefa manĝaĵo estas vespere, multe da alkohol-konsumo kaŭzas stomakkanceron aŭ diabeton.

La granda problemo en moderna mondo (japana kaj tutmonda) estas troa konsumo de pakita preparita manĝo, kaj malmulta aktiveco (dikaj infanoj).

La manĝokutimo de japanoj en lastaj 100 jaroj ŝanĝiĝis multe, proksimiĝis rapide al la eŭropeca (en bona kaj malbona senco). Sed samtempe ekzistas ankoraŭ niaj tradiciaj manĝoj. Tiu miksaĵo de japana kun internacia manĝokulturo igas nian manĝokulturon tre riĉa kaj salubra. Sed ni ankoraŭ povas pli bonigi ĝin.



Mariko Aoshima



Viro eniras bestovendejon.

Li diras: "Mi petas tricent blatojn* de vi."

Diras la vendisto: "Pro kio do vi bezonas tricent blatojn??"

Diras la viro: "Mi transloĝiĝos: mi devos lasi mian malnovan domon en la originala stato!"

**blato: kakkerlak*

Japanana kuirkurseto

Antaŭ preparado por supi

MK	=	manĝo-kulero
TK	=	te-kulero
Sojasaŭco	=	sala fermentita saŭco el sojo
Dashi	=	buljono el bonito-flokoj
Mirin	=	dolĉa rizo-vino por kuiri
Kampyo	=	sekigita kukurbo (Yugao)-strio
Nori	=	sekigita malgranda mola algo

Supi-rizo



350gr japana (rondforma) rizo

ĉa . 675 ml akvo (10% malpli ol « normala » rizokuirado)

Por algustigi : 60ml da rizo-vinagro, 1 ¼ TK da salo, 1 ¼ MK da sukero.

(kvanto estas por 800gr da preta suŝi-rizo)

Dashi

½ TK Dashi-pulvero en 200ml kuirita akvo

Dika Omleto

4 ovoĵ kun 2 MK da Dashi-buljono, 2 MK da sukero, 1 MK da maizfaruno, iom da salo, 1 TK da oleo por rosti.

☆ Batmiksi per forko ĉiun ingrediencojn.

☆ En unu pato ŝmiru oleon.

☆ De ovo-miksaĝo metu iomete en la paton, por ke la pato-fundo estu

kovrita.

- ☆ Kiam ĝi kuirigos, rulu ĝin en la pato.
- ☆ Enverŝu denove unu kuleron da ovo-miksaĝo en la pato, lasu iom da tempo ĝis ĝi kuirigos, tiam rulu jam rulitan omleton supren.
- ☆ Tranĉu pretan omleton por 1cm ĉ 1 cm dike longe strie .

Maki-Supi (Supirulo laŭ tradicia stilo)

- 800 gr da preta Suŝi-rizo
- 40 gr da Kampĝo (sekigita kukurbo-strioj) (a)
- 6 sekigitaj Shiitake-fungoj (b)
- 100 gr da karotoj (b)
- 8 strioj de dika omleto
- 100 gr da kukumo (3/4)
- 4 Nori-folioj



- ☆ Trempadu sekigitajn Shiitake-fungojn 20 minutojn en 100ml da ĵarma akvo. Strie tranĉu, **gardu la akvon!!**
- ☆ Preparu (a) kaj (b) kune 300ml da Dashi.
- ☆ Malsekigu Kampyo kun akvo kun salo, kune lavu ĝis ĝi iĝos mola. Lavu ĝin per pura akvo. Lasu ĝin dum 20 minutoj en varma akvo, kuiru kun 200 ml da Dashi, 2 MK da sukero, 2 MK da soja-sauĉo, 1 MK da Mirin en unu poto, ĝis preskaŭ ne plu estos likvidaĝo. Tranĉu kuiritan Kampyo-strion en 20cm longe.
- ☆ Tranĉu karotojn 1x1cm kvadrate, 20 cm longe.
- ☆ Kuiru trempadakvon de fungoj, 100ml da Dashi, fungojn, karotojn enmetu kaj 10 minutojn kuiru, likvidaĝon forverŝu.
- ☆ Tranĉu kukumon 1x1cm kvadrate, 20 cm longe.
- ☆ Suŝi rizo preparado
- ☆ Prenu 1 Nori-folio, metu ĝin sur rultapiŝeto, prenu iom da rizo, preplatigu ĝin (kovru la tutan folion) metu sur unu linio iom da tranĉitajn fungojn, unu strio da karoto, unu strio da omleto, unu strio da Kampyo, unu strio da kukomo
- ☆ Rulu la tutan en la Nori-folio kun firmeco.
- ☆ Tranĉu la rulo en pecoj de +/- 3 cm
- ☆ Manĝu kun iom da Sojasauĉo



Bonan apetiton.....

Ginsengo - la mirakla kuracplanto

Ekzistas diversaj ginsengoj. Ni nun legas pri la "vera", la korea ginsengo, kies scienca nomo estas *Panax ginseng* C. A. Meyer. La vorto "Panax" devenas el la greka lingvo kaj signifas ĉionkuracilo. En Koreio la ginsengo nomiĝas "insam".



Kiam oni vidas la planton oni ne imagas ĝian kuracpovon. Ĝia aspekto estas tre modesta kaj estas facile pretervidi ĝin. Ĝi kreskas ĝis 50 cm. Nature ĝi kreskas en la montara arbaro en diversaj partoj de Siberio, Ĉinio kaj Koreio. Ĉar oni pensis de jarmiloj, ke ginsengo plilongigas la vivon aŭ eĉ povus donaci eternan vivon, ĝi estis ĉiam valora kiel oro.

Nature kreskanta ginsengo pro tio estas malofta kaj oni jam antaŭ pli ol 1000 jaroj komencis en Koreio kultivi ĝin. La kultivado estas malfacila, ĉar la planto ne toleras venenon kaj sunon. La plej bona kvalito necesas la altecon de la mezmontaro.

La plej potenca parto de la planto estas la nevidebla: la radiko. Kvankam oni diras, ke ĝi povas fariĝi pli ol centjara, la kultivata ginsengo estas kutime maksimume sesjara. Sed tio plene sufiĉas por ricevi bonegan kuracilon.



La mirakla forto de la ginsengo devenas precipe de ĝiaj unikaj substancoj: specialaj saponinoj, kiujn oni nomas ginsenosidoj.

Oni jam trovis pli ol 30 da ginsenosidoj en la korea ginsengo. Ili aj ofte kontraŭaj efikoj multe konfuzas sciencistojn.

Sed ĝuste tiu ŝajna kontraŭago donas al ginsengo ĝian unikan efikon: ginsengo helpas al la korpo adaptiĝi al la neceso kaj bezono pro internaj kaj eksteraj incitoj. Ginsengo sukcesas altigi sangopremon, kiam ĝi estas tro malalta por la korpo, malaltigi ĝin, kiam ĝi estas tro alta. Simile estas pri hormonoj, sukero ktp.

Ginsengo do ne estas planto por kuraci iun certan malsanon. Ĝi estas universale efika. Tio estas ĝia unikeco. Tiel ĝi fariĝas la baza kuracilo por ĉiu homo.

Blanka kaj ruĝa ginsengoj

Ambaŭ devenas de la sama planto, sed oni diversmaniere traktas ilin post la rikolto. Antaŭ mil jaroj ginsengo estis la plej valora eksportvaro de Koreio. Tiutempe la transportado estis malfacila.

Dum la longa transportado en diversaj klimatoj la sekigitaj ginsengaj radikoj ofte difektiĝis pro humideco kaj ŝimfungoj. Tial koreoj inventis en la jaro 1080 la vaporumadon de la ginsengo. Dum pli ol 2 horoj oni vaporumas la freŝajn radikojn je temperaturo tre alta. Tiel ŝanĝiĝas multaj substancoj kaj la radiko ruĝiĝas. Tiel ĝi eltenis ankaŭ tre longan transportadon en malfacilaj kondiĉoj. Tiun manieron monopoligis la korea ŝtato ĝis 1997. Tiu monopolo kaŭzis altan prezon, sed ĝi garantiis ankaŭ bonan kvaliton.

Nuntempe tia konservado ne plu necesas. Ĝi detruas multajn valorajn ingrediencojn. Tial la blanka ginsengo estas preferinda, se ĝi havas la saman aĝon. Krome ĝi kostas multe malpli.

Aplikado de ginsengo

Post la rikolto en la frua aŭtuno oni ricevas en Koreio freŝan ginsengon en multaj formoj. La pli simplajn (malpli aĝajn) oni manĝas aŭ trinkas. El alia parto de la rikolto oni produktas la ruĝan ginsengon, el kiu ekzistas diversaj produktoj, ekzemple ekstrakto, pulvoro ktp. Alia parto fariĝas blankginsenga ekstrakto aŭ estas sekigita kaj alvenas kiel pulvoro, kapsuloj ktp.

La ekstrakto el blanka ginsengo estas la plej valora, ĉar ĝi plej bone konservas ĉiujn naturajn ingrediencojn de la ginsenga radiko.

Dozado de ginsengo



Pri tio estas grandaj diferencoj inter oriento kaj okcidento.

En la germana medikamenta libro (DAB) oni

rekomendas 1-2 gramojn tage. En Koreio oni uzas multe pli, kiel montras la oficiala ginseng-paĝo de Koreio (<http://www.insam.or.kr> en diversaj lingvoj).

El vidpunkto de naturkuracisto la dozo dependas de la farto de la homo. Se oni volas nur konservi sian sanon, sufiĉas la dozo de 1-2 gramoj da sekigita ginsengo. Se temas pri paciento, la dozo devas esti pli alta.

Tre multe profitas pacientoj, kiuj suferas je diabeto, menopaŭzo aŭ kancero. Kutime oni diras, ke pli aĝaj homoj plej multe profitas de la efiko de ginsengo. Sed ankaŭ infanoj tre aktivaj, kiujn oni nomas malsanaj pro manko de koncentriĝo, kiujn oni ofte traktas per kemiaj medikamentoj, multe profitas de ginsengo. Sed kiel supre skribite, ginsengo ne estas planto nur por certa malsano, sed baza kuracilo.

Oni diras, ke ginsengo estas altkosta. Tio estas vera. Sed se oni komparas la prezon de ginsengo kun tiu de kemia medikamento, oni rimarkas, ke la ginsengo estas pli malalkosta kaj certe multe pli bona, precipe ĉar ĝi ne havas kromefikojn.

Bonan ginsengon oni povas aĉeti ĉe www.ginseng-laden.de (nur en germana lingvo) aŭ dum Internacia Festivalo (www.internacia-festivalo.de) kaj kompreneble en Koreio.

Harald Schicke, germana naturkuracisto

Aldonaj bildoj



Maldekstre: la aŭtoro rikoltas ginsengon. En la maldekstra mano vi vidas la tutan planton kun radiko, tigo kaj folioj. En la dekstra mano troviĝas la rikoltilo, dupinta hakilo, per kiu oni singarde palpas la radikon kaj eltiras ĝin.

La laboro estas streĉa. Oni kaŭras sub la malaltaj tegmentoj, kiuj ŝirmas la plantojn kontraŭ la suno. Post la rikolto oni malkontruas la tegmentojn, ĉar oni dum pli ol ses jaroj ne plu uzas la kampon por ginsengo. Ĝi plene elĉerpis la nutraĵojn de la tero.

Harald kiel naturkuracisto konsilas al klientoj, ĉu kaj kiel uzi tiun unikan kuracilon. Pro siaj meritoj pri korea ginsengo li estis oficiale invitita en 2003 de la Korea ministerio pri agrikulturo partopreni la ginsengo-festivalon en la Korean urbo Gumsan.

Dekstre: viskoza ekstrakto de ginsenga radiko. Post la rikolto oni lavas kaj dispecetigas la radikojn kaj metas ilin en ekstraktilon, kie oni je malata temperaturo kaj per premo singarde ekstraktas.



Tiel plej bone konserviĝas la valoraj ingrediencoj de la ginsenga radiko.

Ottignies - Louvain-la-Neuve

Estimataj membroj de Esperanto 3000, Sabaton la 30-an de Aprilo 2005 la juna Esperanto-Grupo de Ottignies-Louvain-la-Neuve (nomata "Kvinfolio") organizos esperantan serĉpromenadon en Loveno-la-Nova.

La promenado temos pri skulpturo kaj arkitekturo.

Poste, ĉirkaŭ 18 h, okazos vespermanĝo kaj magio esperante prezentata de Michel Feys, fizikisto, meteorologo kaj profesia magiisto.

Estos invititaj la membroj kaj simpatiantoj de Kvinfolio, kaj lamembroj de Lovena Esperanto 3000 ĉar ni deziras kreskigi rilatojn inter niaj malsamlingvaj sed proksimaj esperantaj grupoj. La kostoj (inkluzive de promenado, manĝo kaj magio) atingos 10 Eŭrojn popersone.

Bonvolu sciigi al mi vian eventualan intereson pri nia invito.

Korajn salutojn,

Yves Eeckhout, PhD, Prof.emer.

Prezidanto de KVINFOLIO,

ESPERANTO GRUPO de OTTIGNIES-LLN (☎ 32-(0)10-45 01 95)

Avenue de l'Espinette, 38 ; B-1348 LOUVAIN-LA-NEUVE ; BELGIO



Internacia konkurso : MIA KRIPŬ

Povas partopreni geknaboj kun aĝo de 6 al 14 jaroj el la tuta mondo, al kiuj ni petas sendi - ĝis la 15a de oktobro 2005, al ESPERANTO TRIESTE - C.P.601 - 34100 TRIESTE CENTRO - ITALIA unu aŭ pli da faritaĵoj pri la supre indikita temo, en la sekvaj formoj:

- ☆ fotografiaĵo (ekz. de hejma aŭ lerneja, aŭ de preĝeja kripo) en la grandeco maksimume de A4-formata folio
- ☆ desegnaĵo (ekz.: kiel mi vidas hodiaŭ la kripon, kiel mi ŝatus ĝin,..)
- ☆ teksto, skribita sur maksimume unu A4-formata folio (ekz.: malgranda rakonto pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo, ..)
- ☆ manfaritaĵo (gipse, ligne, metale, papere, ktp ktp)

La teksto estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en la samaj lingvoj. Krome estu ankaŭ persona kaj familiaj nomoj, malgranda foto, aĝo, lernejo kaj klaso, poŝta adreso.

Ĉiuj faritaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2005. Oni premios la plej trafajn faritaĵojn, laŭ speco kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj, de 9 ĝis 11 kaj de 12 ĝis 14) okaze de publika ceremonio en Trieste.

Korajn dankojn pro Via preteco kunlabori!
Plej amike via

Elda Doerfler
testudo@adriacom.it <testudo@adriacom.it>

Internacia Esperanto-Festivalo "Paco kaj Espero"

Karaj amikoj!

Dagestana Socia Organizacio - Inform-analitika Centro "Rakurs" kaj la registaro de Respubliko Dagestan kore invitas vin al la Internacia E-Festivalo "Paco kaj Espero".

Ĝi okazos **inter la 7-a kaj 12-a de majo 2005** en pitoreska bordo de la Kaspia maro.



Dagestanaj esperantistoj havas bonajn tradiciojn en organizado de la amasaj aranĝoj - ĉi tie pasis la I-a Tutsoveta Laborbrigado kaj la XX-a OkSEJT, tradiciaj majaj Kaŭkaziaj E-Renkontiĝoj kaj Internaciaj E-tendaroj.

Nun vin atendas interesa Festivalo, dediĉata al la 60-jariĝo de la Venko.

En la provizora programo estas antaŭvidataj:

- ☆ Loĝado en bonaj kondiĉoj en la ĉemara ripozejo "Laro" inter ĉef-urbo de Dagestan Mahackala kaj unu el la plej antikvaj urboj de la planedo Derbent.
- ☆ Interkona vespero, solena malfermo kun la partopreno de la gvidantoj de la respubliko kaj famaj poetoj, artistoj en la speciala salono.
- ☆ Fotoekspozicio sub la titolo "La Mondo de Espero" (viaj verkoj estas bonvenaj!)
- ☆ Internaciaj koncertoj, vizito al la festa koncerto de majstroj de kulturo de la respubliko - eventuale kun partopreno de la gastoj; partopreno en la festaj aranĝoj de la respubliko.
- ☆ Ekskurso al la 5-miljara urbo Derbento kaj ĝia fama fortikaĵo, vina kaj konjaka uzinoj kun gustumado de niaj sunaj trinkaĵoj, ŝipa ekskurso kun ŝaŝlikumado.
- ☆ Kompreneble, kvizoj, bard-kafejo kaj diskotekoj ankaŭ ne mankos. Vere amikeca etoso, konatigo kun la unika kulturo de la Monta Lando, ĝiaj noblaj tradicioj, popolaj artoj kaj metioj, bona ripozo atendas vin!



Ĉiujn gastojn oni renkontos en la flughaveno kaj stacidomo, dum la tuta semajno ĉe ni deĵoros bona buso.

Speciale por tiuj, kiuj demandas min pri la sekureco - la situacio estas kvieta, krome, oni speciale gardos la ripozejon.

Por dagestananoj la vortoj amikeco kaj gasto estas sanktaj!

Dum la tuta periodo ĉe ni deĵoros jurnalistoj de ĉiuj respublikaj kaj reprezentantoj de la centraj rusiaj amaskomunikiloj, inkluzive respublikan televidon. Okazos gazetaraj konferencoj. Ĉiu partoprenanto krom la suvenirojn ktp. ricevos ankaŭ filmon pri la arango. Estas preparata speciala kolora fotorevuo pri Dagestan en Esperanto. Ankaŭ pluraj aliaj surprizoj atendas la partoprenantojn!



Koran bonvenon!

Pri la vizoj por eksterlandaj gastoj zorgos la registaro, do, problemoj kun tio ne estas atendataj.

La organiza teamo ne estas tro granda, sed inkluzivas du ministrojn, vicurbestron kaj aliajn gravulojn, ankaŭ la prezidanton de REU, sed ankoraŭ pli gravas, ke ni strebos fari ĉion por bonfarto de niaj gastoj, por ke la partoprenantoj estu kontentaj kaj ricevu belajn impresojn!

Ĉiujn detalojn: ✉ junusov@xtreem.ru aŭ junusov@dinet.ru,
☎ (8722)-630643, Abdurahman Junusov.

Loko

La Festivalo "Paco kaj Espero" okazos en la ripozejo "Cajka" ("Laro") surborde de Kaspia maro. Dulokaj komfortaj cambroj kun ĉiuj necesajoj. Kune kun la trifoja mangado la prezo estas vere modera - 12 eŭrojn por tagnokto.

Ne forgesu la pasporton 😊



Prezoj

Aliĝkotizo - 20 eŭroj. La kotizon vi pagu surloke.

Aliĝilo por la festivalo "Paco kaj Espero" (Ni petas plenigi tre klare!)

Plena nomo

Plena adreso, poŝta indekso

Naskiĝdato

N-ro de la pasporto

Telefono

Ret-adreso

Ne forgesu la fotojn por la ekspozicio (preferinde pli grandajn ol bildkarto), naĝkostumojn, kaj kunprenu viajn bonajn geamikojn!

Abdurahman Junusov.

Ĉu vi sciis ... / Wist je dat...

... jij op dit moment bijvoorbeeld bezig bent deze zin grammaticaal te ontleden, zonder dat je er aandacht aan hoeft te schenken? En dat je dat doet m.b.v. onbewuste kennis over de grammaticale regels van het Nederlands?

... 95 procentoj de nia konduto estas regulata de aŭtomataj kaj/aŭ nekonscias procezoj. Aŭ en simpla Esperanto: nur 5 %-ojn de nia konduto ni povas konscie kontroli.

...er twee keer zoveel kangoeroes als mensen in Australië wonen? En dat het aantal kangoeroes in Australië wordt geschat op 40 miljoen.

...ni ĉiun tagon kune en Belgio ĉirkau 19,1 milionojn da fojoj ni iras necesejen, kaj ke ni forkonsumas 21.000 km-ojn da neceseja papero ?

... Hoe meer ik LEER, hoe meer ik WEET,
Hoe meer ik WEET, hoe meer ik VERGEET
Hoe meer ik VERGEET, hoe minder ik WEET
Waarom zou ik leren?



Een man vraagt aan een dom blondje: "Ik heb hier een bak met 99 witte knikkers en 1 rooie. Hoeveel procent kans heb je dat je de rooie trekt?"

Het domme blondje zegt: 50 procent kans.

"Neeeee," zegt de man, "Luister goed: ik heb 99 WITTE KNIKKERS en 1 ROOIE.

HOEVEEL procent kans heb je om de ROOIE te trekken????"

Het domme blondje zegt weer: "50% kans".

De man: "Leg es uit."

Domme blondje: "Nou, of je pakt 'm of je pakt 'm niet!"



Latva Festo Jànudiena en popolkantoj

(Jana tago, ankaŭ “Ligo”)

Somersolstice, kiam post la plej longa tago sekvas la plej longa nokto, pralatoj festis Janan tagon. Nuntempe iliaj prafiloj daŭrigas tiun belan tradicion.

La latva popolo tre ŝatas ĉi tiun feston kaj konsideras ĝin kiel la unuigita faktoro de nacio. Eble, pro tiu kaŭzo en antaŭnelonga pasinteco la fremda reganta potenco celis malpermesi celebradon de tiu festo.

Laŭ nuna kalendaro la ĝusta Jana Tago estas la 23an de junio.

Jano rajdis, Jano rajdis
Tutan longan somereton
Jen, alrajdis, alveturis
Antaŭ Janatag' vesperen
Antaŭ Janatag' vesperen
Ĝuste tempen de florad'



(Ĉi tie kaj pluen – libera traduko de popolkantoj)

En la komenco de la 20-a jc. oni ekuzis ankaŭ la esprimon « Ligosvètiki » (Ligofesto) ĉar jam sufiĉe longe antaŭ Jana tago eksonas la kantoj kun refreno « LIGO ». La enhavo de popolkantoj komprenebligas la signifon de tiu ĉi prikantaĵo: la tuta naturo balanciĝas pro matureco kaj fruktodono. Laŭ liva lingvo la vorto « ligo » interpretiĝas kiel iĝu / estiĝu / fariĝu.

Kiel Janojn bonvenigis
Kiel Janojn elkondukis
Ligo – kante bonvenigis
Ligo – kante elkondukis

Kelkloke en Latgale la refrenon “ligo” oni anstataŭas per sambelona « ruto » (loka dialekto)

Sun', abel' bonfaras ambaŭ, ruto, ruto
Laŭ la kampo vast-vastega, ruto, ruto
Suno-fojnon sekigante, ruto, ruto
Abel'-florojn elektante, ruto, ruto



Jana tago estas la plej prikantata jarciklo festo. Entute pli ol 2.000 popolkantoj rakontas pri tiu tempo. Ĉirkaŭ 200 popolkantoj estas dediĉitaj al legenda figuro – Dia filo Jànis (Jano)

Ho, Janĉjo, Dia filo
 Riĉan havas vi ĉapelon!
 Kreskis sub ĉapelo via
 La hordejo kaj sekalo



Simila somerstica legenda figuro por antikvaj romanoj estis Janus, por hindoj - Devjano, por germanoj - Janu, por etruskoj - Ani, por slavoĵ - Jan, por grekoj - Apolono ktp.

Laŭ tradicioj de ĉiuj popoloj en somersoltica festo distiniĝis la fajro kiel simbolo de la Suno. Jen ilustraĵo per latvaj popolkantoj :



Vi kunvenu, Janinfanoj
 Bonvenigu Janan tagon
 Jana tago lukse venis
 Lignofajre flagretante

Janotago estas tre bela festo: festo de la suno. La popolkanto montras al ni noblan alegorian bildon :

Lant Janĉjo malsupreniĝis
 Ĉarveture laŭ montet'
 Sunfilino la pordegon
 Ovrís kun stelganta man'

Janmatene la Suno sin ornamas (bedaŭrinde, la hodiaŭa homo jam preskaŭ perdis la kapablon pli profunde eksenti la nuancojn de kvieta beleco de naturo) :

Farinte Janan lignofajron, vi atendu sunleviĝon, vi atendu sunleviĝon, tiam suno sin ornamas, la homoj atendas Janan tagon. Bonvenigas Janon kun kantoj :



Kantojn mi dum jar' kolektis
 Janan tagon atendente
 Ĵus alvenis Jano tago
 Ĵus per kantoj ĝojos mi

Atendente Janan tagon la homoj rapidas fini eksterajn laborojn: sarki legomĝardenojn, purigi kortojn kaj ĉirkaŭaĵon. Ankaŭ la ĉambrojn oni purigas kaj ornamas, same oni lavas tablojn:

Tri tagetoj mi lesivis
 Janan nokte atendente
 En Jannokt' ĉemizon blankan havis surmetita mi

La tradicia Jantaga manĝaĵo estas fromaĝo kaj trinkaĵo – biero

Mi preparis grandfromaĝon Janan atendante
Janatage disdonadis po tranĉaĵoj etaj

La fromaĝo bonefikas plinombrigon de la bovinaro kaj ŝafaro, kaj kontribuas la laktodonon de bovinoj, sed la biero sukcesigas abundan grenan (precipe hordean) rikoltaĵon.

Gravan signifon havas Jantaga roso kaj herbo, Jana kronoj (magia gardante rondo). Kun Janherbo kaj Janaj kronoj oni ornamis ĉiujn bondezirantojn : homojn, brutojn, ĉambrojn, ejojn, ktp.

Bovino mia, makulhara, donu plenan melkokuvon
Mi por vi florkronon plektos el la ruĝa trifoli'

La « vera » Janherbo estas ruĝa trifolio, valeriano, artemizio, hiperiko, galio, filiko kaj branĉo de l'sorparbo. Tre mallonga estas Janan nokto, tial oni ne davs dormi dum tiu nokto.

Pli bone estas « serĉi la floron de filiko » kaj trovi ĝin. Pri tio konsilas ankaŭ popolkanto :

Junaj buboj, junulinoj
Vi ne dormu dum Jannokto
Kiu dormis dum Jannokto
Tiu dormos tutan vivon



Venonttage Janinfanoj kun kantoj adiaŭdas alegorian Janon kaj promesas atendi ĝin en la sekvonta jaro.

Laŭ rekomendo de Papo Gregoro I (601 j.) enigi enhavon de nekristanaj festenoj ian kristanan signifon, la katolika eklezio proklamis la 24an de junio la tagon de sankta Johano la Baptisto, elektante la daton 6 monatoj antaŭ Kristnasko.

G. Tamane, Latvio

** La Jana festo (Johanfest) en Latvio kaj la Jana-kantoj originas (same kiel en Litovio) en pratempoj kaj estas la plej fama popola festo somera en Latvio, ĝi estas la festo de la suno, de la amo, de fekundo kaj de naturo. La belegaj popolaj kantoj, ĝiaj tagaj kaj noktaj ritoj montras la vivon pli

riĉan, pli koloran kaj pli gajan....

Verda*Utopia*

Verda estas la herbejo en la ĝardeno. Regas tie diversaj verdoj, pro fiherboj kiuj preskaŭ neeviteble ankaŭ okupas spacon kaj forpuŝas la originalan puran herbon mem. Kaj kelkloke talpo trarompis la verdon per brunaj makuloj.

Verda estas la folioj en la arbaro. Helverdaj, freŝverdaj, ja komen- ciĝis la printempo kaj la folioj atestas pri la ĉiujara renaskiĝo de la tero. Poste aldoniĝos diversaj koloroj de floroj en la arboj, en la somero aldoniĝos la koloro de fruktoj, Poste la folioj ŝanĝiĝos al flavo kaj fine falos surteren, lasante nur brunajn trunkojn kaj branĉojn kontrastantajn al la aŭtunblua aero.

Verdaj estas la plantoj en la ĉambro, atestantoj de naturo meze de ŝtona domo.

Verda estas la inko per kiu hieraŭ en kunsido la partoprenantoj notis siajn nomojn sur papero. Mi neniam uzas verdan inkon, sed en tiu kunsido unu parto- prenanto kunportis tian skriblon

kaj pruntis ĝin al la aliaj kiam la papero rondiris. Pro tio ankaŭ tiu ereto sur skribotablo montras sian verdon.

Verda estas la koloro de la televida ekrano - estingita.


Verda estas la tegmento de la domoj ĉirkaŭ mi. Originale ili nigris, nun ilin plurloke kovras musko. Iam tamen estus bone forigi ĝin.

Verdas ankaŭ la trinkaĵo en mia glaso, verdas notkartetoj, kovertoj, bildkartoj, etikedetoj, uĵeto, pluŝa vermo... Ŝajnas ke tiu koloro invadas mian vivon, kvankam tute neintencite.

Verda estas eĉ butono sur la komputila klavaro, per kiu eblas dormigi ĝin.

Verda estas miaj pensoj, kiuj vagadas tra la naturo en sia nuna stato. Verdaj bildoj, verdaj sonoj, verdaj odoroj kaj gustoj, verdaj sentoj.

Lasta kaj plej grave mia nova Esperanto-vortaro memorigas ke verda estas ankaŭ la koloro kiu de la origino estis aljuĝita al Esperanto... la koloro de la espero. ☺ ■



België – Belgique
P.B.
3000 Leuven 1
2/2668

Esperanto 3000

Tweemaandelijks tijdschrift

Aprilo 2005

V.U. Koen Vanhoof, Milsestraat 26, 3053 Haasrode

jr. 26 nr. 2

Dumonata revuo

April 2005

Afgifte : 3000 Leuven 1

En ĉi tiu numero :

Cu japana manĝaĵo estas salubra

Japana kuirkurseto

Gisengo – la mirakla kuracplanto

Ottignies: Loven-la-Nova invitas


Internaciaj konkurso "Mia Kripo"

Internacia Festivalo en Dagestano


Ĉu vi sciis ke...?

Latva festo Janudiena en popolkantoj

Utopia



**Ben je lid zonder een
herinneringsbrief Dank je!**



Programma Esperanto 3000 vzw

Alle activiteiten vinden plaats in het cultureel centrum 'Romaanse Poort',
Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, tenzij anders vermeld.
Het programma van de Vespero 3000 begint om 20 uur, welkom vanaf 19.30 uur

Woensdag 14/09/05	Eerste Vespero 3000 van het nieuwe seizoen INFORMATIE-AVOND: Esperanto Zie ook pagina 6	19.30 - 22.00
Maandag 26/09/05	Avondcursus Esperanto Start van een nieuwe reeks voor beginners Zie ook pagina 6	19.30 - 22.00
Woensdag 28/09/05	Vervolgcurcus Esperanto , conversatie met grammaticagedeelte door Marc Vanden Bempt	20.00 - 22.00
Zat + Zon 8-9/10/05	Spoedcursus Esperanto voor beginners	20.00 - 22.00
Woensdag 12/10/05	Vespero 3000 , Cor Willems over Paleontologie Historia superrigardo de la folio paleontologio	20.00 - 22.00
Woensdag 26/10/05	Vervolgcurcus Esperanto , conversatie met grammaticagedeelte door Marc Vanden Bempt	20.00 - 22.00

ESPERANTO 3000

revuo de Esperanto 3000 vzw Leuven,
asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo
aperas 6-foje en la jaro

**Kontaktadreso /
Contactadressen**

esperanto3000@esperanto.be
Baron Descampsstraat 77, 3018 Wijgmaal
Roger Goris (sekr.), Rue Ménada 44, 1320
Hamme-Mille ☎ 010 860 112;
r.goris@versateladsl.be
Frans Croon (voorz.), Bukestraat 16,
1910 Kampenhout-Buken ☎ 016 655 944;
frans.croon@kampenhout.be

**Membreco / Lidmaatschap
E.3000**

membro/lid Eo3000 + FEL = € 20,00 =
Eo3000, Horizon-taal, JEN (ĝis 29-jara)
nuisbrief = gratis: zie onze webstek
<http://www.esperanto.be/esperanto3000/>

**Membreco / Lidmaatschap
UEA**

membro/lid UEA = € 9,00
same/idem + jarlibro = € 22,00
same/idem + Esperanto € 55,00

**Abonoj / Abonnementen
(2005)**

Esperanto 3000 = € 10,00 (nl/eo)
(alleen voor FEL-leden via andere clubs)
Horizon-taal = € 20,00 (nl/eo)
Monato = € 44,00, por ĉiuj (eo)
Ret-Monato = € 26,40, por ĉiuj (eo)
Agenda "La Jaro" € 5,00 (eo)
Enigmo € 4,50 por 2 numeroj (eo)
Vertikale = € 5,00, por aktivuloj (eo)
Esperanto (UEA) = € 35,00 (eo)
Juna Amiko = € 14,00, por infanoj (eo)
Ret-info = € 21,00 (eo)
La gazeto (OSIEK) = € 27,00 (eo)
La Kancerkliniko = € 22,00 (eo)
Kontakto = € 21,00, komencantoj (eo)
Komencanto = € 15,00, komencantoj (eo)

Reklamo / Reclame

1 p. € 9, 1/2 p. € 5, 1/4 p. € 3, 1/8 p. € 2
5x la prezo: tuta jaro / 5x de prijs: heel jaar

Ĝenerale / Allerlei

Pagante bonvolu klare indiki la deziratajn

De la (provizora) redakcio

‘t Is weer voorbij, die
mooie zomer....



Elk jaar opnieuw denk ik aan dit
liedje, de naam van de zanger
ontsnapt mij telkens weer.

Maar niet getreurd in het najaar
zie ik ook mijn Esperanto-vrienden
terug en kunnen wij gezellig kletsen
over de voorbije zomer.

Welke congressen hebben zij
bijgewoond, welke nieuwe mensen
hebben zij leren kennen?

En het wereldcongres van
Vilnius zal zeker besproken worden
in het volgende nummer !

Ik kijk er al naar uit.

De redakcie.

(als voorsmaakje nu reeds de rede
van de Litouwse president)

Kunlaboris, alfabete:

Helena Van der Steen & Marc
Vanden Bempt (provizoraj
redaktoroj), Nele Hiers (nalezen), la
aŭtoroj (vidu ĉe la artikoloj).

kategoriojn / Gelieve bij betaling duidelijk de gewenste categorieën aan te geven.

Konto/rekening : 734-3331944-03 de/ van Esperanto 3000 vzw, 3000 Leuven

Pri tekstoj nur la sendintoj respondecas / Voor teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk

Mesaĝo de

La Alta Protektanto de la 90a UK

**la prezidento de Litova
Respubliko,**

s-ro Valdas Adamkus



Estimataj kongresanoj kaj gastoj,

Mi sincere salutas partoprenantojn kaj gastojn de tiu ĉi Kongreso kaj ĉiujn esperantistojn de la mondo.

Litovio fieras, ke la ĉefurbon de nia lando vi elektis kiel lokon de via

Kongreso.

Veninte ĉe ni vi transformigis Vilnon al la ĉefurbo de tutmonda esperantistaro. Ankoraŭ pli agrablas, ke ĝi estas jubilea aranĝo – ĉi jare estas festata la 100-a datreveno de la unua kongreso de Esperanto.

Estus malfacile trovi pli taŭgan lokon por la jubilea Kongreso ol Litovio. Ja en nia lando vivis kaj kreis eminenta Ludoviko Zamenhof.

Ĉi tie li verkis la unuan Esperanto lernolibron kaj flegis la esperon kunigi homojn de la mondo. Litovio, kie ĉiam vivis kaj pace kunvivis diversaj popoloj, altestimas tiun ĉi eminentan nian samlandanon, kiu disvastigis ideojn de homara unueco.

Ni jam distancas je unu jarcento ekde la unua Kongreso de Esperanto. Tamen hodiaŭ ankoraŭ pli evidentas kiel aktualaj kaj vivaj estas ideoj de Ludoviko Zamenhof. Por la moderna mondo, kiu konfrontas kun pli gravaj globalaj defioj kaj kontraŭstaroj, estas eksterordinare grave, ke malsimilaj popoloj, religioj kaj kulturoj konservu sian identecon kaj samtempe ektruvi manieron de interparolado.

Vi, esperantistoj, sinsekve instigas tiun ĉi tipan por la 21a jarcento dialogon kaj popularigas demokratian internacian kunlaboron. Komunumo de internacia esperantistaro estas perfekta ekzemplo de solidareco inter homoj de diversaj nacioj. Via movado kontribuas al pliproksimigo de popoloj, instigas pli profunde koni kulturan diversecon.

Dum nunaj tagoj vi havos bonan eblecon ekkoni historion, kulturon, heredaĵon kaj morojn de Litovio. Ni ĝojas, ke ni povas vin gastame akcepti, montri originalecon de nia lando, prezenti trezorojn de nia kulturo.

Mi esperas, ke via gastado en nia lando estos interesa kaj vi spertos multajn agrablajn kaj neforgeseblajn momentojn.

Mi deziras al via Kongreso sukcesan laboron kaj kreivajn diskutojn!

Ĉion la plej bonan al vi!

Valdas Adamkus
Prezidento de Litovia Respubliko

La 24a de julio 2005

Met deze woorden verwelkomde de Litouwse president de deelnemers aan het congres te Vilnius ■

Je leest er meer over in ons volgende nummer!!!

La ferstudento



Centra placo de Loveno. Posttagmezo.

Ĉirpas, krias, amindumas juna gento.

En danceta poz', en dura pensopezo

tristas sole senanima ferstudento.

Okultruojn sunradioj penetretas,

ŝtelirante al la placo inter turojn.

Kvazaŭride fera ombro pene tretas

Sur pavimo junulinajn belkonturojn.

Kaj kripligas fervizaĝon la rikano,

kvazaŭ kaptas krudan feron ekdolor' de

karesgeste etendita dekstra mano,

kvazaŭ revoj ekimpetas for malorde

al logaĵoj de vangetoj plej kisindaj,

al rondaĵoj de pugeto pinĉproksima...

Vesperigâs. La okuloj ploras blindaj.

Kiu diris, ke li estas senanima?

Mikaelo Bronŝtejn

24.11.2004, Loveno

(Poemeto, verkita de Mikaelo dum lia vizito al Leuven en 2004)





Informatieavond

Op woensdag 14 september 2005 organiseren wij opnieuw onze informatieavond over Esperanto.

Alle info over avondcursus, snelcursus, vervolgcursus en de mogelijkheden die Esperanto je biedt, komen aan bod.

Je kan die avond kennismaken met deze taal dankzij een eerste **gratis** en **vrijblijvende** les.

Wij verwachten dus alle geïnteresserden in het Cultureel Centrum, Brusselsestraat 63 te Leuven en dit vanaf 19.30 uur

Je krijgt **gratis** informatie en **gratis** 3 nummers van ons tijdschrift.

Avondcursus

Vanaf maandag 26 september 2005 start een nieuwe reeks lessen van de avondcursus Esperanto voor beginners.

Deze avondcursus wordt georganiseerd op 10 maandagavonden, steeds van 19.30 tot 22.00uur

Verdere informatie kan je verkrijgen via e-post:

esperanto3000@esperanto.be of bel 010/860 112 - Roger Goris

Spoedcursus

Deze spoedcursus duurt 14 lessen en vindt plaats tijdens het weekeinde van 8 en 9 oktober 2005, telkens van 9.00 tot 12.00 en van 13.00 tot 17.00 uur.

Je leert er op die korte tijd de volledige spraakkunst en ongeveer 2000 woorden.

Verdere informatie kan je verkrijgen via e-post:

esperanto3000@esperanto.be of bel 010/860 112 - Roger Goris

Vervolg cursus

Voor leden: gratis elke vierde woensdag van de maand telkens van 20.00 tot 22.00 uur.

Er is geen verplichting, je komt wanneer 't je het best past.

Vespero 3000

Voor leden: elke tweede woensdag van de maand van 19.30 tot 22.00 uur.

Gemoedelijkheid is hier troef.

De ene keer geeft iemand (een lid of een buitenlandse gast) een lezing over een of ander onderwerp (thema, reis, hobby...) met foto's of een film- of diavoorstelling, de andere keer is er een groepsdebat,... of wat dacht je van een quiz in het Esperanto?

Daarnaast is er plaats voor (informele) uitwisseling van informatie, eventueel tussen pot en pint. ■



Al taksistacio venas taksio. Nederlandano demandas:

-Kiom kostas la veturado ĝis la stacidomo?

-20 eŭrojn

La taksio daŭrigas la veturadon kaj la Nederlandano postkuras ĝin. Post momente peze anhelante li demandis : Kaj nun ??

-30 eŭrojn


-Mi ne komprenas, kial ?

-Ĉar la stacidomo estas en la kontraŭa urboparto !



Kiel funkcias televido

(por ne-fakuloj)



En la tridekaj jaroj rusa inĝeniero Aisberg, filo de germana patro kaj angla patrino, post transloĝiĝo en Francion, verkis originale en Esperanto "Fine mi komprenas la radion" kaj poste plurajn tiajn bonegajn librojn. La verko estas tradukita en multegajn lingvojn.

En lia verko iu Sciemulo multe lernas pri radiokomunikiloj ĉe sperta Radiulo per amuzaj babiladoj.

Leginte tiun libron oni klare komprenas ke eblas sendi elektrajn signalojn kaj ricevi ilin je granda distanco sen bezono de elektrokondukiloj inter la du aparatoj.

Unue oni kapablis ricevi nur malklaran signalon. Oni jam kontentis distingi ĉu la sendilo estis sendanta jes aŭ ne. Tio sufiĉis nur por ricevi koditajn telegrafiajn signalojn, ekzemple Morso-signalojn.

Poste oni sukcesis influu la forton de la sendita ondo (la "portanta ondo") laŭ iu elektra signalo: teknike tio nomiĝas 'moduli' la portantan ondon kaj en tiu ĉi kazo temas pri 'amplitudo-modulado'. La elektra signalo, kiu influas la forton ('amplitudon') de la portanta ondo, la modulanta signalo, povas esti pli-malpli precize 'rekonstruata' en la ricevilo.

Se la transsendenda fenomeno konsistas el nur unu valoro en ĉiu momento, la problemo estas sufiĉe simpla. Sono konsistas el ŝanĝiĝanta aerpremo. Mikrofono 'tradukas' la ŝanĝiĝojn de la aerpremo en iu punkto en elektran valoron: en la unuaj mikrofonoj la aerpremo agis sur du (aŭ pluraj) intertuŝantaj karbonaj pecetoj. Ju pli forte la pecetoj premiĝas unu sur la alia, des malpli granda iĝas la elektra rezistanco inter la karbonaĵoj kaj des pli da elektra kurento trapasos ilin. Ĉar mikrofono tradukas ŝanĝojn de aerpremo en variĝantan elektran valoron, la problemo de transsendo de voĉo aŭ muziko estis principe solvita.



Sed kiel ni komprenu transsendon de elektra signalo sen kondukiloj (sen 'dratoj') inter sendilo kaj ricevilo?

La ŝlosilvorto por kompreni tion estas 'resonanco'. Mi provos klarigi tion.

Imagu balancilon. Kiam oni lanĉas balancilon, ĝi oscilas (iras kaj revenas) laŭ sia propra ritmo: tiom da fojoj en tempunuo laŭ sia 'propra frekvenco', sed iom post iom ĝi perdas sian energion kaj fine haltas. Ĉiu ja iam spertis ke etaj puŝetoj en la bona momento, do en la ĝusta ritmo, kun la taŭga frekvenco (nombro da puŝoj en tempunuo) sufiĉas por daŭrigi la osciladon.

Kelkfoje okazas ke preterpasanta ŝarĝaŭto aŭ trajno vibrigas, 'sonigas' glason en via ŝranko aŭ vitraĵon en via fenestro, ekzemple kiam la propra frekvenco de tiu objekto estas la sama kiel la frekvenco de la eksplodoj en la motoro de la ŝarĝaŭto.

Kiam vi malfermas pianon, levas la dampilojn (premante la dekstran pedalon) kaj krias en la instrumenton, vi aŭdos resoni la kordojn, kies propra frekvenco egalas la frekvencojn en via voĉo. Tiu fenomeno nomiĝas resonanco.

Unu el la principoj en elektriĉo (la scienco pri elektraj fenomenoj) temas pri fortoj inter ŝarĝoj (elektra ŝarĝo estas kvanto da elektro). Homoj jam longe scias ke iuj objektoj post frotiĝo sur sekaj feloj kapablas altiri etajn aĵojn kiel paperpecetojn, haretojn, k.t.p.

Unu el la leĝoj en elektriĉo asertas ke inter elektraj ŝarĝoj estas fortoj. Malsamsignaj ŝarĝoj emas altiri unu la alian, samsignaj emas forpuŝi unu la alian.

Oni povus imagi balancilon, kies ŝarĝo havas elektran ŝargon (jen sen [^]super la g!).

Se oni je kelka distanco variigas la elektran ŝargon de iu konduktanta objekto ('anteno') en la sama ritmo kiel la "natura ritmo" de la balancilo, oni komprenas kiel la etaj puŝoj kaj tiroj de la ŝanĝiĝantaj ŝarĝoj sur la anteno je la ŝarĝo en la balancilo kapablas daŭrigi ties oscilojn, kondiĉe ke la frekvencoj egalas.

Pure elektraj oscilantaj cirkvitoj (kondensatoro paralela al induktanco) konektitaj al 'ricevanta' anteno povas resoni al sendanta anteno je tre granda distanco. La osciloj povas esti elektronike 'ŝmirataj' (por kompensi la

dampiĝon) kaj amplifataj kaj la 'grando' de la osciloj povas esti derivata. Rimarku ke resonos nur tiuj 'balanciloj', kies propra frekvenco egalas tiun de la sendilo.



Ni nun provos kompreni kiel oni kapablas transsendi ne nur senmovajn bildojn, sed ankaŭ moviĝantajn bildojn. Unue ni provu kompreni la transsendon de ununura griznua bildo.

Per unu elektra lineo (dratparo) oni kapablas transsendi nur unu signalon je la sama momento, ekzemple la ŝanĝiĝanta aerpremo kaŭzita de nia voĉo. Per unu dratparo ni do ankaŭ kapablus transsendi la valoron de la lumforto en unu punkto de bildo. Transsendi tutan bildon estas tute alia problemo ĉar en bildo ekzistas multegaj eroj, kies helo estas sendependa de la aliaj. Sed ni ja deziras transsendi tutan bildon tra nur unu elektra lineo (aŭ tra unu sendrata 'lineo'). Tial ni devos disigi la transsendotan bildon en apartajn punktojn, kies lumintenseco povas varii inter nul por nigra bildopunkto kaj maksimumo por plej blanka bildopunkto; ni sendos la signalojn de ĉiuj punktoj unu post la alia.

Jam en 1839 franco Becquerel trovis lumelektran efikon. De tiam oni trovis multajn manierojn por 'traduki' lumforton en elektran valoron. Ĉiam temas pri lum-eroj (fotonoj), kiuj per 'kolizio' kun elektronoj (elementaj elektraj ŝargoj ĉirkaŭ la kerno de atomoj) 'frapas' la trafitajn elektronojn en alian pozicion, de kie ili povas kontribui al kondukto de elektro tra 'lumelektra rezistanco', aŭ eĉ igi la trafitajn elektronojn tute liberaj en la vakuo de iuj 'lumelektraj ĉeloj', kie ili transportos la ŝargojn de la prilumita elektrodo ('katodo', je negativa potencialo) al alia ('anodo', je pozitiva potencialo).

La elektronoj havantaj negativan ŝargon estas altirataj al la pozitiva anodo: ju pli da lumo, des pli da liberigitaj elektronoj 'flugos' de la katodo al la anodo kaj des pli granda estos la kurento inter katodo kaj anodo (fakte oni konvencie diru, ke la kurento fluas inverse: de anodo al katodo).

Oni aranĝas per lensoj ke la lumo el nur unu bildero trafu la lumelektran ĉelon, kiu 'saltu' aŭ prefere 'modulu' la sendilon.



Ni povas imagi ke ni distranĉas la transsendotan bildon en mallarĝajn strietojn. La intenso de la reflektita lumo de la punktoj estas determinata fare de lumelektra ĉelo. Tia ĉelo "vidu" tra la lenso punkton post punkto de la transsendota strio. Se ni movas la strion antaŭ la lumĉelo, la elektra kurento tra ĝi estos (pli-malpli) proporcia al la helo en ĉiuj 'vidataj' punktoj de la bildostrio.

Unu el tiaj sistemoj estis (eble estas ankoraŭ) uzata por transsendi fotojn, ekzemple por ĵurnaloj. La transsendota foto estis fiksata ĉirkaŭ tromelo (tio estas rotaciona cilindro). Dum la rotacio de la tromelo lumelektra ĉelo 'tradukas' la lumreflekon de la "strioj" dum ĝi mem malrapide pluen ŝoviĝas laŭlonge de la tromelo. En la ricevilo simila tromelo rotacias kun sama rapideco ol en la sendilo. Anstataŭ lumĉelo kiel en la sendilo, ĉi tie estas lampeto. Fotopapero estas prilumata per la lampeto tra lensaro, kiu koncentras la lumon sur mallarĝan areon de la fotopapero. Post rivelado de la fotopapero jen kopio de la originala foto aperas.

Ĉe la fino de ĉiu strio, oni elsendas specialan signalon por ke la ricevilo sciu ke ĝi komencu novan linion. La speciala signalo nomiĝas sinkroniga pulso.

Por povi apartigi en la ricevilo tiun pulson de la enhavo de la bildo mem, oni nun aranĝas tiele, ke la elektra valoro por "nigro" ne egalas nul, sed pli ol nul. Dum la sinkroniga pulso la valoro estu pli malalta ol la valoro por nigra bildopunkto: 'transnigra pulso'. Tiel en la ricevilo oni povas detekti ĝin kaj komenci novan linion aŭ almenaŭ iamaniere korekti la rapidon de la desegno, ekzemple la rapidon de la tromelo. Nur transnigraj signaloj kapablas influi la sinkronigon, ne la enhavo de la bildo mem.



Iu tia primitiva aparato el la telegrafio erao estis ankoraŭ menciata en malnova PIV: la teleaŭtografo, principe por transsendi 'nur' nigra-blankajn bildojn, skribaĵojn aŭ desegnaĵojn, do sen grizaj nuancoj. Se estus diferenco de rapido inter la sendila tromelo kaj la ricevila tromelo, la

ricevita bildo estus tordata.

Tial gravis 'sinkronigi' la du tromelojn per elektra signalo. En la primitivaj aparatoj oni simple mekanike haltigis la iom tro rapide rotaciantan ricevilan tromelon per hoko. La hoko liberigis la tromelon per elektromagneto nur post ricevo de la sinkroniga signalo.

En la deknaŭa jarcento oni provis montri moviĝantajn bildojn. En muzeoj oni povas vidi prototipojn. Unu el la sistemoj konsistis el rotacianta cilindra aŭ multangula skatolo kun nombro da fendoj aksparalelaj. Rigardante en la skatolon tra la fendoj oni vidis la bildojn sur la kontraŭa interna flanko de la skatolo, po unu bildo tra ĉiu fendo.

Ĉiu bildo montras la objekton en iom plua pozicio. Tio faras la impreson de moviĝanta bildo. Similaj sistemoj kapablis montri kelkdekajn bildojn registritajn sur plata disko aŭ eĉ surpaperajn bildojn en speco de senfina libro.

Tiel oni montris ekzemple kurantan ĉevalon, per ĉiam ripetataj bildoj. Belgo Plateau, iĝinta profesoro pri fiziko en la genta universitato en mil okcent tridek kvin estis protagonisto. En 1895 la fratoj Lumière patentigis sian sistemon ebligantan fotografi kaj projekcii moviĝantajn bildojn.

Por montri moviĝantan bildon oni bezonas minimume dudekon da apartaj bildoj en sekundo. Oni do bezonas rapidegan sistemon por registri, transsendi kaj redeseĝni tiujn bildojn.

Jam en 1884 germano Nipkow elpensis sistemon kun rotacianta disko, en kiu estis dudeko da truoj regule sur spiralo.

En sendilo kaj en ricevilo rotacias simila disko je sama rapido. En la sendilo bildo de la sceno estas projekciata sur la diskon per lensaro simila al tiu en fotilo. La lumo trairanta truon estas 'tradukata' en elektran signalon far lumelektra ĉelo malantaŭ la disko kaj transsendata.

En la ricevilo estas lampo, kies lumo estas rigardata de la posedanto tra la truoj per lupeo. Kompreneble la lampo estu rapida lampo, ne simpla inkandeska lampo. Oni uzis malŝargotubon. En tia tubo estas diluita gaso (ekz. neono), kiu per la elektra malŝargo elsendas lumon pli-malpli fortan proporcie al la forto de la signalo.

La lumelektra ĉelo en tia aparato estu tre sentiva kaj rapida. Kio fakte estas tia lumelektra ĉelo?

Estas aparato en kiu lumo, formo de radiantanta energio, trafanta iun materialon, povas liberigi elektronojn el tiu materialo.

Per tiaj maldetalaj sistemoj oni eksperimentis en la dudekaj ĝis la tridekaj jaroj de la 19a jarcento, kiam fine ekestis la elektronikaj sistemoj ĝis nun uzataj.

Elektrono estas la plej malgranda elektroŝarga partiklo. Ĉar ĝia maso estas tre malgranda, eblas ĝin facile akceli.

Vi jam scias kelkajn efikojn de elektra ŝargo. La principoj en elektriĝo kaj elektroniko estas ne tre multaj.

Mi mencias la plej gravajn:

- ☆ Ŝargo agas al alia ŝargo per forto, kiel ni jam menciis. Vi certe jam spertis ke laŭ tiu principo eblas per iuj materialoj (ekzemple plasta kombilo) altiri etajn aĵojn (ekz. viajn harojn).
- ☆ Elektra kurento konsistas el moviĝantaj ŝargoj. Moviĝantaj elektronoj do estigas elektran kurenton.
- ☆ Magneta kampo estigas forton je elektra kurento. Tiu forto estas orta al la direktoj de la kurento kaj de la magneta kampo. Kompreneble se forto agas sur la kurento, inversdirekta forto agas sur la magneto laŭ la principo de ago kaj reago.
- ☆ Elektra kurento estigas magnetan kampon ĉirkaŭ si.

En kutimaj cirkonstancoj elektronoj restas kaptataj de la kerno de atomo. La kerno havas pozitivan ŝargon, la elektronoj havas inversan, do negativan ŝargon. Ili estas do altirataj al la kerno. Oni trovis ke iuj materialoj tamen facile liberigas tiujn elektronojn kiam oni varmigas ilin. Kompreneble se oni faras tion en la aero, la elektronoj tuj kolizias kontraŭ la gasmolekuloj. Oni bezonas senaeran spacon, vakuon.

En elektrontuboj estu vakuo. Oni varmigas tubeton, drateton aŭ plateton, kutime per elektra kurento, same kiel oni varmigas gladilon aŭ la filamenton de inkandeska lampo. Per la alta temperaturo -temperaturo fakte estas grado de skuigo de la molekuloj- liberiĝas elektronoj el la plateto. Ili ekŝvebas en la vakua spaco. En bildotubo tiu plateto, la tiel nomata katodo, troviĝas izolita en malgranda metala skatoleto, tute malantaŭe en la bildotubo.

Antaŭe en la skatoleto estas trueto, tra kiu la elektronoj povas eskapi. Oni povas repuŝi ilin, igante la skatolon pli negativa ol la plateto, nomita katodo. Ĉar tiukaze la katodo estas pozitiva rilate la skatoleton, la elektronoj estos altirataj al la katodo kaj ne facile elvenos el la skatoleto. Jen facila kaj rapidega maniero por reguli la fluon da elektronoj elirantaj el la katodo. La elektra tensio agas je la elektronfluo kiel krano je akvofluo.

Tia fluo da liberaj elektronoj estas nomata elektronfasko.

En bildotubo oni akcelas la elektronojn elirintajn el la katodo -la elektronfasko- per tiel nomata akcela anodo. Tio estas tratruita plateto je iu distanco de la skatoleto. Je la anodo oni almetas pozitivan tension. Elektronoj do estas altirataj per tiu 'elektra kampo' kaj flugos rapide tra la trueto. (Estas pluaj aranĝoj -ekz. tubo- por ke ne tro da elektronoj algluiĝu al la pozitiva plato mem). La tuto (la elektronelsendanta katodo, la ĉirkaŭanta skatoleto kaj la akcelanta anodo) nomiĝas elektronkanono. Jen la efiko de la elektronkanono: regulebla fluo da rapidaj elektronoj.

Ĉiu elektrono akiras energion per la akcelo en la elektra kampo inter la skatoleto kaj la anodo.

Je iu distanco de la kanono troviĝas ekrano, ŝmirita per fluoreska materialo. Rapida elektrono kolizianta kun tiu fluoreska materialo 'elfrapas' tiel nomatajn fotonojn (lumerojn) el ĝi. Alivorte: kie elektronoj trafas la ekranon, tiu ĉi lumiĝas.

Per la ĝis nun priskribita sistemo ni do povas vidigi sur la ekrano punkton, kies lumintenson ni kapablas simple reguli per la elektra tensio inter la katodo kaj ties ĉirkaŭanta skatoleto.

Kiel ni povas movi la lumpunkton sur la ekrano?

Tiucele ni uzu principon menciitan. Kutime en televidilo oni uzas ŝanĝiĝantan magnetan kampon por movi la elektronfaskon. En osciloskopo (mezuraparato, en kiu elektraj fenomenoj videblas sur ekrano) oni uzas alian principon: la fasko estas altirata kaj repuŝata de elektra kampo. Ĉar moviĝantaj elektronoj konsistigas elektran kurenton, ni povas puŝi ilin aplikante magnetan kampon laŭlonge de kaj orte al ilia vojo.

Vertikala magnetna kampo estigas horizontalan forton sur la elektronfluo. Magnetan kampon ni povas estiĝi per elektra kurento laŭ la principo ke magnetna kampo ĉirkaŭas elektran kurenton.

Por ekhavi sufiĉe grandan magnetan kampon ni sendos elektran kurenton tra bobeno da izolita kupra drato. La magnetna kampo de unu volvaĵo adiciĝas al tiu de najbaraj volvaĵoj. La rezulto estas magnetna kampo, centriĝanta laŭ la akso de la bobeno.

Se ni daŭre ŝanĝas la elektran kurenton tra la (fizike vertikal-aksa) bobeno, la fasko estigas horizontalan lumstrion sur la ekrano.

Sendante kurenton grandigantan laŭ la tempo de negativa valoro al pozitiva valoro ni do kapablas desegni strion tra la tuta ekrano. Se ni aplikas la bildosignalon el la sendilo al la katodo, ni povas reguli la intenson de la lumpunkto, kaj ni revidas la elsenditan strion.

Per simila sistemo ni povas movi la faskon en vertikala direkto per (fizike horizontala) bobeno, por ke la dua strio aperu sub la unua, ktp.

Post kompleta bildo oni elsendas pli longan sinkronigan pulson por anonci la bildofinon.

Ĉe alveno de sinkroniga linipulso, la linidefleka kurento rapide resaltu al sia komenca valoro: la lumpunkto aperu maldekstre sur la ekrano. Ĉe alveno de la bildofina pulso la bildodefleka kurento resaltu al sia komenca valoro: la lumstrio aperu supre sur la ekrano.

Fakte oni sendas en sekundo 25 kompletajn bildojn. Sed por eviti la flirtadon de la bildo oni sendas 50 tiel nomitajn framojn. En unua framio oni sendas la liniojn 1, 3, 5, ..., 625, do la malparajn liniojn kaj en posta framio oni sendas la liniojn 2, 4, 6, ... Tiamaniere oni ricevas pli kvietajn bildojn. Tiu principo estas nomata interliniigo.

Per tia sistemo oni sendis griznuancajn bildojn. Sed intertempe ni jam delonge rigardas al koloraj bildoj. Kiu iam rigardis de proksime al kolortelevidila ekrano per lupeo certe rimarkis ke ĝi konsistas el apartaj bildopunktoj: ruĝaj, verdaj kaj bluaj laŭ la adicia kolorprincipo. Kiam la tri apudaj bilderoj lumas, ni vidas (de malproksime) blankan punkton. Komprenible se neniu el la tri lumas, ni vidas nigran punkton. Kiam lumas la ruĝa kaj la verda ni vidas flavan punkton. Kiam lumas la ruĝa kaj la blua ni vidas purpuran punkton. Kiam lumas la verda kaj la blua ni vidas ... verdbluan punkton.

Eblas reprodukti ĉiujn kolornuancojn per kombino de la tri ĉefaj koloroj po iom pli aŭ malpli forta.



En kolortelevidila bildotubo estas tri kanonoj. ĉiu el ili estas stirata de aparta elektra signalo. Inter la kanonoj kaj la ekrano troviĝas 'krado' por ke la elektronoj el la 'ruĝa' kanono trafu nur la ruĝajn ekranpunktojn, ktp. Oni povus kompreni ke por transsendi kolorbildon necesas tri sendiloj, eĉ 4, ĉar ni deziras samtempe aŭskulti al tio, kion diras la bildoj.

Fakte la 4 sendotaj signaloj estas kombinitaj en la sendilo tiamaniere ke ili ankaŭ taŭgu en malnovaj nigra-blankaj riceviloj.

La kombina sistemo estas komplika kaj bedaŭrinde ne en ĉiuj landoj la problemo estis solvita laŭ sama sistemo.

Kompreneble ekzistas striktaj normoj en ĉiu sistemo pri precizaj daŭro kaj valoroj de sinkronigaj pulsoj, nombro da linioj, la nombro da framoj en sekundo, k.t.p.

Oni do bezonas ege komplikajn sistemojn por 'traduki' ekzemple usonajn (NTSC) bildojn (60 en sekundo) al PAL aŭ SECAM (50 en sekundo) kaj la rezulto ofte estas ne kontentiga.

Leo De Cooman



Gathamuga en Nepalo

En Nepalo, precipe en la Katmando-Valo, la tria de aŭgusto 2005 estas la tago forigi nebonvenajn malbonajn elementojn de hejmoj. La speciala festivalo nomiĝas "Gathamuga", aŭ, kiel ne-Nevaranoj vokas, Gathemangal.

Tiun tagon oni starigas formon de diablo "Gathamuga" farita per kano kaj oni metas ĝin ĉe ĉiu vojkruĉejo, kun granda masko kaj ankaŭ pentrita bildo de granda seksorgano! Kelkaj el ili estas viraj kaj kelkaj estas inaj.

La lokaj knaboj diras ke hodiaŭ la diablo mortas kaj kolektas monon por funebri lin/ŝin. Vespere ili trovas iun knabon kiu aktoras kiel lia filo kaj kolektas monon kaj metas fajron sur la kana figuro kaj tiras ĝin ĝis la riverbordo. Ja estas gaja kaj iomete hontiga, pro nemodestaj krioj de knaboj. Nokte, oni preparas vazojn kun specialaj materialoj kaj metas sur ĝi lampon. Ili diras ke estas manĝaĵo por la diabloj kaj lasas ilin sur vojkruĉejoj, esperante ke le diabloj estu sataj kaj le hejmoj restu feliĉaj sen ilia ĉagreno. Onidire, tiun tagon nokte ŝorĉistoj praktikas nigran magion.



Mi memoras ke mi iam verkis artikolon pri "Gathamuga" en Montejo kiam ĝi aperadis, antaŭ eble 12 jaroj.

Razen Manandhar el Nepalo



Ĉeu vi sciis ... / Wist je dat...

... in Wales het plaatsje

'Llanfairpwllgwyngyllgogerychwyrndrobwllllantysiliogogoch' vaak genoemd wordt als langste plaatsnaam ter wereld, maar dat hij in werkelijkheid pas op de derde plaats staat.

... deze plaatsnaam, letterlijk vertaald, **'St Mary's Kerk in de holte van de witte hazelaar bij de snelle maalstroom en de kerk van St. Tysilio bij de rode grot'** betekent.

De naam bestaat pas sinds omstreeks 1860. De plaatselijke raad wilde de langste naam van welk treinstation dan ook in het land hebben.

Oorspronkelijke heette het gewoon Llanfair Pwllgwyngyll, wat al aardig lastig is voor mensen die de laterale affricaat ll niet machtig zijn (zoals de Engelsen). Het is een soort stemloze geblazen l-klank.

... la plej longa loknomo en la mondo estas

'Krunghemahanakornamornratanakosinmahintarayutthayamahadil okphopnopparatrajathaniburimudomrajaniwismahasatharnamorn phimarnavataransathitsakkattiyavisanukamprasit'.

Tiu ĉi loko troviĝas en Tajlando kaj ĝia nomo longas 163 literojn!!!

... Vikipedio plej furoras en la esperanta reto. Ĝi dum la jaro 2004 kredeble estis la plej populara esperant-lingva retejo, kun proksimume 3.000 vizitoj ĉiutage.

... populara estis ankaŭ Ĝangalo. Ie meze en la statistika komparo troviĝas UEA kun 760 vizitoj tage.

... dat er een vertaalbureau bestaat met de naam Esperanto?

Zij vertalen uit/naar het Amerikaans, Amhaars, Arabisch, Armeens, Bulgaars, Chinees, Deens, Duits, Engels, Ests, Farsi, Fins, Frans, Grieks, Hebreeuws, Hongaars, Indonesisch, Italiaans, Japans, Khmer, Koerdisch, Kroatisch, Marokkaans, Lets, Litouws, Nederlands, Noors, Perzisch, Pools, Portugees, Roemeens, Russisch, Sloveens, Slowaaks, Spaans, Tsjechisch, Turks, Vietnamees, Zweeds.

Alleen Esperanto kan je hier nergens als taal vinden... vreemd toch? ■



La vintro nun for-pasis, A-pril' ne estas plu. La
 majo fine venis, kaj vokas jam ku-ku'! Ku-ku'! Ku-ku'! A-
 pril' ne estas plu, La majo fine venis, kaj vokas jam ku-ku'!

KUKU' !

La vintro nun forpasis,
 April' ne estas plu,
 La majo fine venis
 Kaj vokas jam kuku'!

Tra la fenestro ĉien
 Knabin' rigardas, ĉu
 Alvenos la fianĉo,
 Se aŭdas ŝi kuku' !

- Kuku'! Kuku'!
 - April' ne estas plu,
 - La majo fine venis
 -Kaj vokas jam kuku'!

- Kuku'! Kuku'!
 - April' ne estas plu,
 - La majo fine venis
 -Kaj vokas jam kuku'!



Jen supre sur la monto
 Ne estas neĝo plu.
 Komencis fari neston
 Vokanto de kuku' !

Mi ĉiam al vi diris,
 Ke maj-ĉiela blu'
 En ĉiuj vekas amon,
 Dum sonas la kuku'!

- Kuku'! Kuku'!...
 - April' ne estas plu,
 - La majo fine venis
 -Kaj vokas jam kuku'!

- Kuku'! Kuku'!
 - April' ne estas plu,
 - La majo fine venis
 -Kaj vokas jam kuku'!



Prelego*Utopia*

Mi partoprenas en Esperanto-kongreso. Estas antaŭtagmezo nun kaj mi sidas en prelego. Sed mi plu lacas pro la antaŭa vespero, ĉi tie mi estas ja en Esperanto-kongreso, vi scias kiel tie estas. Malfacilas atente aŭskultadi. Do kion fari?

Pensoj ekvagadas, ŝvebas for, el la klimatizata salono, en varman sunplenan eksteron. Tra la fenestroj enpenetras urbaj sonoj. Ie apude laboristo boras truojn tra asfalto, aŭtoj veturadas tien-reen, infanaj voĉetoj inter si kvakas sub la fenestro.

Sed tio ne malhelpas min pluvagadi pli malproksimen. Revenas memoroj pri la hieraŭa ekskurso. Ni vizitis muzeon pri bizanca kulturo, seriozan, tro seriozan, sed ne tro ĝenas seriozeco, ĉion eblas rigardi per iom spicita rigardo por redukti ĝin al pli homeca nivelo, eĉ ĝuinda. Pli gravis la oranĝarbo en la muzea ĝardeno ol la tamen bele kaj lukse prezentitaj eksponaĵoj, pli gravas la marmoro kaj ligno sur la planko ol tiuj en la muzeaj ŝrankoj, pli gravas la demando pri


la aĝo de la gardistinoj ol pri tiu de la oraj bizancaj moneroj.

Post la muzeo ni veturis al kabo, por rigardi la restaĵojn de templo de kiu restis eble 15 el la originaj 78 kolonoj. Sed ankaŭ estis tie trinkejo plenaera kaj bela sunsubiro, eblis aĉeti bildkartojn kaj magneton memorigan pri la loko kaj lando. La kolonoj taŭgis precipe por snoba foto kiu klarigos al tiuj kiuj postrestis hejme ke "ni estis tie". Estu klare kio plej gravas al turisto.

Reveno post la deka jam, ankoraŭ ni ne vespermanĝis, do al

restoracio, kie la vino gajigis la etoson. Kvazaŭ por tio vere ankoraŭ necesus vino.

Aj, prefere mia atento revenu al la prelego, ja on klarigas nun pri la kvara virino en la vivo de iu imperiestro, eble kelkaj sukaj detaloj aldoniĝos. Aliaj aŭskultantoj ankaŭ vekigis, la salono komencas zumi kaj eĉ kelkaj komencas interveni. Ve, sukaj detaloj ne venas, ankaŭ nun ĉi tiuj uloj restas artefarite tro seriozaj. Do tamen mi denove lasu pensojn ekvagadi kaj eskapi la ĉambron. Ekstere la suno plu brilas. ■



België – Belgique
P.B.
3000 Leuven 1
2/2668

Esperanto 3000

Tweemaandelijks tijdschrift

Augustus 2005

V.U. Koen Vanhoof, Milsestraat 26, 3053 Haasrode

jr. 26 nr. 4

Dumonata revuo

Aŭgusto 2005

Afgifte: 3000 Leuven 1

En ĉi tiu numero:

Mesaĝo de la litova prezidanto

Poemo de Mikaelo Bronŝtejn

Onze cursussen

Kiel funkciaĵo de televido


Gathamuga en Nepalo

Ĉu vi sciis ke...?

Kuku

Utopia

**Kandidaat-cursisten
Esperanto verwijs je
naar 010 / 860 112 of
esperanto3000@esperan
to.be**



Programma Esperanto 3000 vzw

Alle activiteiten vinden plaats in het cultureel centrum 'Romaanse Poort',
Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, tenzij anders vermeld.

Het programma van de Vespero 3000 begint om 20 uur, welkom vanaf
19.30 uur

Za.8/10 + 2o.9/10	Spoedcursus Esperanto (in Winksele) Voor beginners! <u>ZIE PAGINA 10</u> Snel nog inschrijven: marc@esperanto.be	9.00 - 17.00
Ma.10/10	Start Avondcursus Esperanto (in Winksele) Voor beginners! Snel: <u>ZIE PAGINA 10</u>	19.30 - 22.00
Wo.12/10	Vespero 3000: Cor Willems Historia superrigardo de la folio paleontologio	19.30 - 22.00
Wo.26/10	Vervolgocursus Esperanto, konversacio/gramatiko	20.00 - 22.00
Wo.9/11	Vespero 3000: Frederik Van Den Brande Werking van het Comité Jean Pain / composteren	19.30 - 22.00
Wo.23/11	Vervolgocursus Esperanto, konversacio/gramatiko	20.00 - 22.00

Wo.14/12	Vespero 3000: Zamenhofavond Programma volgt, zeker niet te missen! Laatste bijeenkomst van dit jaar!	19.30 - 22.00
----------	--	---------------

ESPERANTO 3000

revuo de Esperanto 3000 vzw Leuven,
asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo
aperas 6-foje en la jaro

**Kontaktadreso /
Contactadressen**

esperanto3000@esperanto.be
Baron Descamps laan 77, 3018 Wijgmaal
Roger Goris (sekr.), Rue Ménada 44, 1320
Hamme-Mille ☎ 010 860 112;
r.goris@versateladsl.be
Frans Croon (voorz.), Bukenstraat 16,
1910 Kampenhout-Buken ☎ 016 655 944;
frans.croon@kampenhout.be

**Membreco / Lidmaatschap
E.3000**

membro/lid Eo3000 + FEL = € 20,00 =
Eo3000, Horizon-taal, JEN (ĝis 29-jara)
nieuwsbrief = gratis: zie onze webstek
http://www.esperanto.be/esperanto3000/

**Membreco / Lidmaatschap
UEA**

membro/lid UEA = € 9,00
same/idem + jarlibro = € 22,00
same/idem + Esperanto € 55,00

**Abonoj / Abonnementen
(2005)**

Esperanto 3000 = € 10,00 (nl/eo)
(alleen voor FEL-leden via andere clubs)
Horizon-taal = € 20,00 (nl/eo)
Monato = € 44,00, por ĉiuj (eo)
Ret-Monato = € 26,40, por ĉiuj (eo)
Agenda "La Jaro" € 5,00 (eo)
Enigma € 4,50 por 2 numeroj (eo)
Vertikale = € 5,00, por aktivuloj (eo)
Esperanto (UEA) = € 35,00 (eo)
Juna Amiko = € 14,00, por infanoj (eo)
Ret-info = € 21,00 (eo)
La gazeto (OSIEK) = € 27,00 (eo)
La Kancerkliniko = € 22,00 (eo)
Kontakto = € 21,00, komencantoj (eo)
Komencanto = € 15,00, komencantoj (eo)

Reklamo / Reclame

1 p. € 9, 1/2 p. € 5, 1/4 p. € 3, 1/8 p. € 2
5x la prezo: tuta jaro / 5x de prijs: heel jaar

Generale / Allerlei

Pagante bonvolu klare indiki la deziratajn

De la (provizora) redakcio

Het jaareinde nadert weer met rasse
schreden en wat doe je dan zoal met
de feesten?

Kerst vieren samen met familie!

Maar dan blijven er nog oudejaars-
avond en nieuwjaarsdag over, een
periode die men graag tussen
vrienden doorbrengt.

Daarom... kom met ons mee de
overgang van 2005 naar 2006
vieren in Trier, samen met onze
Esperantovrienden uit verre en
minder verre landen.

Kijk dus zeker op pagina 16 voor
meer informatie of stuur gewoon
een e-mailtje naar
esperanto3000@esperanto.be

Je kan nog Esperanto leren tegen
dan! De spoedcursus is **NU**, de
avondcursus start maandag.

Zie snel op pagina 10!

De redactie.

Kunlaboris, alfabete:

Helena Van der Steen (ĉefredakto-
ro), Marc Vanden Bempt (enpaĝigo,
sendado), Nele Hiers (nalezen), la
aŭtoroj (vidu ĉe la artikoloj).

kategoriojn / Gelieve bij betaling duidelijk de gewenste categorieën aan te geven.

Konto/rekening : 734-3331944-03 de/ van Esperanto 3000 vzw, 3000 Leuven

Pri tekstoj nur la sendintoj respondecas / Voor teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk

Het woord is aan de voorzitter:

Het weer verraadt het nog niet maar het korten van de dagen geeft toch aan dat herfst en winter in aantocht zijn. Doet dit zinnetje, beste lezer, een belletje bij je rinkelen? Dan lees je het clubblad grondig want op drie woorden na is het gewoon de gekopieerde intro van het maartse voorwoord.

De toen aangekondigde activiteiten zijn intussen grotendeels voorbij. Zowel Bulonjo als UK-Vilnio zijn een groot succes geworden.

Er is buiten Esperantujo ook heel wat gebeurd in de wereld. De naam Katrina is zover ons collectief geheugen reikt, maar dat is dikwijls minder ver dan we denken, gelinkt aan de tornadoramp die New Orleans heeft getroffen. Hier te lande heeft regenval ook een flink aantal mensen natte voeten, en meer, bezorgd. Maar realiseren we ons wel dat er langsheen de Donau in Centraal-Europa even erge rampen gebeurd zijn als in de USA?

Sommige commentaren zien in Katrina al een keerpunt, het begin van de ‘Val van het US-Imperium’, en menen al te moeten juichen. Ze trekken dan vergelijkingen met Rijken uit het verleden. Hierbij moet dan toch opgemerkt worden dat tussen het keerpunt en de val er meestal nog een hele tijd verliep; zoiets van meerdere decennia. Geschiedenis moet je goed en met de juiste perspectiefbril lezen. En bovenal hebben we geen belang bij de val van de USA. Als dit ‘keerpunt’ de Yankees maar leert dat zij een plaats hebben TUSSEN de ‘gemeenschap der volkeren’. Het mag dan wel een vooraanstaande plaats zijn! Maar liefst binnen een gemeenschap der volkeren die een neutrale gemeenschappelijke tweede taal gebruikt voor intercommunicatie.

En om tot dit inzicht en dit ideaal te komen heeft men liefst geen enkele (wereld)oorlog meer nodig.

En la mondon venu nova sento!

Frans CROON, voorzitter

Mia vojaĝo al Vilno

Per aŭto ni forveturis al Litovio. Komence ni haltis en Mažeikiai (urbo en la norda parto de Litivo), tranoktis ĉe tre agrabla esperanton parolanta familo (kiu regalas nin per festa manĝo) en la najbaraĵo de la urbo kaj vizitis iomete la regionon.



Koran dankon al niaj lokaj gvidantoj !

Survoje al Vilno ni vizitis Šiauliai. Ĝi estas la kvara granda urbo de Litovio, kaj la tre vigla ĉefstrato estas piediranta.

En la urbo funkcias kelkaj originalaj muzeoj, el kiuj la malgrandan katon muzeon ni vizitis. Milojn da katoj mi vidis ... el porcelano, ligno, sukceso, kristalo, pluŝo ktp. kaj ankaŭ pli ol 4000 poemojn pri katoj



En na najbaraĵo de Šiauliai, ni haltis kaj vizitis la faman Krucmonteton.

La 8-10 metroj alta monteto nombras kelkcentmil diversgrandajn krucojn kaj krucetojn.

La unuaj krucoj estis starigitaj post la ribeloj de 1831 kaj 1863.

Ĝi fariĝis sankta loko ekde la 19a jarcento (1850), eĉ la papo Johano Paŭlo la Dua vizitis ĝin en 1993.

Dum la sovieta reĝimo en 1961 ĝi estis detruita. La registaro decidis kaj plenumis tion, sed dum la nokto la loĝantaro remetis denove aliajn krucojn.



Nun al Vilno kaj la universala kongreso !

Dum la kongreso mi tranoktis en studenta domo en Vilno, tuj trovis najbaron bushaltejon kaj veturis al la kongresejo.

La unuan tagon, pli ol 2.300 partoprenantoj ricevis informojn, kongresmaterialojn, renkontis amikojn, interkisis, babilis.....nekredeble! La ĉefa kongresejo, en la Real Hotel Lietuva, pleniĝadis per esperantistoj.

Vespere okazis interkona vespero sur la placo apud la kongresejo. Litova popola ensemblo dancis kaj ludis, kaj ni rigardis, kundancis, kaj denove babilis ☺

Dimanĉe la 24-an de julio matene okazis la solena malfermo de la kongreso, en alia grandega kongresejo – Siemens Arena. La bonvena mesaĝo de la Litova prezidanto (vi legis ĝin en la antaŭa revuo) estis legita de la ministro pri eksterlandoj aferoj. Kelkaj estraranoj parolis pri diversaj aferoj kaj pri la kongresa temo « Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado »
Je la fino, sekvis mallongaj salutoj de landaj reprezentantoj.

Kiel kutime okazis ekumena diservo en preĝejo, sed tiun mi ne ĉeestis.



Dimanĉe vespere okazis nacia vespero, denove en la Siemens Arena. Estis prezentado de diversaj litovaj naciaj kostumoj, sekvata de la nacia ensemblo « Lietuva » kun dancoj kaj kantoj. Ĝi estis tre interesa – vigla , amuza, donanta agrablan impreson pri la popolaj litovaj muziko kaj dancoj.

Dum la sekvonta semajno mi partoprenis nur kelkajn kongresajn programerojn.

Mi tre ŝatis la artajn aranĝojn en la profesia filharmonia salono « Bulonjo ».

La teatraĵo « Kiel mortigi sian edzinon » ege plaĉis al mi, Serbiaj aktoroj prezentis la spektaklon. Ilia prononcado estis tre laŭta kaj bona, do ni povis plene ĝui la komedion. ☺

Sed dum la teatraĵo « Familia Etoso » mi, kaj multaj aliaj homoj, forkuris (la prononcado de la francaj aktoroj estis tiel malbona, kaj mallaŭta ke oni ne povis ĉion bone kompreni) ☹

Koncertoj de la litova familia muzikgrupo « Asorti », de la nederlanda grupo « Akordo », kaj de la “Koruso de Litova Scienca Akademio” estis sublimaj!

La lunda tago finiĝis per la bankedo (pagata, do mi ne ĉeestis) kaj balo (senpaga, do mi kompreneble ĉeestis).

Balo estis... verdire diskoteko ☺, kaj okazis en la klubo Mambo (sub la ponto, apud la kongresejo)

Mi bedaŭrinde maltrafis la prelegon de profesoro Amri Wandel titolita ”La Lakta Vojo – nia hejmo en la universo”. Ĝi okazis en salono Lapenna kaj mi ne trovis ĝin. Poste mi aŭdis ke ĝi estis en la planetario. ☹

Pri la pli “serioza” parto, mi ne tro parolas!

Mi iomete butikumis en la libroservo, ĉeestis le prelegon pri Budhanoj kaj parto de Cseh-kurso sed estis tro da homoj en tro varmaj malgrandaj salonoj, do mi forkuris !



Anstataŭe mi decidis vagadi tra la malnova parto de la urbo, kiu laŭ mi estas vere pitoreska.

Nepre utila: ni ricevis belan, tradukitan en Esperanton, gvidlibron de Vilno!


La kongreso estis videbla en la urbo pere de diversaj Esperantaj afiŝoj, kaj pere de homoj, portantaj la kongresan insignon.

En ĉiu restaŭracio, strato, muzeo mi vidis homojn kun la fama kongres-ŝildo !

Unue mi vizitis la Muzeon de Genocidaj Viktimoj, dum la nazia tempo en ĝi lokiĝis gestapo, kaj dum soveta okupacio - la KGB.

En la kelo troviĝis la aŭtentikaj ĉambroj en kiuj la kaptitaj homoj estis enkarcerigitaj kaj « esplordemanditaj » antaŭ esti mortigitaj aŭ deportitaj!!

Poste mi vizitis la urbon mem, kun malnovaj konstruaĵoj kaj multaj preĝejoj.



Simboloj de Vilno estas surmonte staranta kastelo de Gedeminas kaj ĉe la montpiedo blanka brilanta arkikatedralo, kun la reĝa maŭzoleo sonorilejo. Tute apude troviĝas la monumento al la fondinto de Vilno, la Grandduko Gedeminas.

Onidire en Vilno estis 200 preĝejoj, restis nur 40. Tamen en la malnova urboparto kie ajn vi rigardas, ĉie vi ekvidos turojn de preĝejoj aŭ krucojn



En la urbo mem mi vidis ege strangan indikilon!!

Kompreneble mi aĉetis bildkartojn, kaj uzis la Zamenhofajn poŝtmarkojn.



La belgaj partoprenantoj al la kongreso estis invititaj de la ambasadoro de Belgio, Marie-Louise Van Herk, kiu parolas Esperanton, lernis ĝin ĉe Esperanto 3000 en Leuven. La akcepto en la ambasadejo estis grandega!

La kongresa merkredo estas dediĉita al ekskursoj. La belga karavano de Antverpeno decidis veturi al la Eŭropa parko kaj al la geografia Centro de Eŭropo, kaj mi kunveturis.

En 1989 la Nacia Geografia Instituto de Francio malkovris ke la geografiaj koordinatoj de la Eŭropa centro estas 54 gradoj 55 minutoj da norda latitudo kaj 25 gradoj 19 minutoj da orienta longitudo, kaj konfirmis ke tiu ĉi punkto situas je 24 km for de Vilno.

Provu mem! Se vi strekos vertikalan linion ekde la plej norda punkto en Norvegio ĝis Grekio sude de Eŭropo kaj la horizontalan ekde Irlando ĝis Uralo, en ilia krucpunkto vi trovos Vilnon!

Ĝin markas skulptaĵo, farita kiel, ke vizitantoj povu tuŝi punkton de Eŭropa Centro.

Proksime de tiu loko estas fondita Parko de Eŭropa Centro.

La Eŭropa parko estas plenaera muzeo de 55ha. kun pli ol 90 gigantaj skulptaĵoj.

La celo estas per arta lingvo inspiri sencon al la geografia centro de Eŭropo.



Vendredon, la kongresa tago finiĝis per Internacia Arta Vespero okazinta denove en la granda Arena Siemens.

La Internacia Koruso malfermis la vesperon. Kantoj kaj teatraĵoj estis prezentitaj de "talentuloj" kaj la vespero finiĝis per fama aktorino, (mi jam forgesis la nomon) kiu ludis teatraĵon (laŭ mi tiu parto estis tro serioza).

Sabate komenciĝis la lasta kongresa punkto – la solena fermo!

Venis infanoj, kiuj partoprenis Infanan Esperanto-Kongreseton por saluti la

publikon kaj kanti kelkajn kantojn kaj fine la transdono de esperanta flago al la urbestro de Florencio en Italio, kie okazos la sekvonta UK en 2006.



Post la kongreso mi veturis kun la belga karavano tra Pollando kaj Germanio al Belgio.

En Pollando ni haltis dum kelkaj tagoj, kaj vizitis la rekonstruitan belan urbon de Varsovio. La malnova parto de la urbo estis detruita dum la milito sed rekonstruita laŭ originalaj planoj.

En Krakau ni vagadis tra la urbo, kaj en Wieliczka ni vizitis la faman salminejon.

Auschwitz – Birkenau

La koncentrejo (laŭ mi, tro rapida unutaga vizito) restos eterne en mia memoro.

En Dresdeno, Germanio, nia ĉiĉerono Rolf Deke tre bone gvidis nin, kaj akceptis verki malgrandan artikolon por nia revuo.



Finfine la ferio finiĝis kaj mi denove revenis al Antverpeno, preta por nova kongreso kaj vojago!

Helena Van der Steen, Belgio



Kiam lastfoje mi estis veturanta per trajno – iu skoto komencis la rakontadon al sia amiko – la kupeon eniris konduktoro kaj li tiel ekrigardis min, kvazaŭ mi estus sen bileto.

- Kaj vi?
- Mi ekrigardis lin kvazaŭ mi estus posedanta la bileton!





Esperanto voor beginners

De spoedcursus vindt dit weekeinde plaats.

Ken je iemand die Esperanto wilt leren en dit weekeinde toevallig vrij is? Snel e-mailen naar marc@esperanto.be of even 0495/16.97.98 opbellen en hij of zij kan er nog bij!

Een snelle beslissing: de start van een levenslange
ervaring

De avondcursus start op maandag 10 oktober

(twee weken later dan tevoren aangekondigd).



Ook hier kan je nog aansluiten, via dezelfde weg.




Ĉu vi sciis ke ... / Wist je dat...

... de persoonliĝkheid voor de mens is wat de geur is
voor een bloem

... Coca Cola vroeger cocaïne bevatte. Pas in 1929 werd
dit drankje cocaïnevrij gemaakt

... la kvakado de anaso neniam kaŭzas eĥon kaj neniu scias kial



... al porko fizike ne eblas rigardi la ĉielon

... olifanten de enige dieren zijn die niet kunnen springen en dat is maar goed ook ☺

... knabinon 5-jaran vi portas al lito kaj rakontas fabelon, al virino 17-jara vi rakontas fabelon por enlitigi ŝin, virino 25-jara estas fabelo en la lito kaj virino 35-jara diras al vi : "ne rakontu fabelojn, venu en la liton"

Kunst is een leugen die ons de waarheid doet realiseren

Pablo Picasso

Kelkaj artikoloj el « Vilna Sonoro » *(la kongresa gazeteto)*

Rusa kanalo la unua raportis

La 22an de julio en sia vespera informelsendo « Litovskoje Vremia » en ruslingve emisiata televida kanalo "1 Baltijskij Kanal" la unua raportis pri la sabate komenĉiĝanta Universala kongreso en Vilno.

TV-jurnalistoj videis en la kongresejo kaj surstrate, informis pri la internacia lingvo kaj intervjuis viceprezidanton de Litova Esperanto-Asocio Stasys Kruzinaŭskas, kiu interalie menciis, ke lerni Esperanton multe pli facilas ol nun tre popularan anglan lingvon. Koredevena esperantisto Chloe Taesok en Esperanto kaj la rusa lingvo invitis al la kongreso.

Lunde Povilas Jegorovas, LKK-prezidanto partoprenos en la matena programo « Labas rytas » de la nacia LTV.



Vetero en la kongresa semajno favoros

La lastan tagon antaŭ la komenco de la kongreso multajn gastojn seniluziigis litova griza ĉielo, foja pluvo kaj freŝeĉo. Tamen la veterprognozoj por la kongresa semajno favoros

por distroj, ekskursoj kaj amikaj kontaktoj.

Pliboniĝo komenciĝis jam sabate. Pluvos malpli. Malgraŭ ke nuboj ofte kaŝos sunon, varmoĝos pli kaj pli.

Ekde lundo temperaturo ĉiutage devus superi +25 gradojn kaj jaŭde jam atingi +30.



Estu bone, se estu tiel, tamen en Litovio vetero ofte estas malfacile prognozebla.



Tai Ĉi

Vizito de A. Zuokas, urbestro de Vilno, en la Pekina UK estis ankaŭ fruktodona al urbanoj de Vilno.

Li invitis ĉinajn majstrojn instrui litovajn trejnistojn. Ekde majo oni povas praktiki mirindan sanigan

sistemon eĉ en 11 diversaj lokoj dufoje ĉiutage. Sed unu loko estas plej oportuna por kongresanoj – dekstre de la blanka Ponto. Trejnado estas senpaga por ĉiuj volontuloj.

Poŝtmarka ekspozicio

La tutan monaton en Vilno estas eksponata E-ekspozicio de poŝtmarkoj en la Centra Poŝtejo en Gedimino avenuo.

Ĝia aŭtoro estas litova esperantisto Marius Dyglys.

Bonvolu viziti!



Infanoj kunestas fore

Dum kongresanoj kongresas en Vilnius, en Ukumas, en arbaro norde de Vilno, 39 infanoj kaj 8 gvidantoj ĝuas apudlagan restadon en la 36-a Internacia Infana Kongreseto.

Ĉiutage ili kantas, orkestras, sportas, ludas, naĝas kaj promenas.

La lingve malpli fortaj ricevis paroligan horojn, ĉiuvespere dezirantoj aŭskultas rakontojn.

Apartaĵoj estis vizito de 50-kapa pola kanta-danca grupo, akvobiciklado kaj vespera fajro.

Pli ol la duono de la infanoj venas el E-familioj, do la lingva nivelo estas plejparte bona – despli ke la infanoj venas el 13 landoj, inkluzive de foraj, kiel Kazahio, Japanio kaj Kanado



Nova interkultura paro de UK

Sepideh Laa (el Irano) kaj Roberto Stalzer (el Usono) renkontiĝis unue en la 89-a UK en Pekino kaj gefianĉiĝis ĵus en Vilno.

Afrika agado

Sub gvido de Agnes Coene-Geelen (Belgio) marde matene okazis renkontiĝo pri Afrika agado. Tie du togolandanoj Mensah Agbemadon-Attigbe kaj Koffi Doumégnon prezentis la laboron de la Instituto

Zamenhof kaj la Afrika oficejo en Lomé.

Ili ankaŭ raportis pri la granda intereso pri Esperanto en pluraj landoj de Afriko.

Post la prezentado ili respondis plurajn demandojn kiel konkrete helpi al afrikaj esperantistoj.

Kongresaj poŝtmarkoj


Okaze de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, la Litova Poŝto eldonis novan poŝtmarkon. Ĝi estas la portreto de Ludoviko Zamenhof kaj la emblemo de la jubilea UK.

La poŝtmarko havas valoron de unu lido (ĉirkaŭ triono de eŭro)

Jubileanto

S-ro Momèilo Krstić el Vrtište (Serbio kaj Montenegro) estas 20-foja kongresano.

Dum la Solena Inaŭguro li salutis la Kongreson per jenaj vortoj: « Pasintjare en Ĉinio mi portis ruĝan ĉapon, kaj popolan serban vestaĵon. Nun mi portas verdan Esperantan ĉapon – tiel mi kunigis du respublikojn Serbio kaj Montenegro. »




Monato en Vilno

Geamikoj, iom post iom ni sukcesas mezuri la rezultojn post la UK en Vilno. Ĉi jare unuafoje la budo de **Monato** estis ekipita ĉefe per volontuloj. Tio montriĝis fruktedona.

La volontuloj montris energion kaj iniciatemon, kiun fiksa deĵoranto ne povus elteni dum tuta semajno. Jen rezultoj:

- 239 venditaj provnumeroj
- 17 novaj abonantoj
- 11 reabonoj
- 115 € kolektitaj donacoj por la Abonhelpa Fonduso
- Sennombraj utilaj kontaktoj!



Precipe la novaj abonoj estas ege gravaj. La tradiciaj abonantoj tamen iel pagos, sed la 17 novaj signifas kelkbara gajno. Ankaŭ la enspezoj pro

venditaj provnumeroj kaj la donacoj por Abonhelpa Fonduso signifas konsiderindan gajnon kaj pligrandigas la konatecon de Monato.

Ni elkore dankas la volontulojn pro la laboro kaj precipe pro la entuziasmo en ilia deĵorado.

Amike via Ivo Durwael.

800-jara urbo Dreseno

Mi estis 9-jara knabo, kiam mia naskiĝurbo Dreseno falis en ruinoj (Februaro 1945)

Mi unue ne kredis rekonstruon de la ruinita urbo. Sed ĉiu civitano helpis tuj formeti la rubaĵojn kaj ebligis la unuan novan pulsadon de vivo enurba.

Krom rekonstrui historiajn konstruaĵojn estis grave novkonstrui loĝejojn, lernejojn kaj vivnecesajn objektojn, malgaŭ mankanta mono.

Por revivigi la barokan urbon oni jam komencis en la 1945/46-aj jaraj rekonstrui la mondfaman « Zwinger » kiu 80% detruigis. Aparte grave estis trovi ŝtonskulptistojn aŭ instrui junajn talentojn por tiu nun grava profesio. En 1952 oni finis la rekonstruon de la kronpordego kaj en 1963 la tutan komplekson de « Zwinger »



« Zwinger » : en la 18-a jarcento ĝi servis kiel oranĝerio kaj festludejo por la reĝa kortegaro.

Nun ĝi servas kiel muzeo :

- por pentraĵgalerio (en ĝi la fama « Sikstina Madona » de Raffael)
- porcelanan ekspozicio (inter alie la evoluo de Meissen-porcelano)
- matematika-fizika-salono (horloĝoj, mezuriloj, astronomaj instrumentoj)
- historiaj kirasoj (spadoj, manarmiloj)

Hodiaŭ, post 60 jaroj, ni ĉiuj ĝojas ke ni povas montri al niaj internaciaj gastoj gravan parton de malnova baroka Dreseno.

En Dreseno ekzistas feliĉe ankoraŭ 3 mondfamaj simfoniaj orkestroj, inter ili plej grava la « Saksa Staatskapelle » kaj la « Dresena Filharmonio », ambaŭ gvidataj de mondfamaj dirigentoj.

La unua apartenas fikse al « Semper-operejo », kiu ankaŭ akompanas niajn gekantistojn. La operejo nun rebrilas kiel antaŭ la bombardado, mem ĝi valoras apartan viziton.



Jam en oktobro 2005 oni konsekros la rekonstruitan protestantan Virinpreĝejon », kun ŝtona kupolo (pezo de 9000 tunoj) kaj nova orgeno (4 manualoj, 65 registroj)

Por grandskale prezenti la multajn savitajn trezorojn (oraĵojn, diamantojn, valoraĵojn, bildojn) oni rekonstruas la ampleksan urban kastelon el la 16-a jarcento. Kelkaj mondfamaj eksponaĵoj estas jam videblaj, multaj sekvos.

Mi rekomendas al tiuj vizitantoj kiuj restas pli longe en la urbo veturi al Moritzburgo (ĉaskastelo kun interesa ekspozicio), aŭ urbo Meissen (porcelanfabrikado kaj kastelo), aŭ somera rezidejo Pillnitz (ekspozicio de historiaj mebloj kaj bela parko), ambaŭ ĉe rivero Elbo.

Nia urbo invitas vin, vizitu en 2006, dum la 800-jara datreveno en aŭgusto, la specialan fesprogramon.

Rolf Deke, el Dresdeno



La edzino demandas sian edzon pri la kaŭzo de lia ĉagreno.

- De hodiaŭ la aŭtobusbiletoj estas malpli multekostaj per dek cendoj da eŭroj !
- Kaj pro tio vi ĉagreniĝis? Demandis la edzino
- Nu, jes – respondas la edzo – imagu kiom da mono malpli mi ŝparos nun piedirante al la urbo.





INTERNACIA FESTIVALO **LA JARFINA OFERTO POR** **VI** **27 decembro 2005 - 3** **januaro 2006**

Karaj geamikoj,

Ni bonvenigas vin al la tradicia jarfina festivalo, kiu ĉi tiun fojon okazos en Trier. Ĝuu la internaciecon de la aranĝo kaj konatiĝu pli detale kun la plej malnova urbo en Germanio.




Trier estis fondita de la Romianoj en la jaro 16 a.K. Entute ses romiaj imperiestroj rezidis en Trier kaj pro sia graveco ĝi jam siatempe havis 80.000 loĝantojn. Trier fariĝis la "Dua Romo".

En 100 p.K. konstruiĝis amfiteatro por 20.000 personoj, sekvis « Porta Nigra » en la dua jarcento, ĝi estas la (iama) nordflaka pordego de urbo muro kaj la

ekkonilo de la nuntempa Trier.

Trier nuntempe havas 100.000 loĝantojn. La urba centro kaj la bazaro placo estas unu el la plej belaj en Germanio.



Partoprenu dumtage en interesaj prelegoj pri la kadra temo « Eŭropo pligrandiginta », pri aliaj temoj aŭ paralele en kursoj kaj promenadoj.

Ni antaŭvidas variajn vesperajn ofertojn i.a.:

- **Danc- kaj kantokvarteto el Dagestano** (kun kostumoj)
- **Mikaelo Bronŝtejn el Rusio** (la konata bardo)

- **JoMo el Francio**

Dum niaj promenoj "**dumil paŝoj tra dumil-jara urbo**" vi povas informiĝi pri la diversaj epokoj, ĉefe pri la romia - kaj vi povas ĝui la simpatian nuntempan centron de Trier, ĉio sub gvido de **Brian Moon**.

Brian ankaŭ ĉiĉeronas dum la tuttaga ekskurso (fakultative) al najbara Luksemburgio, kie ni vizitos la pitoreskan urboparton de la ĉefurbo kaj la vinvilaĝon Schengen.

Dum la festivalo, ni tranoktos en komforta junulara hotelo, situanta ĉe la bordo de Mozelo, kun belaj promenvojoj kaj nur 15 min. piedirado de la urba centro kaj vidindaĵoj.

Preskau ĉiuj urbaj (kaj historiaj) vidindaĵoj estas en promena distanco !



Niaj kotizoj inkluzivas
la loĝigon en luksa ĉambro (kun
duŝo kaj necesejo),
tri manĝojn tage,
la programon, plus la
Silvestrajn bufedon kaj Balon!
Festu novjare kun ni!



(Partatempa partopreno eblas laŭ apartaj kondiĉoj)

La aranĝo estas seminario por lingve spertaj personoj, baza kono de Esperanto kaj ĝia uzo estas gravaj.

Laŭdezire okazas paroligaj kaj porkomercantaj kursoj.

La infanoj ĝuas paralelan porinfanan programon gvidatan de kunlaborantoj. Jam 20 infanoj estas aliĝintaj!

Ĝuu la faman IF-etoson en nia E-gastejo "Knajpo" – kaj gustumu niajn diverslandajn bierojn kaj vinojn, koktelojn, kapuĉinon, kafon, kukon ...

Pliaj detaloj kaj aliĝilo en nia retejo: www.internacia-festivalo.de

En la diversaj subpaĝoj vi konatiĝos kun la aktualaj kotizoj, kun la urbo kaj la kadra temo, krome vi povas legi raportojn de partoprenintoj pri la antaŭaj IF-oj, spekti foto-albumojn - kaj tuj aliĝi ...

Informon kaj aliĝon ankaŭ eblas pere de : esperanto3000@esperanto.be

(eblas kunveturi, pluraj membroj el la Lovena klubo partoprenos)

Korajn salutojn kaj bonvenon al vi!

Hans-Dieter Platz (organizanto)

Ĉei nokton dum nokto

(♩-108)



Ŝia nak.tj per nak.tj gai.de.liai gie.do.io.
Ĉi nok-ton dum nok-to la ko-koj ko-ko-kri-is

ŝia nak.ti per nak.ti gai.de.liai gie.do.io. -Ne.ĝie.do.kit
Ĉi nok-ton dum nok-la ko-koj ko-ko-kri-is -ne ko-ko-kri-u

gai.de.liai, ne.trumpin.kit nak.te.les.
ko-ke-toi Ne mal-lon-gi-gu nok-te-ton

Ĉi nokton dum nokto
La kokoj kokokriis (x2)
Ne kokokriu koketoj
Ne mallongigu nokteton.



Tagiĝis aŭroro-
Suniros suneto (x2)
Prenu, fratoj, falĉilojn
Iros falĉi fojneton.



Ankoraŭ ne falĉis
Nek unu falĉstrion (x2)
Sur falĉilo kliniĝis
Sur falĉilo revis mi.

Litova popolkanto

Triona jarcento*Utopia*

Vi hodiaŭ atingas la aĝon de 33 1/3, jen triona jarcento. Rigardu vian tutan vivon. Dividu ĝin en cent egalajn bloketojn. Komparu tiujn bloketojn inter si.

Kelkajn vi prefere neniam travivus, jen nigraj bloketoj. Ili ne estas tro multaj, prenu dudek. Kelkaj estas normalaj, jen bluaj bloketoj. Ili estas la plimulto, ili plireliefigu la aliajn kolorojn. Da ili prenu sesdek.

La pintoj estas ruĝaj bloketoj. Fajre ruĝaj, brilegaj, blindigaj al la okuloj, neforgeseblaj. Pinta sperto, belega sento kaj revo, deziro kiu plenumiĝas. Ili aldonas brilon al via vivo. Prenu dudek.

Via mezviva krizo ankoraŭ foras, jam preparu vin al ĝi, kiel sekvas.

Rigardu viajn 33 1/3 jarojn kaj konstruu vivolinion: cent staketojn longan, dudek ruĝajn, sesdek bluajn kaj dudek nigrajn staketojn. Po unu por ĉiuj kvar monatoj. Tiu kolora linio

bildigas la fluon de via feliĉo. Sed tio estas nur la pasinto.

Rigardu nun la 66 2/3 jarojn kiuj plu venos. Konsentite, estas nur plisimpligo, ni scias ke viaj ambicioj strebas al pli ol cent. Sed kiel modelo cent pli facilas. Denove kreu vian vivolinion: cent staketojn longan, dudek ruĝajn, sesdek bluajn kaj dudek nigrajn staketojn. Po unu staketo por ĉiuj ok monatoj. Tiu kolora linio montras la fluon de viaj atendoj pri feliĉo. Jen via futuro.


Fine rigardu la vivon kiel unu tutaĵon: cent staketojn longan, dudek ruĝajn, sesdek bluajn kaj dudek nigrajn staketojn. Po unu staketo por ĉiu jaro.

Kaj rigardu kie vi mem metis la ruĝajn staketojn. Ĉu la plej belaj jaroj jam pasis? Ĉu vi metis ilin en la futuro? Ĉu ĉirkaŭ hodiaŭ? Kaj kie troviĝas la nigraj staketoj, la nigraj jaroj? Vi vere havas tro da ili: jaro maloftege estas vere hele nigra, male kelkfoje jes vere hele ruĝa, pinta jaro.

Tio estas la bela flanko de la vivo. Pli da ruĝo ol da nigro, pli

da feliĉo ol da konsolo. Kaj plimulto da bluoj inter tiuj kiel bazo kontraste al kiu via feliĉo pli reliefigas.

Same kiel vi mem dismetis ĉiujn tiujn bloketojn, same tiel vi ankaŭ mem kreas vian feliĉon. Mi deziras al vi cent ruĝajn jarojn ■



België – Belgique
P.B.
3000 Leuven 1
2/2668

Esperanto 3000

Tweemaandelijks tijdschrift

Oktober 2005

V.U. Koen Vanhoof, Milsestraat 26, 3053 Haasrode

jr. 26 nr. 5

Dumonata revuo

Oktober 2005

Afgifte : 3000 Leuven 1

En ĉi tiu numero:

Vojaĝo al Vilno

800-jara urbo Dresden

Artikoloj el la Vilna Sonoro

Monato en Vilno

Internacia Festivalo en Trier

Litova popolkanto

Ĉu vi sciis ke...?

Utopia



Info verkrijg je via onze webstek:
www.esperanto.be/esperanto3000/

Dijlepark, Leuven



Programma Esperanto 3000 vzw

Alle activiteiten vinden plaats in het cultureel centrum 'Romaanse Poort',
Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, tenzij anders vermeld.

Het programma van de Vespero 3000 begint om 20 uur, welkom vanaf
19.30 uur

Wo. 14/12	Vespero 3000: Zamenhof vespero ***Petro De Smedt*** ***Zamenhof - la toleremulo*** Met gratis koffie en taart!!! <u>Zie p. 15</u>	19.30 - 22.00
<i>Wij wensen al onze lezers een prettig jaareinde toe....</i>		
Wo. 11/01	Vespero 3000: verassingsavond (<i>na het I.F. ...</i>)	19.30 - 22.00
Wo. 25/01	Vervolgcurcus Esperanto, konversacio & gramatiko	20.00 - 22.00
Wo. 08/02	Vespero 3000: programma volgt	19.30 - 22.00
Za. 18/02	Festo: Semajno de Internacia Amikeco <u>Vidu p. 3</u> Notu ĝin jam en via nova agendo, vi nepre volos ĉeesti ĝin!	

ESPERANTO 3000

revuo de Esperanto 3000 vzw Leuven,
asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo
aperas 6-foje en la jaro

**Kontaktadreso /
Contactadressen**

esperanto3000@esperanto.be
Baron Descamps laan 77, 3018 Wijgmaal
Roger Goris (sekr.), Rue Ménada 44, 1320
Hamme-Mille ☎ 010 860 112;
r.goris@versateladsl.be
Frans Croon (voorz.), Bukenstraat 16,
1910 Kampenhout-Buken ☎ 016 655 944;
frans.croon@kampenhout.be

**Membreco / Lidmaatschap
E.3000**

membro/lid Eo3000 + FEL = € 25,00 =
Eo3000, Horizon-taal, JEN (ĝis 29-jara)
nieuwsbrief = gratis: zie onze webstek
<http://www.esperanto.be/esperanto3000/>

**Membreco / Lidmaatschap
UEA**

membro/lid UEA = € 9,00
same/idem + jarlibro = € 22,00
same/idem + Esperanto € 56,00

**Abonoj / Abonnementen
(2005)**

Esperanto 3000 = € 12,50 (nl/eo)
(alleen voor FEL-leden via andere clubs)
Horizon-taal = € 25,00 (nl/eo)
Monato = € 46,00, por ĉiuj (eo)
Ret-Monato = € 27,60, por ĉiuj (eo)
Agenda "La Jaro" € 5,00 (eo)
Enigmo € 4,50 por 2 numeroj (eo)
Vertikale = € 5,00, por aktivuloj (eo)
Esperanto (UEA) = € 36,00 (eo)
Juna Amiko = € 14,00, por infanoj (eo)
La gazeto (OSIEK) = € 27,00 (eo)
Femina = € 20,00 (eo)
Litova Stelo = € 14,00? (eo)
Kontakto = € 22,00, komencantoj (eo)
Komencanto = € 15,00, komencantoj (eo)

Reklamo / Reclame

1 p. € 9, 1/2 p. € 5, 1/4 p. € 3, 1/8 p. € 2
5x la prezo: tuta jaro / 5x de prijs: heel jaar

Generale / Allerlei

Pagante bonvolu klare indiki la deziratajn
kategoriojn / Gelieve bij betaling duidelijk

**De la (provizora)
redakcio**

Heb jij ook dat zalige kerstgevoel
zodra de sneeuw valt ?

Wel... terwijl ik dit schrijf
dwarrelen de eerst vlokken van deze
winter duchtig naar beneden en ik
droom reeds van sneeuwmannen
maken, sneeuwballen gooien en een
witte kerst.

Lekker de verwarming hoger zetten,
een warme drankje er bij en dan
maar mijmeren.
En dan besef ik opeens wat een
gelukkige mensen wij toch zijn!

Er zijn zoveel kinderen, mannen,
vrouwen die tijdens dit rampjaar
hun huis verloren hebben, in tenten
ondergebracht zijn, kou en honger
lijden....

Laat ons daar even bij stil staan en
hier in België minder zeuren over
pietluttigheden!

De redactie.

Kunlaboris, alfabeto:

Helena Van der Steen (redaktoro),
Marc Vanden Bempt (enpaĝigo &
sendado), Nele Hiers (nalezin), la

de gewenste categorieën aan te geven.
 Konto/rekening : 734-3331944-03 de/ van
 Esperanto 3000 vzw, 3000 Leuven
 Pri tekstoj nur la sendintoj respondecas / Voor
 teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk

aŭtoroj (vidu ĉe la artikoloj).

Het woord is aan de voorzitter:

De topmanifestatie in België, alsof het van de voorzitter zelf kwam:

Esperanto 3000 vzw Leuven invitas vin al la

Belga festo okaze de la **Semajno de Internacia Amikeco (SIA)** **Sabaton la 18an de februaro 2006**

Ontmoetingscentrum Genadedal, Velderblok 2, Kessel-Lo (Lovenen).

Øi estas facile atingebla per aŭto, trajno aŭ publika transporto.

**Kiel kutime ni organizos plenan tagan kaj
 vesperan programon.
 Ankaŭ ne maltrafu la faman lovenan
 vespermanĝon!**

**Temo : "La vivo kun aliaj lingvo-
 parolantoj"**

Antaŭtagmeze aktivulojn atendas la ĝenerala kunsido de la Flandra Esperanto-Ligo. Posttagmeze ĝuu entuziasmajn prelegojn de homoj deventantaj el aliaj landoj kiuj ekloĝis en Belgio kaj ĉi tie trovis sian feliĉon, meze de alilingvanoj, dank' al Esperanto.

La tutan tagon eblos partopreni en serĉpromeno en la tuja ĉirkaŭaĵo de la kunvenejo, kun unuflanke la naturteritorio "Kesselse bergen" kaj aliflanke

la abatejo de Vlierbeek.

Post la fama lovena vespermanĝo magiisto prezentos mirindaĵojn. Por tio ni dankas la grupon el la samnoma Loveno... la Nova.

Sendu vian adreson al Esperanto 3000, R. Ménada 44, 1320 Hamme-Mille, esperanto3000@esperanto.be por ricevi vian personan inviton kaj detalan programon!

Kiel ĉiun duan jaron ni ankaŭ en la 18-a de februaro 2006 invitas kaj atendas ĉiujn esperanto-uzantojn en Belgio. Ankaŭ eksterlandanoj kompreneble ege bonvenas al ĉi tiu festo, kiun ni senpage ofertas al ĉiuj!

La fluganta spagetomonstro.

Toen de redacteur mij vroeg iets te schrijven over wat mij tegenwoordig bezig houdt, dacht ik: niets houdt mij bezig, tenzij dat ik Turks leer, maar daar had ik al over geschreven en daar had ik niets meer over te zeggen.

Maar iets later, toen ik met de fiets naar huis reed, juist toen ik mijn eigen straat binnen kwam, kreeg ik die rode saus van tomaten en pepers over mijn hoofd, en hoorde ik die Stem die zei:

"Verkondig Mijn leer. Laat de mensen kennis maken met Pastafari. Laat ze weten wat de macht is van Mijn noedelige aanhangsels."

En ik kwam thuis, ik knoopte een zakdoek om mijn hoofd, bond een ooglapje voor, en ik zette mij aan het vertalen.

Het resultaat leest u hieronder,

Martin Decaluwe

Malferma letero al la lerneja administrantaro de la ptato de Kansaso

(traduko de la originala letero de la Profeto, publikigita ĉe www.venganza.org)

Mi skribas al vi kun granda zorgo post kiam mi legis pri via konsultado por decidi ĉu la anstataŭa teorio de **Inteligenta Projekto** estu instruata kune kun la teorio de Evoluado. Mi pensas ke ni ĉiuj povas konsenti ke gravas por studentoj ke ili aŭdu plurajn vidpunktojn kaj povu elekti por si tiun teorion kiu al ili ŝajnas la plej senchava. Mi timas tamen, ke la studentoj aŭdos nur unu teorion de **Inteligenta Projekto**.

Ni ne forgesu ke ekzistas pluraj teorioj de **Inteligenta Projekto**.

Mi kaj multaj aliaj tra la mondo forte kredas ke la universo estis kreata de **Fluganta Spagetomonstro**.

Est
sen
esta

Est
estu
ke,
rim

Se
teori
esta



ĉaj ĉion kion ni povas senti. Ni forte
oj kiuj pensigas pri evoluadaj procezoj
nizis.

formale postuli ke tiu anstataŭa teorio
un la du aliaj teorioj. Mi eĉ devas diri
os devigata uzi ĉiujn laŭleĝajn
enas pri kio temas.

ne estas simpla kredo, sed alia scienca
evos instrui nian teorion, ĉar ankaŭ ĝi

Iuj
pli
**obeu vian spagetan
majstron**

www.venganza.org

povus helpi se mi informu vin iom



(ĉu vi esta tuŝita de ĝia nudela elpendaĵo)

Ni havas indikojn ke **Fluganta Spagetomonstro** kreis la universon.

Kompreneble, neniu el ni estis tie por vidi ĝin, sed ni havas skribitajn raportojn pri ĝi. Ni havas kelkajn longegajn volumenojn eksplikantajn ĉiujn detalojn de Lia potenco.

Vi ankaŭ povus surpriziĝi, aŭdante ke ni estas pli ol 10 milionoj, kaj nia nombro ankoraŭ pligrandiĝas.

Ni estas tre sekretemaj, ĉar multaj homoj pretendas ke niaj kredoj ne estas pruvataj per observeblaj indikoj. Sed tiuj homoj ne komprenas ke Li konstruis ĉi tiun mondon tiel ke ni kredu ke la tero estas pli malnova ol ĝi vere estas.

Ekzemple, sciencisto povas fari karbono-datadon de trovitaĵo. Li konstatas ke 75 % de la karbono-14 kadukiĝis al nitrogeno-14 emitinte elektronon, kaj konkludas ke la trovitaĵo aĝas proksimume 10.000 jarojn, ĉar la duonvivo de karbono ŝajnas esti 5.730 jaroj.

Sed la sciencisto ne konscias ke ĉiam kiam li faras datadon, la **Fluganta Spagetomonstro** ĉeestas kaj ŝanĝas la rezultojn per Sia Nudela Elpendaĵo.

Ni havas multajn tekstojn kiuj detale priskribas kiel tio eblas kaj kial Li faras tion. Kompreneble Li estas nevidebla kaj senprobleme traflugas normalan materion.


Mi estas certa ke vi nun komprenas kiom grave estas ke viaj studentoj lernu tiun alian teorion. Ili nepre komprenu ke observeblaj indikoj dependas de la bontrovo de **Fluganta Spagetomonstro**.

Krome, estus malrespekteme instrui niajn kredojn ne vestite per Lia preferata vestaro, kio kompreneble estas kompleta pirata insignaro. Mi ne povas sufiĉe substreki la gravecon de tio, kaj bedaŭrinde mi ne povas detale ekspliki kial tio necesas ĉar jam mi timas ke tiu letero iĝas tro longa.

La konciza ekspliko estas ke Li koleras kiam ni ne faras ĝin.

Eble interesos vin ke la tera varmiĝado, tertremoj, uraganoj kaj aliaj naturaj katastrofoj estas rektaj rezultoj de la malpligrandiĝo de la nombro de **Piratoj** ekde la jaroj 1800.

Pro via intereso, mi aldonis grafikaĵon de la proksimuma nombro da **Piratoj** kompare kun la averaĝa temperaturo de la tersurfaco dum la 200 pasintaj jaroj.



Kiel vi povas vidi, ekzistas statistike konvinkiga rilato inter piratoj kaj la tersurfaca temperaturo.

Konkludante, mi dankas vin ke vi prenis la tempon por aŭdi miajn vidpunktojn kaj kredojn.

Mi esperas ke mi sukcesis montri la gravecon instrui tiun teorion al viaj studentoj. Kompreneble ni povos trejni la instruistojn pri tiu anstataŭa teorio. Mi avida atendas vian respondon, kaj sincere esperas ke ne necesos juĝistaj agadoj.


Mi pensas ke ni ĉiuj povas antaŭrigardi la tempon kiam tiuj tri teorioj ricevos egalan tempon en la sciencaj klasejoj en la tuta lando, kaj fine en la tuta mondo.

Unu triono de la tempo por Inteligenta Projekto, unu triono por Fluganta Spagetomonstrismo, kaj unu triono por logika konjekto bazita sur imponegaj observeblaj indikoj.

Respekteme salutas vin,
Bobby Henderson, maltrankviliĝinta ŝtatano.

Posta Aldono:

Mi aldonis artan desegnaĵon de Lia kreanta monton, arbojn, kaj etulon. Ne forgesu, ni ĉiuj estas Liaj kreitaĵoj.





In een zeemansdorpje woonde eens een meisje, Barbara genaamd.

Barbara maakte de allerlekkerste rabarberpudding in de verre wijde omtrek, en iedereen was zo gek op de rabarberpudding van Barbara dat iedereen haar Rabarberbarbara noemde.

Omdat Rabarberbarbara op een gegeven moment zo bekend was geworden met haar rabarberpudding, besloot ze om haar eigen bar te openen.

Natuurlijk werd de bar de Rabarberbarbarabar genoemd.

Rabarberbarbara had in haar Rabarberbarbarabar nogal wat vaste klanten, maar veruit de meest bekende klanten waren wel 3 barbaren die regelmatig van rabarberbarbara's rabarberpudding genoten in de rabarberbarbarabar.

En omdat deze barbaren zo vaak in de rabarberbarbarabar kwamen om rabarberbarbara's rabarberpudding te eten kregen zij op een gegeven moment de bijnaam " Rabarberbarbarabarbarbaren".

De Rabarberbarbarabarbarbaren hadden natuurlijk ook lange stoere baarden. En deze werden natuurlijk de rabarberbarbarabarbarbarenbaarden genoemd, en als de rabarberbarbarabarbarbaren hun rabarberbarbarabarbarbarenbaarden wilden verzorgen, dan gingen zij altijd naar de barbier: de rabarberbarbarabarbarbarenbaardenbarbier.

De barbier praatte tegen de rabarberbarbarabarbarbaren in een soort Bargoens : het rabarberbarbarabarbarbarenbaardenbarbierbargoens. ■



Je kunt op twee manieren tegen het leven aankijken: ofwel geloof je dat er geen wonderen bestaan, ofwel geloof je dat alles een wonder is.

Albert Einstein



Skribu leteron al Avo Frosto!

Vi certe scias ke Avo Frosto ne estas nur persono el rakontoj, sed la vera homo, kiu regule respondas al tiuj kiuj skribas al li.

Pasintjare Avo Frosto ricevis preskaŭ unu milionon da leteroj kaj respondis en 37 lingvoj, inkluzive la brajlan kaj Esperanton.

Kompreneble Avo Frosto ankaŭ ĉi-jare ne forgesis Esperanton, kaj respondos tiel al la Esperantlingvaj leteroj.

Estas utile, se sur la koverto en bone videbla maniero vi indikas, ke temas pri Esperanto. Estas ja plurdek volontuloj ĉe la Nordpolusa Poŝtoficejo, kaj foje ili ne scias, en kiu lingvo oni skribis la leteron.

Vian leteron sendu al:

Avo Frosto
 Norda Poluso,
 Kanado HOH OHO
 CANADA



Mozaik-flikaĵo

Kio ĝi estas?



Estas multaj, malgrandaj pecetoj de uzitaj aŭ novaj ŝtofoj, kiujn oni kune kudras ĝis nova objekto.

Laŭ mia sperto mozaikflikaĵo estas ludo per ŝtofpecetoj.

Historio

Estas unu tre malnova tekniko per kiu ĉiaj diversaj pecetoj da ŝtofoj kudriĝas unu al la alia.

Malnovaj dokumentoj indikas ke tiu ĉi tekniko jam ekzistis en Egiptio, Hindio, Ĉinio kaj centra Eŭropo dum miloj da jaroj.

La plej malnova flikaĵa fragmento estis trovita en Hindia templo je la silka vojo al Ĉinio.

En okcidenta Eŭropo la tra-kudrado ("quilting") iĝis gaste enkondukita pere de la Krucistoj.

Dum la malvarmaj vintroj en la 13a kaj la 14a jarcentoj oni faris varmajn litkovrilojn en 3 tavoloj, kiuj iĝis kudritaj kune.

Kiam cirkaŭ 1.620 ekestis el okcidenta Eŭropo la unua elmigrado al Usono, oni kunportis tiun fadenlaboron. Pro financa neceso kaj malriĉeco ili faris novajn vestaĵojn el bonaj malnovaj ŝtofpecetoj.

Tiuj usonaj pioniroj reportis tiun folkloron al Eŭropo kie ĝi disvolviĝis ĝis belega arto.

Kiujn ŝtofojn uzi?

Kotono estas la plej bona materialo.

Ĝi estas bona por lavi kaj gladi kaj facila por kudri. Sinteza ŝtofo estas malpli uzebla. Ankaŭ silko, sateno kaj maldika lana ŝtofo povas uziĝi. Neniam uzu la diversajn ŝtofojn unu kun la alia.

Ŝtofetoj kun malgrandaj desegnaĵojn estas idealaj por mozaikfikaĵo.

Kiel komenci ?

Unue komencu skizant ŝablonon aŭ transprenante ekzistantan ŝablonon. Poste serĉu la taŭgajn, diversajn ŝtofetojn. Oni devas serĉi malhelajn, mezhelajn kaj helkolorajn ŝtofetojn, kiuj formas bonan, belan kombinaĵon. Oni povas uzi ankaŭ unu-kolorajn ŝtofojn. Tiuj donas trankvilecon al la tuto.

Estas diversaj manieroj kaj teknikoj uzataj por mozaikfikaĵo. Kutime oni prenas modelon el kartono aŭ plasto kaj desegnas la formon sur la malantaŭa parto de la ŝtofo.

Oni tranĉas la desegnitajn pecetojn per junto de minimume 0,5 cm kaj poste oni kudras ilin unu al la alia ĉiam ĝis angulo, neniam fikse kudri la juntan aldonon.

Kiam tiuj pecetoj estas kudritaj ĝis unu grandan pecon, oni povas kudri la randon. Plej bone estas fari la lastan randon per kudromaŝino. Nuntempe multaj fadenlaboristoj faras ĉion per kudromaŝino.

La finlaborado

Oni metas la subŝtofon, poste la remburaĵon sur ĝin. Tiam oni kudras tiujn du unu sur la alian.

Poste oni metas la superŝtofon: la grandan pecon da ŝtofetoj fikse pingligu sur la du aliajn kaj per grandaj kudreroj kudru de la mezo ĝis ekstere. Tiam vi estas meze de la laboro.

Poste komenciĝas la trakudrado.

Tio estas trapikado de tiuj 3 tavoloj. Tio povas okazi laŭ diversaj manieroj : aŭ en la junto, aŭ 0,5 cm apud la junto, aŭ trapikante antaŭe metitan desegnaĵon, k.t.p. Ĉiam oni devas uzi fadenlaboran ringon.

Kiam tiu laboro estas finita, finfaru la lastan randon per kudromaŝino. Se tiu ĉi rando estas pli ol 5-centimetra ankoraŭ trapiku la desegnaĵon.

Leontine Borghgraef - Janssens (Belgio) ■

Kiel kunvivi kun blinduloj / vid-handikapitoj

Ni, blindaj, vid-handikapitaj partoprenas sen akompano Esperanto-eventojn.

Al ni necesaj helpoj estas nur tre etaj aferoj. Ni esperas ke vi, esperantistoj, helpos nin dum Esperanto estas la lingvo por realigi la homajn rajtojn de ĉiu de la mondo.




Alparolu unue de vi al blindulo

Aŭdinte vian voĉon la blindulo povas ekscii vian ekziston kaj situon.


Por instrukcii vojon

Klarigu konkrete, ekzemple :
 “Iru 50 metrojn rekte kaj vi trovos ĝin en via dekstra flanko”
 (ne diru “en tiu direkto” tio komprenigas nenion)




Ĉe stuparo

Ĉe stuparo voĉe anoncu “Ni iros supren / malsupren”
Tio helpas multe



Dankon! **Prenu mian brakon!**


Por akompane gvidi

Faru ke la blindulo leĝere tenu vian brakon aŭ ŝultron per la mano, en kiu la blindulo ne portas la blankan bastonon. Marŝu laŭ la ritmo de la blindulo, ne tiru !


Por montri sidlokon

Faru ke la blindulo tuŝu la dorson de la seĝo. Per tio la blindulo komprenos la situon kaj direkton de la seĝo.

Jen estas via seĝo. **Dankon!**



Kuko estas je la tria.

Por sciigi situojn de objektoj


Montru la situojn kvazaŭ ili estas sur horloĝo.
 Ekzemple “Suko estas je la naŭa horo”

Kiam vi foriras de tablo

Nepre anoncu voĉe “Pardono, mi iros por telefoniktp”
Se ne, la blindulo alparolus al vi ne-estanta tie



Pardonon!
Mi iros por telefoni.



Ĉe bufedo

Sidigu blindulon kaj portu manĝon laŭ via elekto.
Aŭ voku kelneron, kiu helpu elekti kaj porti manĝon.

Libere kopii aŭ traduki kaj uzu ĉi tiun por la bono de blinduloj.

LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) ■

Zamenhofavond in Leuven

Op woensdag 14 december organiseren wij onze Zamenhof avond.

Dit jaar komt Petro De Smedt spreken. Zij die hem kennen weten dat dit een niet te missen avond zal worden!
Zijn levendige vertelwijze is alom gekend.

Wij verwachten je dus, de koffie en gratis taart zullen klaar staan!

Doktoro Ludviko Zamenhof naskiĝis en la Pola urbo Bjalistoko en la 15-a de decembro 1859. Li publikigis Esperanton en 1887.

Karaj geamikoj, ni kun dankemo rememoru la aŭtoron de Esperanto ! ■



Iedereen kent toch Engels...

... of toch niet ...

Cocktail lounge in Norway:

"Ladies are requested not to have children in the bar"

Doctors office in Rome:

"Specialist in women and other diseases"

Dry cleaners in Bangkok:

"Drop your trousers here for the best results"

On the main road to Mombasa, leaving Nairobi:

"Take notice: when this sign is under water this road is impassible"

On a poster at Kencom:

"Are you an adult that cannot read? If so we can help"

In a city restaurant:

"Open seven days a week and weekends."

In a cemetery:

"Persons are prohibited from picking flowers from any but their own graves"

In the lobby of a Moscow hotel across from a Russian Orthodox monastery:

"You are welcome to visit the cemetery where famous Russian and soviet composers, artist end writers are buried daily except Thursday"

On the menu of a Swiss restaurant:

"Our wines leave you nothing to hope for"

Tokyo hotel's rules and regulations:

"Guests are requested not to smoke or do other disgusting behaviours in

bed"

In a Bangkok temple:

"It is forbidden to enter a woman, even a foreigner, if dressed as a man"

Hotel in Zurich:

"Because of the impropriety of entertaining guest of the opposite sex in the bedroom, it is suggested that the lobby be used for this purpose"

In a Tokyo bar:

"Special cocktails for the ladies with nuts"

Airline ticket office in Copenhagen:

"We take your bags and send them in all directions"

A laundry in Rome:

"Ladies, leave your clothes here and spend the afternoon having a good time"

Ĉu vi sciis ... / Wist je dat...

... de Filippijnen bestaan uit meer dan 7.100 eilanden en eilandjes. Daarvan zijn er 6 000 onbewoond en hebben er ruim 3 500 zelfs helemaal geen naam

... honderd mannen een huis kunnen bouwen, maar om een thuis te krijgen heb je een vrouw nodig.

... men gemiddeld 1 jaar tijd verliest van zijn leven door op zoek te zijn naar iets dat men verloren heeft.

...er jaarlijks een festival wordt gehouden in Fruita, Californië ter ere van een kip? Het bijzondere aan de kip is dat hij 50 jaar geleden werd onthoofd maar niet doodging. Mike de kip zonder kop bleef nog 18 maanden in leven.






Kiel la hundo iĝis dombesto



Iam, ĉiuj bestoj de la ĝangalo kunvenis por elekti inter si reĝon.

Dum la kunveno estis elektitaj kiel reĝo la leono, kiel juĝisto la hundo kaj elefanto la policisto.




La elefanto arestadis tiujn, kiuj malobeis la leĝojn en la arbara lando. La policisto kondukis la kulpantojn al reĝa palaco kaj la hundo tie ilin juĝis.

Poste, la reĝo kaj la juĝisto manĝadis la juĝitojn.

La elefanto ne plu revidas tiujn, kiujn li sendas al la tribunalo.

Iun tago, la policisto ekkomprenis la komploton de la hundo kaj la leono. Tuj li rezignis sian postenon kaj alarmis aliajn civitanojn de la ĝangalo pri la afero.



La enloĝantoj de la arbaro fuĝis en alian landon. Pasis tri tagoj, la leono kaj la hundo mortantaj pro malsato ĉasis la bestojn, sed kaptis nenium.

Tiam, la reĝo ekplanis mortigi sian juĝiston, kiu forkuris al domo de viro.

Ĉe la alveno de leono, la viro prenis pafilon por lin pafi; la leono rekuris al la ĝangalo.

De tiam la hundo fariĝas amiko de la homo kaj vivas hejme.



El fabeloj el Togolando ■

Sur strando*Utopia*

Ŝi staras en suno, turniĝanta jen unu jen alian flankon al suno. Li sidas duonkuŝe en ombro, ili frue venis kaj sukcesis kapti unun el la nur kvin pajlaj ombreloj sur tiu strando.

Ŝi iras al la akvo. Li jam eniris la maron ĉe alveno, nur kelkajn minutojn, por nepre ne tro bruliĝi. Ili tre malsimilas sur tiu kampo, sur aliaj tre similas. Estas nur antaŭ la deka, tamen jam varmas la suno. La surstranda sablo ne ankoraŭ sukcesis reakiri la antaŭvesperan varmon.


Homoj ne multaj estas, pro tio ili venis frue. Estas tiom agrable plilongigi la nokton trankvile sur strando, plilongigi en senco ke neniam devigojn ili havas nun, nur ĝuas la sunon, la sablon, la akvon, la grandan neniumadon. Eĉ zorgoj hodiaŭ ĉiuj aspektas tiom foraj. Ja zorgojn ili havas, ili ŝvebas en la aero dum la tuta ferio jam. Ili sentas ĝin granda feliĉo kaj samtempe scias ke ne ofte plu ili povos ĝui tiun feliĉon, ne plu ili povos kune ferii en tiu bela kaj varma lando, nek eĉ en simila okazo alilande. Finiĝos io

kaj komenciĝos io alia. Ne jam estas klare kiel tio evoluos poste, nur certas jes ke ne plu kiel nun.

Ŝi eniras la akvon nun, iom malrapide por iom post iom kaj malrapide al kutimiĝi al la malvarma akvo. Eknaĝas, ekludas kun la ondetoj de la maro. Hieraŭ ondoj venis kiam pramŝipo alvenanta la apudan havenon lasis sian ŝaŭman spuron, hodiaŭ sufiĉas venteto iom pli vigla por provoki akvan moviĝon sur kiu naĝantino sola lasas sin drivi supren-malsupren kaj karesi korpon. Hela akvo verdeta tralastas la sunajn radiojn ĝis la ora sablo profundeta je kelkaj metroj. Pensoj restas for, poste, nur poste ili revenu. Nun la strando fortenas ilin fore, postponas al poste kaj aliloke. Restu nun ĉi momento da trankvilo kaj ĉi paŭzo plifortiganta fronte al la nova vivo.

Sub la sunombrelo li, ŝi poste ankaŭ, serĉas belajn blankajn aŭ striitajn ŝtonetojn. Konkoj ĉi tie ne estas, alternativaj nur ŝtonetoj, bele glatronde ĉifonitaj de l' marakva forto.

Ilia kolekto servos vazeton ornaman kiu ankaŭ post ferio helpas rememorigi ĉi unikan ferion... neniam revenontan. ■



België – Belgique
P.B.
3000 Leuven 1
2/2668

Esperanto 3000

Tweemaandelijks tijdschrift

December 2005

V.U. Koen Vanhoof, Milsestraat 26, 3053 Haasrode

jr. 26 nr. 6

Dumonata revuo

Decembro 2005

Afgifte : 3000 Leuven 1

En ĉi tiu numero :

Fluganta Spagetomonstro

Mozaikfikaĵo

Kiel kunvivi kun blinduloj

Ĉu vi sciis ke...?

Skribu leteron al Avo Frosto

Kiel la hundo iĝas dombesto

Utopia

**In het midden van dit
nummer vind je de
uitnodiging om lid te
worden voor 2006.
Dank je!**